

Kálmán Mikszáth

La du malriĉegaj studentoj

– Traduko –



2024

ISBN: 978-615-02-2506-7

Kálmán Mikszáth
La du malriĉegaj studentoj

– Traduko –

Fabela historio por la junularo

La originala nomo de la verkisto estas: MIKSZÁTH KÁLMÁN

La originala verkotitolo estas: A két koldusdiák

Eperantigita de: László Pásztor

Lingve reviziis: Rob Moerbeek

La esperantigo okazis laŭ la verko: MIKSZÁTH KÁLMÁN MŰVEI

MEK-a aperejo: <https://mek.oszk.hu/00900/00905/html/06.htm#12>

La aperejo de ĉi tiu verko: <https://mek.oszk.hu/26600/26661/>

Redaktis: László Drótos

Frontispica bildo:

Regiono – Nyírség – grafikaĵo el la serio: La Tero kaj ĝiaj popoloj, 1894-1905

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=83181>

La klarigojn aldonis kaj la frontispicon planis:

Adrienne Lászlóné Pásztor

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Eldonrajto ĉe: Pásztor Lászlóné

Enhavo:

1. Ĉapitro – Onjo Doboŝ kaj ŝiaj studentoj	4
2. Ĉapitro – Kie trovis onjo Doboŝ la du malriĉegajn studentojn?	6
3. Ĉapitro – Batalo en la grandarbaro.....	9
4. Ĉapitro – Vi neniam povos havi glavon	12
5. Ĉapitro – Kiu heredos la vendejon?	15
6. Ĉapitro – La hundoj blanka kaj nigra.....	18
7. Ĉapitro – La regnestro posttagmeze	24
8. Ĉapitro – Heroldo de la transmondo	28
9. Ĉapitro – La trezoro.....	31
10. Ĉapitro – Agnesa Nesselroth	38
11. Ĉapitro – La malaperinta feliĉo	44
12. Ĉapitro – La malliberulo.....	50
13. Ĉapitro – Kiu estas kuglosekura	55
14. Ĉapitro – La eŝafodo	60

1. Ĉapitro

Onjo Doboŝ kaj ŝiaj studentoj

Proksimume antaŭ ducent, aŭ tricent jaroj – nome, se ni preterlasas la tempokalkulon, tiam ne estas gravaj cent jaroj – en la tura kolegio de Debrecen¹ la vivo estis tiel vigla, kiel nun.

Ja la studentvivo ne ŝanĝiĝas, eĉ ankaŭ ne la studentoj. Bone diris la iama homo de Hajdúszoboszló² kun la edzino vojaĝanta en Debrecen³ post dekkvin jaroj jam la duan fojon: „Ej, vidu karulino, ĉi tiuj studentoj tute ne kreskis de tiam.”

Vere ne, tiuj estas ĉiam samformaj, ĉiam samaj. Kvankam la sinjoroj profesoroj estis preskaŭ la samaj, tamen ili portis triangulan ĉapelon, alifasonan kaj aliforman veston. (La fama profesoro Hatvani venis al la kolegio nur pli malfrue.)

La sinjorinoj kaj mastroj donantaj manĝaĵprovizojn estis preskaŭ same abdomenaj kaj bonhumoraj homoj, kiel nun. Sed nun oni nomas ilin sinjoroj Johano Nagy kaj Stefano Kispéter. Tiam oni nomis la plej famajn nutraĵprovizojn donantajn personojn Johano Bujdoŝo kaj sinjorino Doboŝ⁴.

Sinjorino Doboŝ loĝis en la strato Csapó (ĉapo) en malalta teretaĝa domo ne malproksime de la fama lernejo. En la antaŭa parto de la domo estis vendejo, sur kies muro estis videbla bele pentrita porko. La internaj partoj de la porko ruĝis, jam de malproksimo ili estis bone videblaj. (Tiun pentris iu tiama studento, kiu iĝis poste fama pentristo ie eksterlande). En la korto estis la loĝejo de onjo Doboŝ kaj malproksime de tiu estis la ĉambroj de la studentoj. En la ĉambroj la litoj estis unu super la alia kaj en unu lito du „buboj” tranoktis. Nome du litluantoj valoris unu „filozofon”, aŭ unu „poeton”. Ĉar al la instruisto de la retoriko, aŭ al la pliranguloj onjo Doboŝ donis propran liton. Ŝi uzis por la sinjoroj profesoroj la titolon „Domine/Sinjoro mia.”

„La edzo de onjo Doboŝ”, ĉar nur (kiel pli malfrue estis konate, tutrajte) post lia edzino oni nomis lian ekscelencan moŝton ĉi tiel, konsidere lian metion li estis buĉisto. Kvankam li malmulte komprenis la metion, tamen ĉar li heredis de sia patro tiun pentritan porkon akceptinte la studentojn manĝi volajn, pro tio li devis resti buĉisto, respektive por ŝato de la ŝildo, kvankam en Debrecen jam ankaŭ tiam estis tiomaj buĉistoj, kiel nun estas doktoroj en Vieno.

Nu, ankaŭ pro tio estis tiel bone, ĉar la dikigo kaŭzis ĝojon al onjo Doboŝ. Ŝia pasio estis, ke kiujn ŝi prizorgis, estu porketo aŭ studento, tiuj estu sanaj kaj dikiĝu pro la bonaj nutraĵoj.

Ŝi dikigis 40-50 porkojn kaj akceptis dek pagantajn manĝantajn studentojn, krome du studentojn, kiujn ŝi elektis por teni senpage.

La pagantoj pagis po ok „pengó”⁵ - ojn monate kaj por tiu sumo la monpaganto ricevis kaj patrinajn konsilojn kaj batetojn sur la dorson⁶.

Tiu ĉi loko iĝis fama en la urbo, kie tre ofte aŭdeblis: „Sinjorino Doboŝ estas freneza kaj malgajnos pro ŝiaj studentoj!” Kelkfoje oni diris al ŝi rekte, ĉefe ŝia najbaro, la malbonanima Stefano Percz⁷:

¹ La Kalvinana Kolegio de Debrecen estis la plej eduka instituto de la urbo, ekde la 1538 jara fondo de la Kolegio.

² Hajdúszoboszló estas hungara urbo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Hajd%C3%BAszoboszl%C3%B3>

³ Debrecen estas hungara urbo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Debrecen>

⁴ La nomojn bv. elparoli jene: nagy=nadj, kispéter=kiŝpeter, bujdoso=bujdoŝo, dobos=doboŝ

⁵ Pengó/pengo=malnova hungara mono.

⁶ Tiu surdorsan batetado estis la signo de kuraĝigo, kiel estas kutime inter amikoj.

⁷ La nomon percch, bv. eldiri percch.

– Ej, ej, kamaradino vi estas stulta, ĉi tiu sistemo ne estas bona. Donu al la studentoj malpli multe da viandoj kaj pli multe da batoj sur la dorson! Poste vi vidos, ke vi havos pli multe da profito!

Sed feliĉe, sinjoro Percz ne povis influi onjon Doboŝ, kaj la studentojn abunde atingis ne nur la intermanĝeto sed ankaŭ la riproĉeto. Kvankam ŝia koro estis bona, ŝia lango penetris ĉies animon, kiun atingis ŝia rigardo. Kiu konis ŝin tuŝe-fuŝe, tiu kredis, ke ŝi estas netolerebla drako.

La forte brua buŝbatalo komenciĝis jam frumatene. Unue ŝi riproĉis oĉjon Doboŝ, kiun ŝi tre malbone traktis. Ŝi kaptis lin multfoje kaj forĵetis eksteren. Foje li terenfalas antaŭ la sojlo. Sed li toleris ĉion, li ekstaris, tre trankvile debatis la polvon de siaj vestaĵoj kaj enŝoviĝis murmuregante en la vendejon.

– Nu, haltu, edzino! ... ĉar tamen mi estas via edzinsinjoro; regu vin! Vi havas bonŝancon, ke vi restis en la domo!

Oĉjo Doboŝ agis kiel Scipiono⁸, kiam li transremis al Afriko kaj sur la bordo stumblis mispaŝante ĉe io, tamen li ekkriis fierege: „Tero de Afriko, estas la mia!”

Post kiam ŝi finis riproĉi sian edzon, ŝi komencis riproĉi la servistinojn. Ĉiujn ŝi batis, aŭ iomete plorigis. Poste ŝi kolere malfermis la pordon piedfrape ĉe la ĉelo de la studentoj kaj enkriis: „Al manĝotrogo, infanoj!”

Ŝi estis bonkora, sed sian stilon ŝi ne forlasis. La manĝaĵon donantaj nunaj sinjorinoj de Debrecen jam diras alimaniere: „Bonvolu veni por matenmanĝo. (De tiam la bela vorto iĝis pli malmultekosta, ol la viando.) de la tago kaŭzis al ĉiuj amarecon, tamen dum la alia parto de la tago ŝi klopodis repacigi ĉiujn. Pro tio ŝi neniam tedis. La servistojn ŝi konsolis donante al ili bonajn manĝaĵojn, karesis la kapojn de la studentoj, karesnomis ilin, ĉar ili bone kondutis, pridemandis la pli-malsaĝulojn pri la hejmtaskoj. Ja ŝi komprenis ankaŭ studentlingve, kiel la altestimataj instruisto-sinjoroj. Kiu studento tre malfacile kapablis lerni, ankaŭ tiun ŝi konsolis per bonaj vortoj: „Ne timu, mia dolĉa filo, ja ankaŭ al via pli maljuna frato mi donis manĝaĵon, ankaŭ tiu estis malsaĝa, tamen li iĝis juĝisto de reĝo en Transilvanio.”

Kial ni preparolu pri ĉiuj ŝiaj studentoj, ja pri la pagantaj sinjoretoj ni havas malmulte da direndoj? Ja ili havas malmulte da historioj. Ili estas plejparte filoj de grandpotenculoj. (Nome tiame estis pli malfacile por atingi servon de onjo Doboŝ, ol nun ricevi pozicion ĉe la ministerio kiel aktisto, vortumisto). Do, ili estos certe riĉaj, rangaj sinjoroj kaj kredas, ke nenio speciala okazis pri ili. Sed ni atentu la sortojn de la du senpagaj studentoj.

⁸ Scipiano estis glora Romia komandanto: https://eo.wikipedia.org/wiki/Skipio_Afrika

2. Ĉapitro

Kie trovis onjo Doboŝ la du malriĉegajn studentojn?

Vi ankoraŭ ne konas ilin, sed unue ni devas konigi ilin. Tiam ankaŭ onjo Doboŝ havis du filojn, unu estis Steĉjo⁹, la alia, la pli juna, estis Laĉjo. Sed Dio tre ekŝatis ilin, kaj al si mem vokis ambaŭ, unu post la alia. Sed ja ankaŭ sinjorino Doboŝ amis tiujn kaj kiam oni forportis ankaŭ la duan ĉerkon el la korto, la brava sinjorino iĝis malsana pro febre senkonscia stato, kaj se ne estus tie la kuracisthelpisto, la sciencisto Gabrielo Ŝopronius, tiam ŝi estus sekvinta la malfeliĉajn filojn.

Sed, post la resaniĝo ŝia koro doloris plu por tiuj du; kiam ŝi ekvidis la multajn fremdajn studentojn, elfalis la larmoj el ŝiaj viglaj okuloj: „Dio mia, Dio mia, ili ne estas la miaj!” Vane estis multaj studentoj, tamen la korto estis malplena, vane ŝi portis novajn studentojn de semajno al semajno. La korto estis malpleniĝinta kaj la silento de la korto estis konsterna por ŝia koro, ĉar mankis tiuj veraj du filoj.

Ho ve, nepre tiam, kiam ŝi aŭdis la nomojn Steĉjo, Laĉjo en la korto!... Ĉiuj ĉi tiuj sentoj profunde impresinte ŝin donis fine al la onjo unu bonan ideon: ŝi povas adopti du similajn malriĉajn studentojn, por kiuj oni ne pagas manĝokostojn, pro kio ili povas kredi pri tiuj per iom da fantazio, ke ili estas ŝiaj filoj. „Ĉar vi vidas, kara mia edzo – ŝi diris al oĉjo Doboŝ – la pago certe rompas la iluzion.”

Tiutempe loĝis en la regiono Nyír¹⁰ iu grandpotenca riĉa sinjoro, nomita Krucsay, kiu havis rajton uzi sian glavon de ekzekutisto. Li famiĝis pri tio, ke li sian edzinon senkapigis, nome li estis brutala, malica homo. Onjo Doboŝ kutimis aĉeti la bezonatan varon de sinjoro Krucsay. Li havis grandajn arbarojn en Ung,¹¹ Berek, kie la multaj porkoj abunde povis manĝi glanojn.

Foje ĝuste tiam, kiam onjo Doboŝ estis ĉe Krucsay, li tiom bastonetigis iun servutulon, ke tiu mortis pro la brutalaj bastonetbatoj.

Tio tiutempe estis ne grava kaj nekutima afero! La estraro de la fortikajdepartemento fermis la okulojn antaŭ tiu afero. La gazetoj ne disvastigis la okazintaĵojn, ĉar gazetoj ne ekzistis. Oni ne volis ekscii la kaŭzon de la battoj, ĉar dank’ al Dio estis evidente, ke en Hungario la kamparano estas senpaga tiel same kiel la avelbastoneto. – Ambaŭ pereigas unu la alian: la kamparano forhakas la avelon por fari bastoneto, la dua mortbastonas la kamparanon.

Nur tial estas inde mencii la kazon, ĉar Johano Vereŝ, la ĝismorte bastonita servutulo, havis du adoleskajn filojn, kiuj tre amare priploris la mortinton. Post la entombigo ili petis enlason en la kastelon ĝuste dum la tiea troviĝo de la onjo.

Onjo Doboŝ kaj Krucsay¹² ĝuste tiam marĉandadis pri la kostoj de la porkoj, kiam la husaro anoncis, ke du kamparandevenaj filoj ĉiumaniere volas paroli kun la sinjoro. Tielŝajne ili estas 12-13- jaraĝaj.

– Ĉu ili estas tiomaj bubetoj? Nun ne estas Kristnasko, kiam ili portus la Bet-leĥemon.

Du blondaj knabetoj enpaŝis en la kastelon. La okuloj de la pli aĝa knabeto estis ruĝaj pro la ploro, la okuloj de la alia knabeto bluis klare, trankvile.

– Kiuj vi estas, malgrandaj homoj?

– Ni estas la filoj de Johano Vereŝ – respondis la pliaĝulo.

⁹ Steĉjo (Piŝta) estas la karesnomo de Stefano (István), Laĉjo (Laci) estas la karesnomo de László (Ladislao), hungaraj virnomoj.

¹⁰ Nyírség, Nyír (njir), Nyírvidék ...: estas el la glata tereno de la Hungara Ebenaĵo elleviĝanta, al granda surfaco etendiĝanta sablo-regiono – laŭ la Hungara Etnografia leksikono.

¹¹ La departemento Ung iam estis hungara reĝlanda teritorio, nun apartenas kaj al Slovakio kaj al Ukrainio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ung>

¹² La nomon Krucsay bv. elparoli kruĉai.

- Mi rekonas vin laŭ viaj haroj. Kion vi volas?
- Nun la pli juna knabeto iris tute proksimen al la terure senhomsenta Krucsay:
- Ni venis al vi, potenca sinjoro, ĉar vi ĝismorte bastonbatis nian patron.
- Ĉu? – alparolis Krucsay ridante malŝate. – Ĉu vi volas, ke mi revivigu lin?
- Nun la pli aĝa knabo ekparolis:
- Ni volas diri al vi, ke vi gvardu vin! Gardu vin!

La infano levis la montrofingron kaj minacis la „reĝon de la regiono Nyírség”. La voĉo de la infano tiel sonoriletis, kiel la sonorileto dum la entombigo, kaj la ombro de lia minacanta fingro figuris sur la muro tremetantan klingon de tranĉilo.

La brutala Krucsay, kiu ne timis por ĉikani la fortikaĵdepartementon kaj multfoje rigardis en la okulojn de la morto (tiun li bone konis kaj multfoje invitis), provokis la palatinon multfoje, nun la potenca Krucsay ekmetis, vidante la minacantan fingron de la infano.

– Ho, pendumindaj buboj! – Malbenitaj ursidoj! – kriis la grandpotenca sinjoro kaj liaj korpopartoj frostotremis – vi kuraĝas minaci min? Vidu homoj, jen kia eventaĉo! Jen, vidu onjo Doboŝ, kiaj estas eĉ ankaŭ la idoj de la kamparano! Hej, Matiaso, Matiaso! – li alkriaĉis kolere al la husaro – forpeli de tie ĉi tiujn du idetojn! El la vilaĝo, el la limtereno, el mia tuta tereno! Ankaŭ ilia raso pereu! Kaj nun, onjo, diru la plej lastan koston de la eksvirporkoj, ĉar mi estas ege ekscitita.

Ankaŭ onjo Doboŝ estis ekscitita, Dio atestu, ankaŭ larmoj brilis en ŝiaj okuloj. Pro tio ŝi ne marĉandadis, sed pagis la lastan koston kaj samtage veturis hejmen kun liveranto de Debrecen nomita Danielo Bujdoŝo, kiu konis ĉiujn kastelojn, nobeldomojn, farmojn en la regiono Nyírség. Li konis la mastrojn, edzinojn de la mastroj; li konis la nombrojn de la infanoj ĉe la domoj kaj ankaŭ tion sciis, kiom da heredaĵoj havos la infanoj en la estonteco.

Sed la liveranto ne povis amuzi sufiĉe ŝin dumvoje, la bona sinjorino ne povis forgesi la sortojn de la du kamparandevenaj knabetoj.

Kio okazos pri ili? Oni forpelis ilin al la aŭstera mondo. Ili vagadas nun ie sur la landvojo plorante. Kiu faros liton al ili por la nokto? Kie ŝi iris en la vilaĝoj, ĉie el la domoj fumo suprenflugis. La homoj bakas, kuiras en la domoj. Ĉu oni kuiras manĝaĵon ie por tiuj malfeliĉaj infanoj?

Ĝis tiam ŝi imagis antaŭ si la lacajn, soifajn malesperiĝantajn infanojn paŝadantaj sur la landvojo, ili lasis malantaŭe la setlejon Hadház¹³ per la peza ŝarĝoĉarego de la lerta ĉaristo kaj ŝi rimarkis la du knabetojn sidantaj sur la rando de iu ĉevoja agromarĝeno.

La pli aĝa frato prenis en la sinon la blondan kapon de la pli juna knabo kaj karesis lin kuname:

– Nu, ne rezonadu! Ekstaru kaj ni iru iomete! Hej, kiel vi kuradis hejme! Lerte, saltu, mia pli juna frateto! Ni ludu ĉevaleton! Mi estos la selita ĉevalo kaj vi la gvidstanga!

Sed la knabeto klinis la kapon lace:

- Mi estas malsata, mi ne povas iri plu. – li ĝemetadis – Donu manĝi!
- Ĉi tie vojrande ne eblas. Sed provu ekstari, ni iru plu, eble Dieto helpos.
- La knabeto malfermis larĝe siajn grizajn okulojn.
- Ĉu Dieto loĝas malproksime de ĉi tie?
- Dio loĝas ĉie.
- Kial li ne tuj donas al ni manĝi ĉi tie?
- Hej, vi, azenido ... Tio ne estas tiel!

Ĝuste nun ektintis la radoj de la peza ŝarĝoĉarego malantaŭ la knaboj. Sinjorino Doboŝ klinis sin el sub la tifao-ombrelo kaj rekonis la filojn de Johano Vereŝ.

¹³ Hajduhadház estas urbo en Hungarujo, kiu rolis antaŭ 1870, kune la nomo Hadház kiel memstara setlejo en la departemento Hajdu-Bihar: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Hajd%C3%BAhadh%C3%A1z>

– Ho! Haltu, sinjoro mia! Rigardu, tiuj estas la servutul-infanoj! Ĉu oni vere forpelis vin? Tio estas terura sendiaĵo krianta ĝis la ĉielo! Mi ne scias, kiel Dio toleras tion ĉi, ĉar li havas multe da zorgoj, sed mi ne toleras. Nu, saltu vigle al la ĉaro!

Ŝi prenis apud sin la malfeliĉajn orfojn kaj donis al ili manĝi el la ŝultrosako preparita el ĉevalidledo (malvarman bovid-rostaĵon kun ajlo kaj pogaĉon.) La du infanoj tute satiĝis kaj tuj ekdormis sur la skuiĝadanta ĉaro, brakumante unu la alian.

La bona sinjorino, kiu bedaŭris ilin, planadis plu enpense, ke ŝi plenedukos ilin nome de Dio, dum ili atingis la domojn de Debrecen. Dio forprenis ŝiajn proprajn infanojn kaj donis anstataŭ tiuj la du infanojn de Vereŝ. Estu sankta la volo de Dio.

En la maljuna turo eksonis la bele sonanta sonorilego de la urbo Debrecen, kvazaŭ ĝi dirus „amen” je ŝia plano porestanta, kaj dume la ĉaro enruliĝis en la Doboŝ – domejon. Ni estas hejme, – diris la onjo skuadante la knabojn.

– Kiel oni nomas vin, mia fileto? – demandis ŝi la pli junan.

– Mia nomo estas Paŭlĉjo.

– Via nomo estos de nun Ladislao. Ne forgesu! Kaj la via?

– Mi estas Francisko – respondis la pli aĝa.

– Vi estos Stefano. Hej, Doboŝ! Kie vi estas, Doboŝ? Kiel senorda vi estas? Kial vi ne venas antaŭ min?

La malfeliĉa oĉjo Doboŝ malrapide venis piedŝove maldiligenteme el la domo kiel urso.

– Nu, kial vi gapas? Ĉu vi ne vidas, ke mi kunportis infanojn?

– Kiajn infanojn? – li riskis timeme. – Ĉu senpagajn studentojn?

– Mi kunportis tiajn infanojn, kiuj ne havas patron kaj patrinon! Unu el ili estos Laĉjo, la alia Steĉjo.

– Nu, tio ĉi estas jam io! – kriis ĝojadante oĉjo Doboŝ kaj paŝante al la knaboj donis fingroklakon sur iliajn vertojn. – Ili havas tre malmolan kranion, estos saĝaj homoj!

La du malriĉegaj studentoj ĉi-maniere venis al onjo Doboŝ kaj ĉi tiel okazis, ke ĉe la domejo Doboŝ denove aŭdiĝis la neforgeseblaj karaj nomoj: „Hej, Laĉjo, Steĉjo, kie vi estas?” „Laĉjo, Steĉjo, venu tien ĉi!”

La sinjorino provizis la du infanojn per vestoj, kaj ĉiudimanĉe ŝi mem kombis ilin. Ŝi donis sekrete la pli bonajn manĝaĵojn al ili, kiujn ŝi deprenis de la pagantaj studentoj. Ŝi faris ĉion pro tio, ke dum la taga laboro ŝia granda tristo dormu, tion lulu pli bone la petolantaj infanoj kaj la nomoj Laĉjo, Steĉjo.



Kolegio de Debrecen – Gravuraĵo: Laŭ la foto de Gondy kaj Egey preparis Tivadar Dörre, 1882

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=035209>

3. Ĉapitro

Batalo en la grandarbaro

Ambaŭ knaboj atestis altiriĝon pri onjo Doboŝ. Ili estis bonaj, obeemaj, afablaj, sed iu melankolia malĝojo ĉiam videblis sur iliaj vizaĝoj, en iliaj okuloj, kiujn ili ne povis dispeli. Ĉefe la pli aĝa knabo Steĉjo estis malĝoja. Se li povis iri en flankan angulon, tiam li tuj ekploris.

Ankaŭ en la lernejo oni konis lin ĉi tiel, sed almenaŭ Steĉjo bone lernis apud sia malĝojo, sed Laĉjo ne kapablis akcepti la sciencon pro la malĝojo. Ĉiam li kaŭris en la lasta benko, sed tempe de interbatiĝoj li partoprenis kiel unua, kiam oni interbatiĝis kontraŭ la botistaj-metihelpistoj.

En la kolegio de Debrecen la nodbastono tiutempe enmodiĝis. Pli bone estis, se iu kapablis interbatiĝi, ol se iu kapablis diri la tutan verkon de Ovidius sen libro.

La interbatiĝanta studento havis grandan reputacion ankaŭ antaŭ la civila loĝantaro. Ankaŭ la altestimataj profesoroj fiere rigardis al la bona pugno. Ĉar la turkoj ne forkuros de tie ekaŭdante deklami la odon de Horacio, sed se oni bone dorsenbatadas ilin per la madzo, tiam ili certe tuj forfuĝos de tie ĉi.

Ankaŭ la altestimata sinjoro Marteno Szilágyi (siladji) de Piskárkos (piŝkarkoŝ), kiu kutimis diri: „Ĉiuj sciencoj validas nur ĝis la tombo, sed la matematiko ankaŭ trans tiu, ĉar se ekzistas transmonda vivo, tiam duoble du ankaŭ tie estas kvar”, do ankaŭ sinjoro Szilágyi farigis brodaĵon, kiel premion, per siaj filinoj. Magdalena kaj Estera brodis tion pro tio, ke okaze de la Grandarbara interbatiĝo, dimanĉe de Pentekosto, la plej brava studento ricevu la premion.

Tio tute ne estis ŝercaĵo! Ĉe tiu okazaĵo ĉeestas eguloj-etuloj de Debrecen. Ankaŭ sinjoro Gregorio Domokoŝ venis por rigardi tiun ĉi okazaĵon sur fama kvarĉevala kaleŝo de la urbo; sur la brido de la griza kondukila ĉevalo flirtis nigraj-verdaj-blankaj rubandoj. (Tiu estas la koloroj de la kolegio.) Por la senatoroj la ĉarpentistoj faris podion dum la antaŭa tage, sur kiu maldekstre la altestimataj sinjoroj sidas, rigardadas. Tie okupas lokojn ankaŭ elitaj damoj kaj fraŭlinoj.

El inter la studentoj nur tiu ne venas tien, kiu estas mortmalsana. Ĉi tie granda honto estas la foresto. Sed tiuj ĉi malbonegaj knabetoj partoprenas tiun okazaĵon tre bonaspekte en la sama uniformo.

Nome tiuj tiom samformas, ke de 1624 ĝi konsistas el unu talara nigra dolmano, kiun premas al la korpo larĝa rimeno kaj fergrafoj. Ĝi estas fantastika pro la verda drapomantelo kaj la pelta ĉapelo. Sed ĝi tamen ne estas sama ĉiuokaze, ĉar la vestaĵo-staton determinas ĝia drapo kaj la „kapro”. Nome pli bela estas tiu vestaĵo, kiun la fama Gasparo Kartoŝ kudras, ol tiu, kiun Johano Koĵehuba fuŝe kungluas.

Ili ambaŭ vestis la loĝantojn de Debrecen. Tio estas evidenta atesto, ke ankaŭ la vestaĵo estis pli forta en la malnova bona mondo, ol nun.

Sur iu malgranda tablo, kiu estas antaŭ la altestimataj sinjoroj, estas premiaĵoj: manlaboraĵoj de Estera kaj Magdalena, iuj bagatelaĵoj: kroĉetita silkomonujo, sur ĝi eta ŝtalringo, aŭ vizitkarto al la biblioteko kun sur ĝi koloraj perloj kudritaj per orfadenoj. Sed tiuj aĵoj estas valoraj pro tio, ke tiujn transdonas la filino de la plej fama profesoro.

La akiro de tiu premiaĵo estas la plej brila sonĝo de la studentoj, kiun la studentoj povas atingi. Granda vikleco, svarmado revigligas la grandan placon. Ankaŭ la sinjorinoj donantaj manĝaĵojn el tiu ĉi okazo kutimis elveni por kuiri la postbatalajn festenajn manĝaĵojn sur subĉielaj fajrejoj en kaldronoj. La glugloj de la pretiĝantaj manĝaĵoj iĝas oreflata melodio ĉirkaŭ la fajrejoj. La vento ŝiradas la fumon en bluan rubandon kaj kunportas petole inter la

branĉaroj de la arboj. Kune kun la fumo ĝi kunportas la manĝaĵodoron kiun ĝi intermiksas kun laodoro de la arbaraj floroj. Tio estas granda konfuzo por la ĉi tie vagantaj abeloj.

Inter la vazoj estas etaj bareloj, en kiuj estas ankaŭ la loka specialaĵo: la ĝojiga, eĉ tiutempe ne tute fermentita acida vino, kies vingustumado igos la homon ekmoviĝi. Tiun senton ili nomis ŝerce tiel, ke ĝi igis tiklosentema la plandon de la homo. Ja fine de la grandarbara batalo ĉiam komenciĝas danco.

La lukto okazas tiel, ke la du plej maljunaĝaj studentoj elektas grupon el inter la studentoj. La unua grupo estas la „hungara”, la alia la „turka”. (Kelfoje la turkojn oni nomas germanoj.) Oni ĵetas supren unu moneron, se ties „Virgulino Maria-flanko” (ne la unua flanko) estos malsupre, tiam unue la turko elektas iun fraŭlon, poste la hungara. Denove oni suprenĵetas la moneron tiom foje, ĝis eblas elekti studenton. Nature ĉiam la fortfamaj interbatiĝantoj estas la pli serĉataj kaj nur plej lastfoje oni elektas la malfortikajn, magrajn, dormemajn studentojn. Tiuj estas bonaj almenaŭ por tio, ke ili restadu en la ĉirkaŭaĵoj de la interbatiĝantoj (por esti sub la piedoj – estas dirate), malhelpante la heroojn, por stumbligi ilin, ke ili falu.

Kiam la du teamoj jam staras prete sentolereme senbride kaj ekscitite de batala febro, la ĉefjuĝisto, ŝatante similajn noblajn interbatiĝojn, signas per sia ostobutona bastoneto trifoje, post kio ambaŭ teamoj kuregas unu kontraŭ alia kun granda bruoj kaj kun terura antaŭeniĝo. (Nature ili uzis por ĉi ludo nur siajn pugnojn.)

Plezuro estas rigardi, kiam la du teamoj intermiksiĝas, ekluktas, interbrakumas, unu la alian puŝrenversas, surterenpremas prezentante praan batalon, – ĝis iu teamo: aŭ la turka aŭ la hungara forkuras inter la ridegaĉo de la maljunuloj. Post tio komenciĝas la batalo inter la membroj de la venkinta teamo, kiu nature ĉiujare okazas same.

La sinjoro ĉefjuĝisto turnis sin al la kolektiĝantaj venkantoj:

– Vi estas bravaj infanoj, vi bone kondutis, sed nun jam ni vidu, kiu estas la plej forta inter vi? – Tiu paŝu antaŭen! Se inter la venkantoj ĉeestas la pasintjara plej – fortulo, tiam tiu paŝas al la podio. Sed se tiu ne ĉeestas, tiuokaze tiu paŝas al la podio, kiu sentas sin la plej forta. Sed ĉi-jare la pleja fortulo de la pasintjaro, Nikolao Beke, ĉeestis, kaj li paŝis al la podio. Li estis granda, alta knabo, sur liaj pugnoj dikaj arterioj videblis, lia ĉemizo disŝiriĝis sur sia brusto pro la hodiaŭa luktado. Lia kolo similis al tiu de taŭro, kiu estis tro dika ankaŭ urboskale de Debrecen.

– De kie vi devenas, mia amiko? – demandis la sinjoro ĉefjuĝisto.

– Mi devenas el Kaba.

– Ho, – flustris la ĉefjuĝisto en la orelon de la konsilanto Kristoforo Lázár, – certe tiu sinjorino de Kaba estas lia patrino. Ĉi tio estis aludo je la ruĝa nazo de Nikolao Beke. Poste diris laŭte la elita sinjoro:

– Certe multe da pluvoj estis tie, kie tiom fortaj homoj estas kia vi, sed ni vidu, ĉu ankaŭ aliloke formiĝis simile malmolaj homoj dum la pasinta jaro?

– Mi ne timas tiun – notis Beke gaskone, kaj li arogante ĉirkaŭrigardis. – Nu, ĉu estas iu, kiu havas ŝaton por interbatiĝi kun mi?

Iĝis granda silento. La multaj gloravidaj studentoj rigardis unu al alia, sed sur ĉiujn vizaĝojn estis surskribite: Kiu volus interbatiĝi kontraŭ giganto?

– Ĉu estas neniu? – demandis la ĉefjuĝisto kun instiganta rigardo.

Post la demando kvazaŭ iu erinaco ruliĝus, aperis el inter la aliaj unu diktrunka, malaltstatura knabo:

– Mi ekprovas.

De la surprizo la ĉeestantoj konsterniĝis, kion sekvis tuj primoka subridaĉo. Sinjoro Beke subtakse fermis unu okulon kaj malfermegis la buŝon.

– Ho, mi ekmanĝas, vin, malfortikuleto!

Li estas studento de la geedzoj Doboŝ! – anoncis la antaŭe starantoj al la pli malproksime starantoj, kiuj la gravan scenon ne povis vidi.

– La pli aĝa almoze tenata studento! – ripetis ankaŭ aliaj kaj aldiris: – Ho, ĉi tio estas senprecedenca afero!

Oni vidu, jen kia eventaĉo! Kiom fortigis lin la bona manĝaĵo! – kriis sinjoro Andreo Garaŝ, la butonfaristo, kiu estis granda malamiko de sinjoro Johano Bujdoŝo.



Iamaj studentoj en Debrecen – Gravuraĵo – gazetdetalo, 1872

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=50336>

4. Ĉapitro

Vi neniam povos havi glavon

La membroj de la familio Bujdoŝo subite kolektiĝis de ĉiu direkto por ekgrumbli kaj ekindigni: Li estas la impertinenta infaneto! Oni devus forpeli lin de tie. Ĉu li volas venki kontraŭ nia studento? Ankaŭ Marteno Szilágyi de Piskáros¹⁴ alparolis:

– Ho, ja ĉi tiu estas la krevinta rano el la fabelo de Fedro¹⁵!

Tiutempe oni nomis la ranon studentolingve „rána” kaj tion ĉiuj komprenis; nun jam oni nomas la bestojn hungare kaj neniuj komprenas pli fruan nomon. Ĉar kiu povas scii, ke la nomo de la virapro estas „en koto ruliĝanta”, la ĝirafino estas la „longkola,” la cervo estas „Ekspreso de bosko”, kaj la rano estas la „rampanto?”

Vere, la luktanto estis senpaga studento de la geedzoj Doboŝ, Steĉjo Vereŝ, kiu etendiĝis al la giganta Beke nur ĝis lia kolo. Kio okazos pri la mondo, se pasero atakas falkon? La „kantogvidanto”, kiu cetere estas benita de trezoroj en sia gorĝo, malrespektis la korpan forton, nun prenis fajfilon kaj enblovis en ĝin ... Tio estis la signo por komenci la interbatiĝon. Ĝuste tiel okazis, kiel iam en Buda okazis la turniroj, kiam la hungaraj reĝoj loĝis en Hungarujo.

Beke metis sian manon sur la kokson, kvazaŭ tiu estus superflua kaj nur per unu mano kaptis la ŝultron de Steĉjo Vereŝ por ke li knariĝu ties klaviklon kaj tiel levu alten sian kontraŭulon kaj de tie lerte ĵetu tiun surteren.

– La malfeliĉa infano iĝos ŝmiraĵo kaj disfluos sur la tero. Je Dio, onĵo Doboŝ kolektos lin per kulereto – pensis kiuj vidis ilin.

Sed ankaŭ Steĉjo ne estis pigra ... hop, li saltis al Beke kaj tre rapide ĉirkaŭ lian korpon plektiĝis kiel serpento. Per sia piedo li plektis la piedon de Beke, per siaj manoj plektis lian kolon, dume Beke ege forte frapis sur la bruston de Steĉjo, kiu komencis subite vertiĝi kaj la bluaj ringoj de liaj okuloj turniĝis al interno. Sed Steĉjo ne siblis, nur liaj brakoj delasis unu momenton la kolon de la giganto.

Eluzante tiun ĉi momenton Beke puŝjetis lin, kiu pro tio ŝanceliĝis kaj preskaŭ defalis, sed feliĉe estis tie iu arbo, kiu ne lasis lin defali. Lia kapo forte alpuŝiĝis al la trunko de la arbo, sed simile al pilko li resaltis lerte, kaj kiel lerta jaguaro li denove ekkaptis tiun. Ili komencis lukti interplektiĝinte.

Majesta vidindaĵo estis por la Debrecen-anoj. La du luktantoj ŝajnis kiel unusola senforma korpo kun kvar manoj, freneze turbiĝadante kiel haspelo de la diablo. La rigardantoj atentis la lukton kun retenata spiro.

– Diable! – kriis la ĉefjuĝisto dum la suferige solena silento. La ŝvito fluetis sur lia frunto pro la grava interesiĝo.

– Rap! Rap!

Foje la unua, aliafoje la alia provis fari krur-falĉon; la ruzaj artifikoj, kiuj estas la arto de la interbatiĝo, nun estis vanaj. Ambaŭ bone konis kaj aplikis tiujn. La brako de la almoze tenata studento similis al fero-bendo.

– Premu, Premu, mia filo, Steĉjo! – kriegis iu voĉo simila al la tondro el la alto.

Ĉiuj rigardis tien. Oĉjo Doboŝ sidis sur la arbo super ilia kapo, alkrôcante sin al du branĉoj. Beke teruriĝis, ĉar tiu voĉo konfuzis lin. Li kredis, ke la voĉo venas el la ĉielo... kaj li nevolante rigardis supren dum li delasis la kontraŭulon. Tio ĉi estis lia turnirperdo, ĉar Steĉjo facile ĵetis sin tra la giganto kaj puŝpikis lian dorson per siaj pateloj; kiu movo estas unu el la

¹⁴ La nomo elparolendas: siladji de piŝkaroŝ

¹⁵ Fedro estis trakdevena fabloverkisto en la antikva epoko:
[https://eo.wikipedia.org/wiki/Fedro_\(fablisto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Fedro_(fablisto))

plej bonaj artifikoj (laŭ la debrecenanoj: „kaprokazeo.”). Efike de tio la fortulo ekkriegis kaj sterniĝis en la polvo.

– Vivu! Vivu! – stentoris centkelkaj gorĝoj. – Vivu la almoza studento!

Steĉjo saltis al Beke kaj surgenuis, per du manoj premis lin al la tero por ke tiu ne estu kapabla pene surpiediĝi. La homamaso rompis la kordonon kaj ektiminte brue antaŭeniĝis al la loko de la lukto. Oĉjo Doboŝ desaltis kunĝoje de la arbo, sed malfeliĉe li falis surdorsen, pro kio rompiĝis la maldekstra ripo lia. Sed spite de la doloro kaj vekrio li ne forgesis krei al Steĉjo:

– Tretu, mia filo, ne delasu lin, sed lasu lin manĝi iometon da sablo! Tio ne multe pli malbonas, ol la manĝaĵo de la familio-Bujdoŝo!

– Delasu min! – stentoris Beke – Diablo disbatiĝos kun vi plu.

– Sufiĉis! – diris la tien alvenanta ĉefjuĝisto – la pasintjara fortulo taŭgas nur por pintigi avenon.¹⁶

Denove iĝis granda vivuado. La fama lerneja ĥoro ekkantis la „nodbastonokanton”, kies refrenvicoj ĉiam estis:

– *Pli brava fraŭlo estas Davido ol Goliato,*

– *Vivu, vivu, vivu!*

La ĉefjuĝisto solene manpremis kun la venkanto, onjo Doboŝ kortuŝiĝinte larmiĝinte kuris kaj al la knabo kaj al la kaldronoj por miksi la gulaŝsupon.

Sed la plej bela programero nur nun sekvis. Iu belega fraŭlino antaŭenpaŝis, laŭnome Magdalena Szilágyi, kiu portis de kapo ĝis piedo festan robon kaj portis, honteme rigardante malsupren, al la venkanto faritan premiaĵon. La ĉi-jara premio estis glavofiksilo, kiu estis belega manlaboraĵo: etaj leonoj broditaj sur marokenon per fajnaj orfadenoj.

La vizaĝo de la fraŭlino Magda iĝis tia, kiel lilio trempita en sangon, dume ŝi balbutadis tiujn kelkajn vortojn, kiujn ŝia patro instruis hejme al ŝi, ĉar tiuj sonis ege laŭ maniero de profesoro:

– Estu estimo por la korpa forto, ĉar ankaŭ la forta animo serĉas la fortan korpon kiel loĝlokon. Via glavo pendu kun gloro sur ĉi tiu glavofiksilo. Senkaŭze ne eliru tiun el la glavingo kaj senhonore ne metu tiun en la glavingon.

La junulo staris gloriĝinte kaj tiel ŝajnis al li la voĉo de la fraŭlino dum ŝia direndo, kvazaŭ ĝi estus muziko de la sferoj: voĉbruo de la publiko kaj la voĉo de la fraŭlino kune iĝis agrabla zumado, kiu varme tiklis kaj ŝveligis lian koron.

La ĉielo – kvankam videblis kelkaj ĉifonaĵaj nuboj – tiel ŝajnis, ke ĝi ridetis tutpompe, dume ĝi kuris kaj ĉiuj arbofolioj de la granda arbaro de Debrecen ridetante gestadis nun al li. Ĉiam la unua guto de la gloro estas la plej dolĉa. La animon de la almoza studento tiu unu guto tute plenigis.

Oĉjo Doboŝ iĝis gajega, pro kio li sian ĉapelon ĵetadis supren al la ĉielo, li ĉirkaŭbrakumis siajn konatulojn kaj konstante provpenadis, kvankam neniu lin refutadis:

– Kiu ajn kion ajn diras, la korpa manĝaĵo estas grava afero. Tiu faras la plej grandajn miraklojn. La bona manĝaĵo faras ĉion. Ej, kien iris subite la familio Bujdoŝo? Ja tiuj treege silente foriĝis de tie.

La atestimataj sinjoroj iris al Steĉjo Vereŝ (li iĝis dum unu kaj duonhoro bela knabo danke al la ĝojo) kaj manpremis kun li, sed lia alia mano ankoraŭ tremetis, en kiu li tenis la glavofiksilon.

¹⁶ Pintigi avelon estas hungra onidiro, havanta veran signifon, ja la avelo estas tiel rikoltata, ke oni tranĉas nur ĝiajn spikojn.

La altestimataj sinjoroj unu post alia rigardadis la belan memoraĵon kaj tie okulo al okulo laŭdis sinjoron Martenon Szilágyi, ĉar lia filino havas perfektan kapablon kudri. Ĉi tiu estas tre tre belega manlaboraĵo. La junulo ankaŭ dum sia maljunaĝo rigardados ĝin kunĝoje.

– Ege bedaŭrinde estas – notis la altestimata sinjoro Boglányi (bedaŭrinde estas plie tio, ke li alparolis), – vere estas ege bedaŭrinde, ke li neniam povos porti tiun.

– Ĉu li ne povas porti tiun? – demandis mirante la ĉefjuĝisto. – Kial li ne povus porti tiun?

– Ĉar nenobelo ne rajtas porti glavon. Do, li ne bezonas la glavofiksilon.

Steĉjo paliĝis. Kvazaŭ iu malvarma spiro forblovus tiun feinkastelon, kiun lia animo konstruis ĵus. En tiun unuan dolĉan guton de la gloro, nun unu venenero enfalis, kiu apartenis al ĝi. Li sentis, kvazaŭ ĉiuj rigardus lin enviante la venkanton, tamen bedaŭrante kaj primokante lin. Ja, li estas filo de nenobelo, li estas nur almoza studento.

Ankaŭ la belega Magdalena Szilágyi fikse rigardis liajn okulojn bedaŭrante, kvazaŭ ŝi imitus sinjoron profesoron Boglányi, ĉar en la okuloj de Magdalena estis pentritaj samaj pensoj: „Ege bedaŭrinde estas, ke li neniam povas porti la glavfiksilon.”

Muziko eksonis laŭte (la fama bando de Ĉomornyó muzikis plenforte), de la granda placo la interbatiĝintoj foriris kaj la ĉirkaŭbrakumantoj plenigis tiun; junuloj, fraŭlinoj komencis danci lerte, antaŭen postpaŝaĉis iom post iom ankaŭ trupanoj de la malvenkita trupo.

Ĉiuj ĝojis, gajis, nur la venkinto ne. Tre pikis lin tiu dorno... Li foriris en tiun parton de la arbaro, kie neniŭ vidis lin, kie ĉeestis nur la naturo, kie la birdoj gaje saltadis de branĉo al branĉo kaj libere laŭ siaj ŝatoj pepetis. Inter tiuj estis ĉiaspecaj birdoj: pigo, turdo, nizo kaj fringo. Kelkaj havis pli belajn plumojn, ol la aliaj, – sed ne eblis rimarki tion, ke unuj malrespektus la aliajn.

„Mi ne estas nobelo” – li ĝemetis neniĝinte. – „Kial mi ne estas tio?” – li demandis meditante.

La herboj, arbaroj gapis lin malserene, sed ne klarigis al li la demandon.

5. Ĉapitro

Kiu heredos la vendejon?

Steĉjon ne lasis la penso trankviliĝi, ke li iĝu nobelo. Pri tio ĉi li meditis tuttage kaj pri tio revadis nokte. En la grandarbaro de Debrecen kiam oni humiligis lin tre forte, pro tio, ĉiuj nobeloj ŝajnis antaŭ li, kiel plej superaj altrangaj estaĵoj.

Ĉiuj infanoj kaj junuloj havas siajn proprajn brilajn sopirojn, sed tiuj estas luksaj, aŭ malluksaj; aŭ ili volas esti reĝoj en iu feinlando, kie estas muzikanta orarbaro kaj fluanta arĝento fluete anstataŭ akvo; aŭ pli simple povus kontentigi ilin novaj spronoj, aŭ sagujo. Kiu povus pensi pri nobeleco dum la junaĝo? Ja tio ne lasis trankvili la riĉan ledokomerciston kaj la tendaran komerciston, dirantajn: „ja ankaŭ mi povus esti sinjoro, se la reĝo volus tion.” Sed filo de alia homo iĝos plenkreskulo en tiu die paca konscio, ke ĉio estas bona tiel, kiel estas, la potenco kaj la rango devenas de Dio. La ambicion de la pli aĝa frato iom post iom havis ankaŭ la pli juna, kiu terure sopiris, ke li estu nobelo.

– Vidu, ke oni ne estus batmortiginta nian paĉjon, se li estus nobelo. Ni havus pli bonan sorton, ol nun. Rigardu Miĉjon Gencsy¹⁷, aŭ Gabrielon Szentpályi¹⁸, niajn samklasanojn. Dio donis al mi kaj al vi pli fortajn pugnojn, ol la iliaj, tamen ili estas pli potencaj, ol ni.

La gajnita glavofiksilo pendis ĉiam super la lito de Steĉjo. Ĝi estis danĝera triumfa signo. Ĝi flustradis al li ĉi tiujn ekstravagancojn, kiuj aliformis ankaŭ la pensadon de Laĉjo.

– Jen, ĝi estas ĉi tie, kaj mi neniam povas porti, alia homo ne vendus tiun por la tuta trezoro de l' mondo, sed por mi ĝi estas senvalora. Ĉu mi prenu librojn por konsoliĝi? Kial? Ankaŭ la scienco nur por la nobeloj estas ornamo, por ni nur estas pano por vivi.

La brava oĉjo Doboŝ devis ĉesigi siajn ĝis ĉi-tiamajn vesperajn paroladojn. Por la knaboj jam ne estis sufiĉe interesa temo, kiamaniere promenis la studentoj de Sárospatak¹⁹ en sia malvasta ĉelo (mi kuraĝusdiri, ke en Sárospatak oni diras studenton de Debrecen), aŭ kiamaniere sonas la sonorilejoj de la diversaj konfesioj. La luterana sonorilo tion tiktakas: „Nek ĉi tien, nek tien.” Tiu de papisto: „Jesuo Maria, Jesuo Maria”. Kaj interparolas la reformacia: „Dio donis, kreis.” Oĉjo Doboŝ bone sciis prezenti arome ankaŭ la „Malmultiĝas la studentoj” – titolan historion, kiun aŭskultante eĉ ankaŭ la mortinto povus reviviĝi pro la ridemo. Sed ĉi tiuj, revojn pelantaj knaboj, aŭskultis tiel, kvazaŭ fluintus sango de iliaj nazoj. Sed iliaj okuloj brilis, kiam oĉjo Doboŝ rakontis la historion de Paŭlĉjo Kinizsi²⁰, kiu estis muelista helpmetiisto kaj iĝis militestro, aŭ la historion de amiko Georgeto, kiu estis fornohejtisto kaj iĝis scienculo de la reĝido. Oĉjo Doboŝ ne multe almensogis al la historioj.

Laĉjo, estis frivola bubo kaj se li ne vidis sian pli aĝan fraton, ne estis tro ambicia. Kelkfoje li ludis, amuziĝis sinforgese kaj estis kapabla esti feliĉa. Estas vere, ke lia koro estis tiom mola, kiel vakso. Nome ĝi tuj kunpremiĝis, se lia pli aĝa frato estis malĝoja. Tiukaze li instigis sian fantazon, konkuri kun la frata, kiel oni stimulas maldiligentan ĉevalon apud senbrida ĉevalido. Pasis la jaroj kaj super la lipoj de la du orfaj knaboj la lipharoj komencis kreskadi.

– Baldaŭ vi estos homoj, infanoj – diradis onjo Doboŝ, kiu forte ŝatis siajn filojn.

Kaj la bona sinjorino serioze komencis pensadi pri ilia sorto, ĉefe pri la sorto de Steĉjo. Post unu jaro ĉio estos en lia kapo, kion en Debrecen la profesoroj povas instrui al ili. Do, ŝi

¹⁷ La familionomon bv. elparoli: genĉi.

¹⁸ La familionomon Szentpály bv. elparoli: sentpali.

¹⁹ La loknomo elparolendas: ŝaroŝpatak. Pri ĝi: <https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1rospatak>

²⁰ Temas pri la militestro Kinizsi Pál (paŭlo kiniĵi). Pri li abunde ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Pa%C5%ADlo_Kinizsi

devas zorgi iel pri lia kapo. Li estas saĝa, klerigita knabo, la profesoroj ne povas sufiĉe laŭdi lin kaj la belajn literojn de lia skribaĵo ili admiras. Ankaŭ lastfoje li devis kopii la gratulan skribaĵon, kiun la Kolegio sendis okaze de la nomtago de la palatino.

Post multe da cerbumadoj onjo Doboŝ tiel decidis, ke al Steĉjo estus taŭga esti kantoro en iu bona vilaĝo. Unuparte li povus instrui la lertan skribon al siaj disĉiploj. Aliparte ankaŭ lia sono estas agrabla, pro kio li povus kanti ĉe orgenludo, eĉ li povus kanti dum la enterigo la funebran kanton. Vera plezuro povus esti morti en lia vilaĝo. Kio koncernas Laĉjon, li ne taŭgas por scienculo. Post la lernojaroj li estu buĉisto. Tiuokaze li povus heredi la vendejon. Laĉjo ne bedaŭris tion, sed Steĉjo skuis la kapon malĝoje. Povas esti, ke ankaŭ nun li pensis pri la fama bravulo Brunsvik²¹, kiu eliris en la mondon vastan kune kun sia terura glavo por serĉi novan blazonon: ĝis la foriro li estis grifo, sed volis esti leono. Li perfekte komprenis la bravulon Brunsvik.

– Ne skuu vian kapon – persvadis lin oĉjo Doboŝ – la vivo de la kantoro estas belega. La kantoroj ŝatas vinon. La kantorojn la homoj ŝatas. Jen, inter la reĝo Matiaso kaj la majstro de Cinkota estis tre bona amikeco! Sed la vino de Cinkota tute ne tiklis la ambicion de Steĉjo. Li minacis la geedzojn – Doboŝ, ke li prefere dronigas sin, aŭ desaltas de la turo.

– Kio vi volas esti, mia dolĉa filo? – demandis ame onjo Doboŝ. – Ja mi nenion devigas al vi, mi ne neos la deziron de via koro kaj mi helpas al vi por iĝi tiu.

Steĉjo ruĝiĝis kaj liaj okuloj febre brilis.

– Unue mi volas esti nobelo. Poste mi diras la aliajn dezirojn.

Onjo Doboŝ kunfrapis la manojn pro timo.

– Ho, ve, mia filo, nur de la reĝo vi povas fariĝi tio!

– Nu, do, mi iros al la reĝo!

– Ho! Ho, malfeliĉa knabo! Kie vi akiris ĉi tiun malmoderan ambicion? Kiu instruis al vi ĉi tiun vantadon? Ĉu vi iras al la reĝo? Eligu el la kapo ĉi tiun penson. Ĉu vi pensas, ke vi devas salti nur, surmeti rimensuojn fabelajn kaj diri: „Jen nun, jen tuj, mi estu kie la reĝo estas!” Unue mi diras ke mi ne kredas la ekziston de la reĝo, ĉar mi lin neniam vidis. Oni diras, ke tiu loĝas en Vieno. Kaj mi diras, ke la urbo Vieno ne ekzistas en Hungarujo.

Kvankam ĉi tia parolo mo estis tiutempe la lernejo por tiu, kiu ne estis nobelo. Infere estis ellerni, ke Dio kreis la homojn al si mem similaj, samformaj kaj donis al ili samforman animon, aŭdon, vidon, senton kaj la homoj diversigis sin: unu homo iĝis etreĝo, la alia pario. Li sentis tion ĉiu paŝe. Kaj krome li devis vidi ofte ĉe la geedzoj Doboŝ la murdiston de sia patro, Krucsay-n, pri kiu lia malamo plifortiĝis, ju pli li viĝis pli aĝa. Kiam ajn Krucsay venis al la domo, tiu tago iĝis tago de malĝojo kaj por li kaj por la geedzoj Doboŝ. Senespere li venis kaj iris kaj la onjo enŝlosiĝis en sian ĉambron kaj ploris.

Tiuokaze Steĉjo kunpremis siajn pugnoj, ho, se almenaŭ unu fojon en sia vivo kiel viro kun viro li povus prirespondigi tiun!

– Kial tiu iradas ĉi tien? Kion tiu volas? Kial tiu malĝojigas ĉi tiujn bonajn homojn?

Tio ne longe restis sekreto. Geedzoj Doboŝ estis ties ŝuldantoj. La onjo dum multe da jaroj aĉetis la porkojn je kredito. La kredito kreskadis al altkvanto da mono kaj plu ili ne estis kapablaj pagi la ŝuldon. Dum iu malĝoja tago en la korto sonis la tamburtakto kaj la geedzoj Doboŝ ne devis cerbumadi plu, kiu havos la viandovendejon.

Ili jam nur pro tio veetis, kio okazos pri la studentoj? Ilia tuta havaĵo perdiĝis (domaj mebloj, bieno en la urbolimo). Ili iĝis malriĉaj kiel preĝeja muso. Ili pensis eĉ nun ne pri si mem, sed pri la du malriĉegaj studentoj, kiuj perdiĝos en la vivo, el ili ne estos gravaj homoj.

²¹ La nomo Brunsvik elparolendas. brunsvik.

La bofrato de sinjorino Doboŝ estis Johano Vőneki, kies edzino Marta, sinjorino Johano Vőneki, loĝis en Szeged²². La bofrato havis multnombrajn barkojn kaj flosojn, kiuj trafikis sur la rivero Tibisko. La bofrato estis unu el la plej riĉaj lignokomercistoj. Tiu promesis, ke li dungos sinjoron Doboŝ, la onjo iel vegetos manĝante panon de kompato. Ja, ĝia gusto estas amara, sed se Dio volis ĉi tiel, tiam estu Lia volo! Granda lamentado – ploregado okazis, kiam ili devis disiĝi:

– Mi ŝatus kunporti vin – ploregis sinjorino Doboŝ premante la du knabojn spasme al si – sed ankaŭ mi iras al fremda loko. Mi ne scias, kian sorton mi havos! La ĉaro jam estis ĉe la pordego. Oĉjo Doboŝ sola portis la malpezan pakaĵon kaj metis en la ĉarkradon. Por la eta pakaĵo estis loko abunde, sed en tiu pakaĵo estis ilia tuta havaĵo.

Poste oĉjo Doboŝ reiris al la domo kaj kore brakumadis la knabojn, dum lia griza barbo iĝis malseka.

– Bona estas la Dio, bonon donos – diris li emociante. – Dio eĉ povus permesi al ni renkontiĝi iam. Estu bonaj kaj honestaj. Mi estis ĉe la direktoro kaj aranĝis, ke vi ricevu manĝaĵojn de la kuirejo de la malriĉuloj kaj estos ankaŭ loĝejo por vi en la kolegio. Sed li promesis al mi, – interparolis sinjorino Doboŝ –, ke somere la direktoro sendos Steĉjon al vilaĝoj por prediki, dume li povas akiri monon. Nu, venu ĉi tien por ke mi kisu vin lastan fojon!

Poste ankoraŭfoje ŝi karesis ilian hararon, forviŝadis per sia tuko iliajn larmojn falintajn, fluantajn kiel torento.

– Ho, kiom bona estas la Dio – ŝi kriis doloreme, – ke Li forprenis miajn proprajn infanojn!

La knaboj ne kapablis paroli pro la granda doloro pleniginta iliajn korojn. Ili lasis mute, ke kaj la oĉjo kaj la onjo brakumadu ilin, parolu al ili kaj malĝojiĝe kaj konsolante. Ili aŭdis nenion el ilia parolo. La tuta mondo iĝis granda kaoso por la malriĉegaj studentoj.

²² La loknomo bv. eldiri seged. Pri ĝi bv. legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Szeged>

6. Ĉapitro

La hundoj blanka kaj nigra

Iu magra, variolon havanta figuro atentigis la ene estanton rigardante en la ĉambregon:

- Ekiru nun, juna sinjorineto, ĉar la vojaĝo daŭros longe.
- Tuj, sinjoro Pizsera²³.

La atentiganto estis la fama oĉjo Piĵera, la „liveranto de la malriĉuloj”, kiu pro veto estas bonfarema, senpage liveris la homojn, se tiu havis ŝaton. Tiu havis du ĉevalaĉojn, laŭnome Beta kaj Feĉke,²⁴ sur kiu la studentoj faris la unuan ekskurson al la Helikono. Nome antaŭlonge estis kutimo, ke oni komencis akriĝi la menson pri la versaĵfarada metio sur ĉi tiuj pacemaj bestoj. Kelkaj ĉi tiaj versaĵoj estis konservitaj por la posteularo ĝis nun. Jen unu:

*La fiero Beta
de oĉjo Pizsera
kaj la svelta Feĉke
tridek avengrajnojn
manĝis nur vespere.*

Oĉjo Pizsera (piĵera) estis ekster si pro kolero, kiam similan versaĵon oni kriis antaŭ lia domo: „Hej, fulmotondro! Mordu vin l’ hundo! – kriadis li.

– Nu, naŭ hundidoj mordu viajn gorgojn.” Oĉjo Pizsera liveris la geedzojn Doboŝ al Szeged kaj ankaŭ nun ŝajnis, ke la ĉevaloj estas senpaciencaj. Sed ili ne estis senpaciencaj, ne konante tiun senton, ĉar ili ĝojis – la malfeliĉaj, – ke ili vivas. Sed oĉjo Piĵera ege ŝatis siajn noblajn ĉevalojn, li fieris pri tiuj, ĉar li ankaŭ fanfaronis, dirante, ke tiuj faris pli multe da bono, ol iu episkopo. Pro la urĝado de Piĵera, sinjorino Doboŝ delasis la knabojn.

– Ne forgesu nin. Pensu pri mi. – petis ŝi sufokiĝadante pro la ploro kaj kuris tra la korto al la ĉaro.

La knaboj postkuris ilin.

– Ho, nia patrino! – kriis Steĉjo kortuŝe. – Ne forlasu nin!

– Nu! – trankviligis tiujn oĉjo Doboŝ ŝajnigante gajan voĉon. – Al diablo! Pensu pri ĝi, ke ni ĉiuj estos baldaŭ viroj (la oĉjo klasis sin inter la infanojn, kvankam li malfacile estos viro iam.)

Bonaj konatoj de la geedzoj Doboŝ jam tie estis ĉe la ĉaro por diri al ili ankoraŭ fojon: „Dio estu kun vi!”: la geedzoj Perecz, la najbaro, sinjorino Birli el la strato Csapó²⁵, multe da tiamaj studentoj, kiuj ĉe la onjo manĝis, kaj ankaŭ la malamikoj venis tien ĉi: sinjorino Bujdoŝo ploretis kaj rekonis ĉe la adiaŭo, ke inter la sinjorinoj onjo Doboŝ estis la reĝino, ĉar ŝia kulinara arto superis la aliajn. Sinjorino Doboŝ pli volonte akceptintus ĉi tiujn laŭdajn vortojn antaŭlonge, sed nun ŝi nur ploris.

– Dio benu vin onjo!

– Dio benu vin baptanino! – salutis ŝin ĉiuj. – Estu feliĉa! Estu bonŝanca!

Ankaŭ oĉjo Piĵera emociiĝis kaj tiris al siaj okuloj la ĉapelon, per la vipo iomete instigante la sveltan Feĉke kaj la fieran Beta. Efike de tio la du pacemaj ĉevaloj ekiris sen emo.

Sinjorino Doboŝ lastfoje surrigardis la ĉirkaŭstarantojn kaj la domon kaj kvazaŭ larmoj fluetus el la fermitaj okuloj de la porko havanta ruĝan inteston laŭ la pentrita bildo sur la butikpordo. Lastfoje ŝi ekvidis la fermitajn persienojn, la blankan kamentubon sur la

²³ La familionomon bv. elparolu: piĵera.

²⁴ La originala hungara nomo estas Fecske, ĝia signifo estas: hirundo.

²⁵ La stratonomon bv. elparoli: ĉapo.

tegmento. Poste plu ŝi nenion vidis, ĉar ŝi sinkis en la brakojn de oĉjo Doboŝ, senkonscie. Dume ili forlasis la urbon, en la libera kampo la milda venteto karesis ŝian vizaĝon kaj ŝi lastfoje vidis sian hejmurbon.

Ŝi vidas rerigardinte, ke la du filoj Vereŝ postkuras ilin.

– Haltu, sinjoro Piĵera! Ho ve, kion mi parolas? ... Mi jam perdis mian menson! Ni iru pli rapidege, ĉar se nin postatingus miaj infanoj, tiam tuj mia koro fendiĝus pro la malĝojo... Ne bedaŭru, mia sinjoro, la vipon, se vi konas, Dion. – petegis sinjorino Doboŝ.

– Ĉu vipon? Ĉu por tiuj ĉi? – li koleretis ofendiĝeme. – Eble neniuj estas freneza por ligi bridon al la drako.

Tamen li surbategis per la vipo sur la du grifojn, kiuj vere rapide ekiris kurante. La sabla vojo de Debrecen polviĝis. De la polvo ili ne vidis la studentojn kaj la studentoj ankaŭ ne vidis la ĉaron. Laĉjo laciĝis pli baldaŭ.

– Kien ni kuregu plu? Jam ni ne postatingas la ĉaron. Ni iru reen.

Steĉjo haltis kaj pripensante, anhelante diris:

– Kial ni reiru? Ni iru prefere plu tien, kien niaj okuloj montras. Iu sekreta sento flustras al mi, ke ni ektrivos la feliĉon.

– Ĉu vi diras, ke ni reiros iam al Debrecen kiel nobeloj?

– Unue ni devas iri al Szeged – flustris Steĉjo. – Se mi iĝus nobelo, mi serĉus la onjon por helpi al ŝi. Poste mi serĉus Krucsay-n por prirespondigi. Nur poste mi povas iri al Debrecen.

Kiam li menciis la onjon, malĝoja karesemo videblis sur lia vizaĝo. Ĉe la nomo Krucsay li sentis venĝemon. Kaj fine li ruĝiĝis, ĉar li pensis pri tio, ke poste ili povos reveni al Debrecen. La belega glavofiksilo estis en poŝo de lia togo bele enpakita. Tiun li kunportas kaj dum la reveno ligos ĝin ĉirkaŭ sian talion por vidi, kiu donis ĝin, sed jam tiam glavo pendos sur ĝi. ...

– Nu, mi ne bedaŭras – respondis la pli juna frato, – ni iru post la feliĉo.

Ili ekiris nur senplane, la unua celo estis la unua turo. Delonge ili iris unu apud la alia silente, ĝis Steĉjo alparolis:

– Granda afero estas tio, mia pli juna frato, ni komencis frenezaĵon. Du almozuloj sen zorganto kaj tamen esperantaj. Doloro! En niaj vojaĝvalizoj estas plenigitaj de tiu doloro!

– Sed ankaŭ tiu ĉi povas elĉerpiĝi.

– La mia ne, sed mi maltrankviliĝas por vi. Mi timas, ke vi ne estos sufiĉe persista. Tamen povas okazi, ke vi atingos baldaŭ la celon. Povas esti, ke mi mortos, sed vi vivos. En tiu okazo, se vi vivos plu, tiam promesu helpi niajn edukgepatrojn kaj venĝi nin kontraŭ la murdinto de nia patro.

– Mi promesas – diris solene la pli juna studento.

– Aŭdu tiun promeson la libera ĉielo super ni!

La vespera krepusko ĝuste komencis descendi sur la herbaron malsekan de roso kaj du etaj steloj ekbriladis sur la firmamento. La du fratoj supren rigardis kaj la etaj steloj afable palpebrumis al ili, kvazaŭ dirinte: „Ja ni aŭdis tion, tre, tre bone ni aŭdis.” Noktomeze ili atingis iun vilaĝon. Nur en unu fenestro lumis meĉo. Ili frapadis sur la pordo lacaj kaj elĉerpitaj. Post nelonge malfermiĝis la eta fenestro, distiriĝis la bunta kurteno.

– Kiu estas tie? – demandis iu malĝentila voĉo interne.

– Ni estas malriĉaj, malsataj studentoj. Ni petas noktan dormejon kaj iometan panon de via Moŝto. Pro tio ni venis al vi.

– Ĉi tie ne estas bona loko por veturantoj. Ĉi tien ni atendas la morton kiel gaston, – respondis iu interne.

– Ĉu agonianto estas en la domo? Pardonon, sed ni ne estas la Morto!

– Do, tiukaze Diablo forportu vin! – diris iu kaj kolere frapfermis la fenestron, sed la studentoj apenaŭ iris dek paŝojn for, kiam tiu moroza homo laŭtege malfermis la fenestron.

- Hej, studentoj, studentoj! Revenu. Ĉu vi scias skribi?
- Pro tio ni estas studentoj, ke ni konu la skribon – respondis Laĉjo.
- Nu, tiuokaze envenu! Vi venis ĉi tien en taŭga tempo.

Baldaŭ la riglilo de la pordo de la domo ekgrincis kaj la studentoj povis eniri tra la malvasta vestiblo en la ĉambron, kie iu ŝrumpinta onjo agoniis sur bunta lito. Ŝi havis grizajn hararon kaj brovojn, ŝia brusto stertoris turmente, dum ŝi prenis sanktigitan amenton. La parencoj staris ĉirkaŭ ŝi sen ekscitiĝo.

– Panjo – diris iu altstatura viro, ekskuante la tukon de la agonianto, kiu estis ĉirkaŭ ŝia kolo – studentoj estas ĉi tie por skribi la testamenton. Diru al ili, kion ili skribu. La maljunulino ektusis sufokiĝante, dume ŝiaj tempioj bluiĝis:

– Ho, ve! Ĉu vi estas migrantaj studentoj?

– Ni ne estas migrantaj studentoj, ni estas studentoj de la kolegio de Debrecen.

– Bone estas – ĝemis la malsanulino, dum klakis ŝiaj dentoj, – montru al mi viajn plandojn. Agnesa, portu pli proksimen la meĉon. Nu, bone estas, skribu mian volon. Mi kredis, ke vi havas ĉevalpiedojn kaj volas porti min en la inferon.

Iu maljunulo, kiu eble – ŝajne – estis la frato de la agonianto, portis skribilon kaj ĉifitan paperon, kies unu flanko estis plenskribita. Steĉjo prenis la skribilon kaj komencis skribi, kion la maljunulino diktis:

– Mian animon havu la ĉiela Dio.

La altstatura ulo kapbalancis jesante.

– Skribu plu, studento! Mian korpon havu la patrolanda tero.

La ĉeestantoj ankaŭ tion ĉi trankvile sciigis. Ĉio ĉi laŭ tiuj nur estis senvaloraj aĵoj.

– Miajn terbienojn havu mia nepo, Johano Kertész.

Nun ĉiuj rigardis furioze sur iun junan fraŭlon, kiu sidis sur la tablo, krucante la gambojn, ion li skulptadis.

– Mi donacas la bruton al filo de mia frato, Istók Rác.

La altstatura viro palpebrumis malkontente.

– Skribu, studento – ĝemetadis la agonianto, kolektante ĉiun forton. – La domon kaj la aĵojn estantaj en ĝi havu mia nevino, Agnesa.

Dume la studento ankaŭ tiun skribis. Disputo komenciĝis inter Agnesa kaj Istók Rác en iu angulo. Istók tiel komprenis, ke nun ĉiuj aĵoj estis donacataj por li, laŭvorte la mebloj, kiuj havas piedojn. Sed Agnesa nur komprenis la domajn bestojn kiel bruton. „Ne, oĉjo Istók, mi donas al vi eĉ ne unu kaserolon havantan piedojn.”

La malsanulinon ne ĝenis ĉi tiu disputo, ŝajne ŝi ne aŭdis tion kaj sekvamaniere aranĝis la ceterajn aĵojn:

– Mian tutan konstantan monon, mil talerojn, mi donas al mia plej juna nepo, Francisko Mohorai, sed li povas ricevi ĝin nur dum sia 24-a jaraĝo.

En la sama momento eksaltis de supro de la bakforno la nomita Francisko Mohorai, 13-a jaraĝa knabo.

– Kie estas tiuj mil taleroj, avinjo? Donu tuj kaj mortu!

– Estu silento! Kiel vi kuraĝas diri tiujn vortojn al via avinjo, bubo? Vi estas maldanka infano! Sur la flava vizaĝo de la agonianto aperis laca rideto, montrante, ke la gepatra amo ne persvadis sin, ŝi prenis la manon de la knabo kareseme.

– Ho ve! Kiom malvarma estas viaj manoj! Delasu la mian!

– Bone estas. Iru, do, por enlitiĝi, sed unue turnu vin al la lampo por vidi vin, kiel vi aspektas.

– Atendu, do, kombi vin antaŭe.

La vizaĝo de la malsana onjo estis kvazaŭ gaja, kiam ŝi petole paroladis kun sia kara nepo. Dum Agnesa enportis terpoton da acida lakto por Laĉjo, Steĉjo senpacience alparolis la malsanulinon:

– Ĉu ankoraŭ io sekvas?

– Nu, mi vidu nur... bienoj, mono, aĵo, bruto... ne estas alia! Tamen, jes ... Miaj du karaj hundoj. Al kiu mi donu miajn hundojn?

Meditante ŝi fermis la okulojn momenton, poste murmuris ĝemetadante:

– Ĉu la hundojn? Jes, la hundojn! Ek studentoj! – ŝi ekkriis preskaŭ gaje – ... Mi donas la hundojn al vi, studentoj!

Terure estis, kiel ŝi grincigis siajn dentojn. La maldorme atentantoj ridetis, sed Steĉjo estimplene respondis:

– Mi dankas pro via bonvolo, sed ni ne bezonas tiujn, eĉ ni ne havas manĝaĵon.

– Ej, do, kiuj vi estas? Kiel vi vagadas ĉi tie? Kien vi iras?

– Ni estas orfoj. Ni havas neniun al kiu iri kaj neniun helpas nin. Pro tio ni serĉas la fortunon.

– Ĉu la fortunon? – ŝi iĝis subite ekscitita kaj ŝiaj manoj ektamburis sur la kovrokuseno. – Do, ĉu mi estas la fortune? Vere, tio povas esti eĉ ankaŭ la agonianta oldulino. Sed vi ne scias tion, bubetoj! Nu, kunportu tiujn miajn du hundetojn; ja tiuj estos utilaj por vi, infanoj. Ĉu vi ne havas manĝaĵon por tiuj? Ej, Bodri, Dravo!

Je tiu ĉi voko du etaj vulgaraj ŝafpelhundoj rampis de sub la lito: ambaŭ havis longan hararon kaj vilan voston. Unu estis tuta blanka, la dua tute nigra.

– Nu, ĉu estas belaj miaj hundoj? Venu nigra Bodri por leki mian ostan manon. Vi havas bonan varman langon. Mi donas al vi tri verajn talerojn kaj ne diru, ke mi estis via malbona mastro. Dravo, mi donas al vi nur unu taleron, ja mi konas vin, sufiĉos unu talero.

Ŝi enigis sian manon sub la kusenon kaj de tie eltiris saketon kaj kalkulis sur iun angulon de la antaŭ ŝi estanta tableto tri talerojn, sur la alian angulon unu taleron.

– Nu, studentoj, elektu el inter la hundoj, ha, ha, ha. Unue tiu elektu, kiu skribis la testamenton.

– Mi konfidas la elekton al mia pli juna frato – diris Steĉjo – li elektu.

– Mi elektas la unu taleran-hundon, la blankan – respondis Laĉjo senhezite.

La maljunulino ridaĉis kiel satano.

– Vi estas bravaj infanoj! Vi certe ektrovos la fortunon. Nu, jen ambaŭ volis tiun, ke la alia havu la hundon valorantan pli da mono.

La maljunulino kapbalancis gapante la elektojn de la knaboj; dume ŝi tiom silente ekdormis kiel kutimas alia kaze mortemulo.

– Ŝi ankaŭ nun ne mortos – flustradis la parencoj – nur komedias kaj pro tio invitis nin ĉi tien.

Sed matene ŝi jam estis mortinta. La studentoj havante la noktan ripozejon sur la subtegmenta fojnejo, matene foriris kune kun la du hundoj ... El la hundoj, kvazaŭ sciante, al kiu ili apartenas: la blanka hundo amblis apud Laĉjo kaj la nigra apud Steĉjo. Ambaŭ estis obeemaj.

Dum ili marŝis sur la senvojaj pejzaĝoj kaj la ebenaĵa regiono, la du hundoj ne volis postresti de ili. La ebenaĵo ne estis la nuna senfina tritikmaro. Anstataŭ la tritikkampoj naŭzegaj marĉoj elspiris malproksimen sian malbonodoraĉon; kanejoj, marĉejoj okupis la gigantan puston kaj pro tio ili devis reiri kelkfoje duonmejlon por eviti la marĉajn lokojn. Invitantaj farmoj nenie blankiĝis laŭ la vojo, ankaŭ la ŝercemaj ventomuelejoj ne rotaciigis siajn brakojn, mansignante: „tien ĉi, tien ĉi!” Fine en malfrua vespereotio atingis iun arbaron. La blanka hundo dum flarado subite ekatentis, poste enkuregis en la arbaron kaj ĝi ekpelis iun sovaĝbeston. Baldaŭe ĝi kunportis grandan leporon inter la dentoj.

– Nu, ĉi tiu estas brava hundo – diris Steĉjo – nun jam ni ne malsatmortos. Ni rostas la leporon kaj manĝas tiun.

Ili eksidis sub iun arbon, faris fajron kaj rostostangojn kaj la ruĝa viando de la senhaŭtigita longorela leporo post nelonge gaje kraketis sur la rostostangoj. Ili rigardis avide la procezon de la rostado, due iliaj manoj estis interplektitaj, kvazaŭ ili petegus: „Fajreto, fajreto! Rostu rapide la leporeton!” – Subite iu forta baritona voĉo salutis ilin de malantaŭ ilia dorso:

– Donu Dio bonan vesperon, fraŭletoj!

La studentoj rigardis malantaŭen; iu atletforma viro staris tie, vestita en kampulvesto.

– Bonvenon – respondis Steĉjo afable.

– Kion vi faras ĉi tie, infanoj?

– Ni rostas nian vespermanĝon.

– Ĉu ne? Ĉu leporaĵon? Kie vi akiris?

La hundo ĉaskaptis.

– Sed mi esperas, vi ne volas manĝi la tuton.

Laĉjo ekridetis.

– Sed jes, ni volis tion, ĉar hodiaŭ ankoraŭ nenion ni manĝis.

– Laŭ tio – vi povas atendi unu tagon, ĉar mi ne manĝis hieraŭ kaj hodiaŭ.

– Nu, ne gravas, vi havu trionon de la leporeto.

– Ne tiel estas tio, infanoj! Kiom jaraĝaj vi estas kune?

– Mia pli aĝa frato estas pli aĝa unu kaj duon-jarojn ol mi, mi havas la dek naŭan jaron.

– Tio estas infaneco! Mi estas duoble pli aĝa, ol vi, do, mi devus ricevi duoble pli multe da viandoj, ol vi.

– Jes, sed ankaŭ la hundoj estas tie ĉi. Ankaŭ tiuj devas manĝi.

– Al la hundoj bonas ankaŭ la ostoj. Tio estas la vereco.

– Tio estas la vereco, – interparolis Steĉjo – la tutan leporon povas manĝi la hundo, ĉar ĝi kaptis.

– Tiukaze ni ne konsideru la verecon, – respondis la pliaĝulo, – sed ni marĉandadu amikece. Mi ne devpetas mian parton el la leporo, sed ambaŭ vi donas al mi duonon de sia porcio.

La knaboj konsentis pri tio. La fremdulo eksidis apud ilin al la fajro kaj bonguste formanĝis la restaĵojn de la leporo. Dume li demandis: Pro kio vi venis ĉi tien?

– Ni serĉas la fortunon.

– Ja tiun ĉiuj serĉas, sed malmulte da homoj trovas! La fortune estas ĉie, do nenie estas konstante. Tiu estas iu fiulo, infanoj, ne estas inda postiri tiun, ĉar ĝi venas al vi, se vi havas emon. Se vi postiras tiun, ĝi certe ne ektrovos, se tiu ne havas emon. Sed mi vidas, ke vi estas bonkoraj. Pro tio permesu al mi iri kun vi. Mia nomo estas Johano Roĵomak. Vi ekvidos, ke mi povos helpi al vi.

– Kien vi klopodas iri, oĉjo?

– Al Vieno.

– Ĉu povas esti, ke al la reĝo?

– Povas esti, ke ĝuste al la reĝo.

– Nu, tiukaze ni iras kun vi kunĝoje, ĉar ankaŭ ni klopodas iri al la proksimo de la reĝo helpe de Dio.

– Infanoj evitu la reĝojn! – diris la fremdulo kaj sulkis siajn brovojn. – Kion vi volas de la reĝo? La reĝoj multon, eĉ ĉion forprenas de la homoj kaj donas malmulte da aĵoj al la homoj.

– Ni volas iĝi nobeloj. Ni aŭdis pri tio, ke nur de la reĝo ni povas esti nobeloj.

Johano Roĵomak ekridis:

– Dio mia! Ĉu vi kredas, ke la nobelan titolon oni dividadas kiel en Debrecen la budenon? Por atingi tion vi devas fari ian agon por meriti nobelan ĉarton.

– Ja ni faros por atingi tion – kriis Steĉjo entuziasme.

La pliaĝulo premis sian ventron pro la rido.

– Vi estas freneza, mia fraĉjeto. Ĉu vi pensas, ke estus bonaese la malriĉuloj povas iri tien, kie oni faras gravajn aferojn?

Post ĉi tiu parolado ili eksidiĝis sub la arbon kaj dormis ĝis frua mateno. Matene ili ekiris. Dumvoje Johano Roĵomak notis:

– Mi donas al vi bonan konsilon. Duonigu la mondon.

– Kiel vi komprenas tion, mia oĉjo?

– Ĉe la unua vojkruciĝo vi disiru al du diversaj direktoj: iu iru maldekstren, alia dekstren. Sur du stoplejoj pli da spikoj estas ol sur unu por serĉadi. Sur unu vojo du personoj povas akiri nur unu spikon, sur du vojoj ĉiuj trovas sian spikon.

Ili opiniis la konsilon bona, pro tio ili akceptis la konsilon. Roĵomak estas saĝulo kaj estas inde akcepti lian konsilon. Atingante la unuan vojkruciĝon, la du fratoj trabrakumis, kisis unu la alian, poste ĵetis unu taleron sur la teron por decidi: „Kiu iras kun Roĵomak al Vieno?” kaj „kiu iras maldekstren al Transilvanio?” Se la Maria-flanko estas supre, tiam Laĉjo elektas. Se tiu flanko estas malsupre, Steĉjo decidas. Estis eelekti Marian, ĉar Maria iĝis la supra. Laĉjo iomete pensadis, ke li iru kun Roĵomak, sed lia blanka hundo kuris antaŭen al tiu vojo, kiu kondukis al Transilvanio. Dume ĝi kuris malproksimen kaj staris sur siaj malantaŭaj piedoj kio aspektis kvazaŭ ĝi per siaj unuaj piedoj gestadus, invitus lin.

– Nu, do, ne gravas. Mi postiras mian hundon. Adiaŭ, mia kara frato!

– Dio benu vin!

– Kiun Dio pli frue helpas, tiu serĉas la alian. Ankaŭ niaj aliaj votoj estu sanktaj ĉiam.

Ili interkisadis unu kun la alia ankoraŭfoje, abunde faliginte larmojn. Roĵomak ekkompatis ilin kaj ankaŭ li mem komencis larmi.

– Nu, ne saĝumadu, ne kortuŝiĝu, pprefewre ni iru kune. Povas esti, ke mi povas doni al vi iun taskon.

– Ne, ne – finis Steĉjo, – tute vi pravas. Ni devas serĉi la feliĉon solaj.

– Bone, knabo, – diris Roĵomak, skuante varme la manon de Steĉjo, – vi estas bonkora, ĉar vi donis el via leporo iometon kaj diris, ke vi ŝatus fari gravajn aferojn. Vi havas feliĉon, mia fraĉjo, ĉar se ankaŭ Dio volas la samon, tiam mi kunportos vin tien, kie oni faras gravajn aferojn.

Kiu estis tiu loko? Baldaŭ ni ekscios.

7. Ĉapitro

La regnestro posttagmeze

Tiutempe sidis sur la trono de Transilvanio Miĥaelo Apafi²⁶, sinjora moŝto, kiu estis ege pia homo kiel regnestro, sed tamen li faris multe da malbonaĵoj, ĉefe *po posttagmezo*. Ĉi tiujn liajn „posttagmezojn” ankaŭ la nobeloj de Transilvanio rimarkis kaj faris leĝon saĝe, kiuj devis la posttagmezajn ordonojn kaj subskribojn de lia sinjora moŝto deklari nevalidaj. Tio ĉi kaŭzis novajn komplikadojn, ĉar lia sinjora moŝto plilongigis la posttagmezojn (nature el la noktoj), pro kio dum la antaŭtagmezoj li ĉiam dormis. Do, kiam li regu, se posttagmeze ne estas permesate kaj antaŭtagmeze ne povas okazi?

Sed ja ne vane kuŝis senutilige la regnestra sceptro en la angulo, ĉar multfoje ankaŭ tiuj homoj uzis tiun, kiuj ne havis rajton al tio, kiel ekz. sinjoro Miĥaelo Teleki²⁷, aŭ la soldatnatura regnestro, Anna Bornemissza²⁸. Eĉ ni povas diri, ke ankaŭ la modesta sinjoro Nalácz preskaŭ ludis regnestron.

La regnestro amuzis sin en kompanio de gajaj kaj frivolaj ĉefnobeloj. Li terurigis de la seriozaj sinjoroj, kiel la diablo de la incensofumo. El inter la kortegaj altranguloj, la ĉefa gustumisto de drinkaĵoj havis la plej gravan taskon. Vere tiu ege bone plenumis sian taskon, nome en la regnestra kelo de Gyulafehérvár²⁹ estis la plej bonaj hungaraj kaj eksterlandaj vinoj. Vera plezuro estis rigardi tiun.

Apafi ofte aranĝis anstataŭ la kutimaj militinspektoj barelinspektojn kaj sur la barelojn skribis propramane belegajn nomojn kaj spritajn skribaĵojn. Tie estis dekdu samgrandaj bareloj, en tiuj estis ruĝaj vinoj kaj portantaj la nomojn de la dekdu apostoloj: „Judas Iskariotes de Eger”, „Simeono Zelotes de Neszmély³⁰”... ktp. Du bareloj, en kiuj estis asuo de Tokaj³¹, portis fiere la nomojn de Filipino de Macedonio kaj Julio Cezaro.

Ĉi tiel lia sinjora moŝto povis kunligi la utilajn sciindaĵojn kun la amuzaj. Dum iu posttagmezo, sed ankoraŭ antaŭ la nomita leĝo, kiam la sinjoroj havis tre gajan humoron, antaŭ la leviĝo de la tablo, Stefano Apor miksiĝis al forta disputo kun Kristoforo Boér pri tio, kia estas la transmondo? Ĉi tio estis laŭmoda temo de niaj prauloj. Oni komencis tiun kaj neniam finis.

La disputo, iĝanta ĉiam pli senbrida, tiel ŝajnas, estiĝis pro tio, ke Marteno Salitius, kuracisto de la regnestro, atentigis la sinjoran moŝton, ke li jam ne prenu la hanapon por drinki, ĉar la vino damaĝas al li. Laŭ la kuracisto, la vino portas al la transmondo multe da homoj.

- Kiu estas sinjoro, tiu estas sinjoro ankaŭ transmonde. – interparolis Bánffy.
- Povas esti – diris Salitius – sed en la transmondo ne estas alia Transilvanio.
- Mi ne kredas, doktoro, – alparolis la ŝercan humoron havanta Moseo Torocka, – ke ankaŭ la vino povas grandigi la mortemon. Vi diris antaŭ nelonge, ke la plej granda mortemo

²⁶ Pri la regnestro de Transilvanio vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Apafi_la_1-a

²⁷ Pri Miĥaelo Teleki vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Mikaelo_Teleki

²⁸ Pri la edzino de la regnestro Miĥelo Apafi vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Anna_Bornemissza

²⁹ Pri Gyulafehérvár vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Alba_Iulia

³⁰ Pri la loknomo Neszmély: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Neszm%C3%A9ly>

³¹ La asuo-vino estas vinspeco, natura, delkata, kiun oni rekonas kiel la plej bonajn specialaĵojn havantan noblan dolĉan vinon en la mondo. Ĝi estas pretigita por atingi la kiel eble plej altan sukergradon. En Hungario ĝia plej bona vinberproduktejo estas la tielnomata: Tokaj – montosuba vinregiono. La asuo vinberoj estas tromaturaj vinberoj, noble putraj vinberoj el kiuj estas pretigita la vino.

estas ĉe la infanoj, kiuj estas inter siaj unua tago kaj kvarjaraĝo. Laŭvorte ĝuste ili ne trinkas vinon.

Pro la faktoj kontraŭdirantaj unu al la alia, granda ridego eksplodis kaj denove tintis la glasoj, sed, kiel estis menciite, sinjoroj Apor kaj Boér plu disputis pri tiu temo, ekscitite disputante pri la sekretoj de la transmondo. Ambaŭ volis scii tion pli bone, kio estos tie. Unuj neis la ekziston de la bolantaj akvaj kaldronoj de la infero en kiuj la animoj kuiriĝas, sed akceptis, kiel faktojn en la paradizo de Mohamedo, kelkajn aferojn, ekzemple la ombron de la paradiza fruktarbo, ĉar pro la forta kriĉo ne eblis aŭdi, kiu kion asertas.

La disputo ne povis daŭri inter du homoj, ĉar ankaŭ aliaj alparolis al la temo. Ankaŭ la regnestro partoprenis tiun. Li ĉirkaŭrigardis timeme, serĉante ie sinjoron Miĥaelo Teleki, kiu malaprobante, aŭ jesante kutimis skuadi siajn brovojn, kiam la regnestro ekparolis. Tio estas tre malagrabla situacio.

Sed estis feliĉo, ke sinjoro Teleki ne ĉeestis kaj lia sinjora moŝto tute kuraĝe povis disputi kiel simpla homo, ĉar li tre bone konis la bibliajn kaj la teologiajn aferojn kaj sciindaĵojn.

Sed du furioziĝintajn taŭrojn pli facile estas bridu, ol du pasiajn disputantojn. La voĉo de Apafi estis malforta kaj ne estis decida lia regnestra potenco.

– Nur pli malrapide, sinjoroj – alparolis la regnestro kaj frapis per sia manplato sur la tablon. – Ni decidu tion, kiu havas pravon el inter vi. Ĝuste hodiaŭ alvenis al mi iu fama sciencisto de Eperjes, reprezentante mem Emerikon Thököly. Lia nomo estas Stefano Schmidt, kiu frekventadis la eksterlandajn universitatojn kaj korespondas kun la plej famaj sciencistoj de la mondo. Nu ne gravas, se vi ne volas aŭskulti min. Sed ni tuj ektrovos la manieron por decidi: kiu estas la pli bona teologo, ĉu Apor, aŭ Boér? Iru, mia fraĉjo, Paŭlo Korniŝ, voku tien la senditon de Emeriko Thököly.

El inter la hanapojn verŝadantaj paĝioj unu vigla belega knabo, portanta bluan dolmanon kaj sur ĝi arĝentajn fibulojn, forkuris por plenumi la ordonon kaj post ne longe revenis por anonci:

– Sinjoro Schmidt tuj estos ĉi tie, ĉe via sinjora moŝto.

– Nu, finfine ni ekscios, kio okazas en la transmondo. Ĝis tiam ni kunkolektu la asertojn de Apor kaj Boér. Kiu havos pravon, al tiu mi donacos mian plej belan glavon, la opalŝtonon. Laŭ tio ĉi, sinjoroj, ordigu viajn asertojn kaj pensadojn.

En la sama momento paŝis en la ĉambregon Stefano Schmidt, alta, grandbarba sinjoro, kiu portis simplan, nigran hungaran vestaĵon. Sur lia trankvila, pala vizaĝo videblis la surprizo: Kial invitigis la regnestro, kiam la aferoj estas progresintaj? Ja tie la vangoj jam estis ruĝiĝintaj pro la vino kaj la okuloj febre brilis.

– Ni vokigis vian moŝton, – komencis diri favore kapbalancante la regnestro, – ĉar estiĝis iometaj disputoj inter niaj du kreduloj, inter Boér kaj Apor pri la transmondo. Ni aŭdis la sperton de via moŝto pri la mondaj kaj ekleziaj sciencoj kaj estas konata por ni via saĝa jurkapablo; ankaŭ el letero de nia fraĉjo Emeriko ni legis pri via moŝto nur multajn laŭdojn.

Sinjoro de Altlando riverencis:

– Disponu pri mi, via sinjora moŝto.

– Via moŝto devas decidi, kiu havas pravon el inter ambaŭ sinjoroj, ĉiu bdiru siajn opiniojn, sed – aldonis Apafi ridetante, – unu post alia, ne samtempe.

Sed nur ĉi tiu admono ne estis utila, ĉar la du sinjoroj pasie, interrompante la vortojn unu de la alia, kriaĉante, senpacience konigis siajn vidpunktojn. Ĉu ties kaŭzo estis la opalŝtona glavo, aŭ ilia firma konvinko? Oni ne povas scii.

– Nu, kio estas la opinio de via moŝto? – demandis la regnestro sinjoron Schmidt, dum tiu atenteme priaŭskultis la disputantojn. – Kiu havas pravon?

– Jes, ni aŭdu finfine: Kia estas precize la transmondo? – kriis la ĉefnobeloj.

Nur Georgo Béldi ekkriis plengorĝe:

– Do, por kio estas bone fari tion ĉi? Ja ni mortos neniam! Knaboj! Vinon verŝu en la glasojn!

– Pst! Silento! Parolu via moŝto – mansignis Apafi. – Paĝio, portu ĉi tien el la armilejo la premion, mian opalŝtonan glavon!

– Sinjora moŝto! – ekparolis Schmidt kaj festa silento iĝis en la ĉambrego. – Mi priaŭskultis atenteme la opiniojn de la estimindaj ĉefnobeloj pri la transmondo. Ambaŭ bele prezentis tion laŭ sia kredo. Mi diras nur tion ...

– Ni aŭdu tion – aŭdiĝis de ĉiu flanko.

– Mi asertas, ke Dio jam komunikis multon el inter la sekretoj de la universo.

– Vi pravas, vi pravas!

– Pri la aliaj estaĵoj de Dio oni scias pli malmulte, ol ni, do ni povas esti sufiĉe kontentaj. Sed dum Dio informis la homojn pri la sekretoj de la universo, kelkajn sekretojn tamen

Li konservis por si.

– Ni petas la esencon, scienca sinjoro. – interparolis Bánffy senpacience.

– Ja tio ĉi estas la esenco, pri kiu la du ĉefnobeloj disputis, ĉar tiu apartenas ĝuste al la sekretoj de la universo, kiujn Dio kaŝis. Tion ĉi mi volis diri.

Saĝa estis la respondo de sinjoro Schmidt, sed la ĉefnobeloj murmuris malkontente. Nur sola voĉo kriis de ie el la angulo de la ĉambrego: „Bone, do!” Ĉiuj rigardis tien indignante kaj vidis, ke la kortega amuzisto diris tion. Nun la regnestro diris tre laŭte al la paĝioj:

– Se la sciencisto ne estis kapabla decidi, tiam kuru antaŭ la palacon kaj portu tien ĉi la unuan piediranton. Kion la sciencisto ne scipovis decidi, decidu la malklerulo.

Nu, la paĝioj obeeme kuregis antaŭ la palacon por ekkapti malklerulon. Nu, ja ne estos malfacile! Ili povas trovi tiun en stratoj de Gyulafehérvár kaj en la regnestra konsilantaro. Baldaŭ aŭdiĝis bruego de granda luktanta baraktado el la antaŭĉambrego.

– Iru nur rigardi, Miĥaelo Baló, kio okazas tie?

La kortega leŭtenanto foriris kaj revenis:

– La paĝioj klopodas porti en la ĉambregon iun junan vagabondon, sed tiu ne volas iri tien sen sia hundo. La junulo luktas kontraŭ la eniro.

– Do, li venu ene kune kun la hundo.

Miĥaelo Baló denove eliris por silentigi la bruegan luktanton. La paĝioj baldaŭ enpuŝis iun junulon portantan ĉifonan vestaĵon en la ĉambregon. Li portis ĉifonan studentan togon kaj de polvo kovritajn sandalojn, en kiuj videblis la piedoj, spite de tio, ke tiuj estis fiksitaj, al la piedkapo. Vane, nu! Eĉ la botistoj ne kapablas fari konstantajn produktaĵojn.

– Kie vi trovis ĉi tiun bubon? – demandis sinjoro Gabrielo Lázár, kiu estis ruĝa kiel kuirita kankro, ĉar li estis la plej ebrietigintas.

– Ĝuste li iris antaŭ la pordego, dum ni atingis tien, kaj tio estis la ordono, ke ni ekkaptu la „unuan piediranton.”

Apafi kapbalancis jese, kun peziĝanta kapo, dum liaj okuloj dormeme palpebrumis.

– Kiel oni nomas vin? – demandis li kaj flustregis.

– Mia nomo estas Ladislao Vereŝ.

– Kio vi estas?

– Mi estas migranto.

– Tio estas malriĉa metio – opiniis Béldi.

– Kion vi volas de mi, sinjoroj? Mi ne faris malbonon. Mi plendoprotestas kontraŭ la sinjoroj. Delasu min!

Kaj la knabo levis siajn pugnojn, kolerege rigardante la tri paĝiojn, kiuj devigis lin veni tien ĉi.

– Vi estas malfeliĉulo – flustris al tiu iu paĝio, la eta Paŭlo Korniŝ, – ĉu vi ne konas tiun, antaŭ kiu vi staras?

– Tio ne estas mia zorgo! Mi povas esti ankaŭ antaŭ Pontio Pilato³²!

– Ja tio ne estus problemo, sed nun vi estas antaŭ lia sinjora moŝto Miĥaelo Apafi, regnestro de Transilvanio.

La malriĉega studento paliĝis kaj liaj piedoj komencis tremeti. Li staras antaŭ regnestro! Li ĉirkaŭrigardis en la granda volbarka ĉambrego. Li vidis sur la tablo arĝentajn hanapojn kaj la paĝiojn en orpasamentaj velurvestaĵoj. Poste li rigardis sur la muron, kie estis pentrita la vizaĝo de la sur ĉefloko sidanta maldika homo... tiu vizaĝo estas la sama kiel la vizaĝo de la regnestro, sed portis verdveluran dolmanon kaj tenis en la mano sceptron.

La malriĉega studento falis sur la genuojn.

– Ekstaru, mia filo – parolis la regnestro. – Timu nenion, eĉ unu via hareto ne difektiĝos. Donu al li hanapon da vino por rekonsciiĝi.

La afablaj vortoj kaj la vino vere redonis lian kuraĝon.

– Ne estas akuzo kontraŭ vi – komencis diri poste Salitius la doktoro, – eĉ kontraŭe la regnestro portigis vin ĉi tien por esti juĝisto, mia dolĉa filo. Vi decidus, kiu el inter la du sinjoroj, kiu havas pravon.

– Ĉu mi? – balbutis li embarasite, – kiel mi estu kuraĝa?

– Se la regnestro ordonas ion, tion oni devas plenumi.

Ladislao Vereŝ klinis la kapon. La blanka hundo kuŝis trankvile antaŭ li sur ĝiaj piedoj kaj siaj saĝaj okuloj palpebrumis sur lin kuraĝigante.

– Sinjoroj – konigu al li – alparolis Apafi – la temon de la disputo.

Nun Salitius klarigis la opiniojn de la du sinjoroj, dum sinjoro Béldi flustris moke al la apude sidanta Inczédi:

– Ja ili povas pasigi la tempon pri pli utilaj aferoj, ol pri tiuj ĉi manioj.

– Mi estas dankema, ke ni ne havas pli gravan statuson, ĉar tiuokaze la senditoj de la eksterlandaj landoj tagmanĝus ĉi tie kaj priridus nin.

– Via ekscelenco povas pravi – opiniis Bethlen, la sciencisto, – sed laŭ mi la afero ne estas ridinda. Lia sinjora moŝto pli ĝuste havas delikatan akran cerbon, ja li interesiĝas post iu sciencisto ĉe iu malklerulo. KREDU MIN, sinjoroj, ĉi tio estas kaj filozofio kaj incito.

Béldi lipgrimacis moke:

– Pli vere tio ne estas filozofio, sed estas frenezumo, mia nuptosinjoro.

– Sed mi tamen asertis tion. Se vi konus la historion kaj aventurojn de la justa Harun al-Raŝid, tiam vi povas scii, ke inter tiuj estas multe da simileco, ja tiu estis grandpotenca reganto.

– Tio estis antaŭlonge, bofrato, – interparolis Béldi – se ĝi estis prava.

– Estu silento, sinjoroj, – sonis nun vortoj de Apafi –, do, ni aŭdu la opinion de la junulo: kiaj estas la aferoj en la transmondo?

³² Pri Pontio Pilato: https://eo.wikipedia.org/wiki/Pontio_Pilato

8. Ĉapitro

Heroldo de la transmondo

La studento staris hezitante antaŭ la multaj elitaj sinjoroj.

- Ĉu vi ne komprenis tion? – demandis Apafi.
- Mi komprenis, sinjora moŝto regnestro.
- Nu, tiuokaze diru kuraĝe!
- Korniš, donu al li iomete da cerbofortigilo.

La velurvestaĵon portanta paĝio verŝis drinkaĵon al la almozulo portanta ĉifonan vestaĵon. Tiu hezitis momenton, sed en la sekva sekundo rememoris rakonton de oĉjo Doboŝ pri la transmondo, kiun iam la oĉjo rakontis al ili. Fabelo, fabelo, tranĉu panon, povas esti, ke el tiu fabelo iĝas ankoraŭ pano.

– Sinjora moŝta regnestro – li komencis ekkuraĝiĝante sian dirindaĵon, dum la blanka hundeto pervoste batadis la knabon; – Vivis foje du pastroj en du hungaraj najbaraj vilaĝoj. Unu estis katolika, la alia protestanta, tamen ili estis bonegaj amikoj, ĉar ambaŭ ŝatis la ĉasadon. Kvankam la apartaj dogmoj disigis ilin, kunligis ilin la komuna ĉasejo.

– Cetere dum sia amikeco ili ĉiam kverelis sed ili havis ankaŭ la saman ŝatatan temon, pri kiu la sinjoroj disputis dum tagmanĝo de via sinjora moŝto. Poreterne ili demandadis, kio estas en la transmondo? La kalvina pastoro preskaŭ la saman asertis, kion la pli maljuna sinjoro Boér, kaj la katolika paroĥestro tiel parolis kiel la pli juna nobelo. Kelkfoje tute ili koleriĝis kaj la du sanktaj homoj batadis per pugnoj la tablon por konvinki unu la alian pri la vero de sia kredo.

– Tiu disputo daŭris dekkvin jarojn, impete, sed kompreneble havis neniun rezulton. Foje buĉfesto okazis super porko ĉe la paroĥestro kaj la kalvina pastoro estis inter la gastoj. Kiel aliafoje, ankaŭ nun ili disputadis pri la transmondo. Jam la gastoj parkere konis ĉiujn asertojn, argumentojn de la du pastroj. La gastojn sufiĉe enuigis la disputo, kion rimarkis la dommastro:

– Skorzonero! – ni lasu la tutan disputon, ĉar ni ekscios la kieleston, se mi estos en la transmondo.

– Ĵuru je tio, – kriis ekscitite la kalvinana pastoro, – se vi pli frue mortos, tiam, vi venos al mi diri, kiu havis la pravon.

- Se ankaŭ vi promesas tion, Miĉjo (oni nomis tiel la kalvinanan pastoron).
- Mi ĵuras, ke mi venos al vi post mia morto. Mi promesas je mia pastra esto.
- Ankaŭ mi ĵuras. Jen tie ĉi estas mia mano, ke mi diros la pravon.

La gastoj ridetis pro la festa promesado de la du disputantoj.

– Ej, sinjoroj pastroj, la morto estas ankoraŭ malproksime, pro tio antaŭ tio ni ĝuu ankaŭ la utilon de la nuna mondo, do, ni tintigu la glasojn ni amuzu nin!

Ili amuzis sin, estis gaje ĝis la dudekdua horo, poste petole ridante disiris aŭ per sledeto, aŭ per kaleŝo, aŭ perpiede laŭ sia loĝloko. La kalvinana pastoro lastfoje eksidis sur sian sledeton kaj kriis de tie ŝerce:

- Ĉu estas valida la voto?
- Tio estas valida.

La paroĥestro vidante lin foriri de la domejo, eniris de la verando, findiris la vesperan preĝon kaj enlitiĝis. Li apenaŭ dormis unu horon, kiam li vekiĝis abrupte, ĉar iu frapis la eksteran fenestron. Frostotremo ekregis lin kontraŭ tio, ke li estis al kutimiĝinta al la noktaj ellitigoj. Super la pordo pendis la tomboĝardenaj ŝlosiloj sur unu najlo. Tiumomente la najlo falis el la muro kaj la ŝlosiloj fantome tintegante falis sur la teron.

- Kiu estas tie? – demandis la paroĥestro eksaltante kaj la pantoflojn tirante.
- Estas mi, Miĉjo! – respondis la konata voĉo de ekstere.

La paroĥestro iris al la fenestro kaj flankentiris la kurtenon. La kalvinana pastoro staris ekstere.

- Ĉu vi revenis? Kio okazis pri vi?

– Mi mortis – respondis la kalvinana pastoro obtuzvoĉe, ĝemetadante, – kaj mi revenis al vi por diri: „En la transmondo ne tiel estas, kiel vi diris kaj ne tiel estas, kiel mi diris. Amen!”

Sur la lipoj de la paroĥestro estis la respondo: „Iru, do! Ne parolu frenezaĵojn, Miĉjo!” – sed la vorton frostigis tiu cirkonstanco, ke tiu figuro subite malaperis de sub la fenestro kiel iu fantomo kaj la neĝo ne grincis sub la piedoj, ne videblis piedspuroj, kontraŭ de tio la lunlumo bele brilis. La kokoj kokokriis la noktomezon. La paroĥestro interklaketis, kaŝis sin sub la kovrokusenon kaj ĝis mateno ekhavis febron. Sed li iĝis matene pli febra, ol nokte, ĉar la dommastrino anoncis:

- Sinjora pastra moŝto, granda malfeliĉo okazis.
- Kio okazis?

– La sledeto de la kalvinana pastoro, kiam vespere li foriris de ĉi tie, renversiĝis ĉe la fendego kaj la sinjoro kaj la koĉero falegis en la fendegon kaj ili abrupte mortis.

– Do, mi pensas tion, sinjoro moŝta regnestro, – finis la fabelon la almoza studento, – se de la transmondo alvenanta heroldo diris la veron, tiam la du disputantoj ne havas pravon.

- Vi pravas – kriis Apafi. – La historio estas ege bela kaj instruiva. Mi estas kontenta pri tiu. Ankaŭ al la ĉefnobeloj plaĉis tiu historio.

- Li estas saĝa knabo – alparolis Kristoforo Boér ridante. Li venkis. Mi kapitulacas.

- Laŭvorte vi ne ricevas la glavon.

- Vere, kiu ricevas nun la glavon, la donacon de la regnestro?

- Dio atestu! Kiu povus ricevi tiun, kiel ĉi tiu knabo – diris la regnestro.

– Tiel ŝajnas, ke ne la fabelo plaĉis al Apafi, – primokis mallaŭte Béldi, – sed la „moŝta” titolo, kun kiu la knabo tiklis tiun.

- Sed ja ankaŭ la fabelo estis bela kaj instruiva, – respondis lia najbaro, Inczédy.

– Iru, do! – interparolis la bufono – ja la knabo kaj la sciencisto diris la saman. La scienciston oni priridis pro tio kaj la opinion de la malklera knabo oni akceptis. La mondo estas ĉi tia!

– Vi estas atestantoj, miaj sinjoroj! – alparolis Apafi, – mi promesis la glavon al tiu, kiu havas pravon el inter ambaŭ. Ili ne havis pravon; la knabo decidis la disputon. Do, li havu la glavon. Jen, prenu la glavon!

– Mia sinjoro moŝta – diris la almoza studento modeste – kiel mi ligu ĉi tiun glavon al ĉi tiuj ĉifonoj?

Apafi ekridis. Estas fakto, ke la bubo aspektis kompatinda; tuj mansignis al la sekretario:

- Kunprenu lin kaj vestu belege.

Apenaŭ oni povis rekoni lin, kiam li revenis. Lia vestaĵo konsistis el belega griza dolmano, sur liaj piedoj estis botoj el marokeno kaj verda pantalono. En lia mano estis griza ĉapelo el ŝafledo. Tiujn la fortikaĵĉefo elektis el la kostumoj de la iamaj kaj nunaj varletoj. Vere la fraŭleto bone aspektis.

- Nu, nun jam, jen, prenu vian glavon, – diris al li paĝio Korniŝ.

- Eĉ nun mi ne povas ligi tiun, sinjoro regnestro.

- Kial ne?

- Ĉar nur nobelo povas porti glavon kaj mi ne estas tio.

Ĝenerala ridego estiĝis pro tio, la regnestro tiom ridis, ke faletis liaj larmoj.

– Dio mia! Ĉi tian sagacan bubon, kia ĉi estas, mi ne vidis. Ĉu vi estas armena, he, he, he? Ne diru, ke vi ne estas armena, ĉar mi volas morti laŭ tiu kredo, ke vi estas tio. Nu, la knabo bone diras, miaj sinjoroj. Kie estas sinjoro Naláczí? Iru via ekscelenco al la kancelario kaj faru al li nobelan leteron. En la alia domo estas la pentristo, kiu pentras al la regnestrino iun kredencon. La pentriston vokigu, ĉar mi volas pentrigi al la knabo nobelan blazonon.

La pentriston oni tuj vere ektrovis. Lia nomo estis Gabrielo Gabĉa. Li estis longa, maldika, lia vizaĝo estis ruza kaj certe estus faranto de bankbiletoj, se tiam estus bankbiletoj.

– Vi favoris vokigi, sinjora moŝto.

– Kion vi prilaboras?

– Mi pentras amaranto-florojn al la sinjorino moŝta regnestrino.

– Tion nun ĉesigu...

– Sed mi ne kuraĝas tion, ĉar la regnestrino...

– Sinjorino, ne sinjorino... afero de la lando estas pli grava. Pentru tuj blazonon.

– Kion mi pentru en ĝin?

– Iun treege lacan pasaĝeron, unu bubon en verda kampo.

– Sinjora moŝto, ne eblas pentri lacecon.

– Ĉu ne eblas pentri tion? Hm. Tio estas komprenebla, – diris li malĝoje – homon eblas pentri, sed montri la lacecon estas maleble ... Nu, lasu ni tion. Kiel oni nomas vin, knabo?

– Ladislao Vereŝ.

– Do, estu lia nomo: Ladislao Vereŝ Fáradi³³, kaj iru pentri anstataŭ la laceco lian blankan hundon, kiu estu en verda kampo.

Proksimume post unu horo oni portis kaj la nobelan leteron kaj la blazonon. La regnestro subskribis la antaŭan kaj konsideris atenteme la pli lastan.

– Ĉi tiu hundo, mi ĵuras, tiel aspektas, kvazaŭ ĝi estus kapro. Oni preskaŭ havas ŝaton por melki. Kian hundon vi pentris tien, frenezulo? Sed jam estas tute egale: ankaŭ la kapro estas bona besto. Donu tiujn al la bubo, poste elpelu lin el la palaco, antaŭ ol li petus ankaŭ mian kapon.

– Ja li ne estas freneza – diris nevole Georgo Béldi.

– Kiel vi komprenas, via ekscelenco? – demandis la fama denunciisto, Johano Kendefi.

– Mi komprenis tiel, ke li, la mallerta migranto, povus porti malfacile dumvoje tion.

Poste li turnis sin al Inczédy:

– Ja, tio estas komprenebla, ĉar tio estas ankaŭ por Transilvanio troe malfacila ŝarĝo.

³³ El la nobela nomo la noto, la Fáradi (... fáradt) montras, ke la portanto estas laca.

9. Ĉapitro

La trezoro

Nun jam Ladislao Vereŝ estis sinjoro, lian belegan vestaĵon la fraŭlinoj de Gyulafehérvár gapis sur la stratoj kaj lia glavo tre tintegis; sed ĉio ĉi nenion valoris, ja en la poŝo ne tintis moneroj. Ankaŭ la lasta denaro elĉerpiĝis el la heredaĵo de la hundo. Tamen li denove devus ĉesigi la sinjoran vivon, prefere li devas almozpeti de la bonaj homoj. Tamen la almozpeto estas multe pli malfacila en sinjora vestaĵo, ol antaŭe! Sed la nobelo prefere mortas, kaj ne almozpetas. Li kelkfoje haltis sur la stratoj kaj viŝadis sian frunton; li cerbumadis: ĉu li ne reiru en la fortikaĵon de la regnestro por atingi antaŭen de Apafi kaj ĵetu sin genuen, petante por si iun kortegan servon. Ja tiu estis afabla pri li. Vere li reiris al la regnestra palaco, sed la gardistoj ne volis enlasi lin.

- Kion vi volas?
- Iri al la regnestro.
- Ĉu vi freneziĝis? Kiel vi pensas tion?
- Ja mi estis tie antaŭ duonhor.

Iu gardisto, kiu havis survizaĝe variolmarkojn, malbelege riproĉetis lin:

– Bone estas, ke vi ne deziras inviti la regnestron tien ĉi al la pordego por paroli kun tiu. Flanken, mia sinjoro! La regnestro ne estas imperiestro de Vieno, kies domo ne estas traira domo de unu strato al la alia. Ellernu, pri kiu vi parolas.

Poste iu juna bubo, kiu sidis antaŭ la pordego sur globa ŝtono, scivole turnis sin al la parolanto:

- Ĉu vi estis en Vieno, oĉjo Iŝtók?
- Kial mi ne povintus esti?
- Ĉar oni diras, ke tie estas grandegaj domoj.
- La domoj estas pli grandaj, la ĝardenoj estas pli malgrandaj, ol ĉe ni. Laŭvorte la ceteraĵoj estas pli malgrandaj.
- Ĉu ankaŭ la homoj?
- Ankaŭ tiuj.
- Ĉu la pasero ne estas pli malgranda?
- Ankaŭ tiu estas pli malgranda.
- Ĉu la abelo estas pli malgranda, oĉjo Iŝtok?

La maljuna soldato (la kadukaj soldatoj mensogis jam ankaŭ antaŭ du jarcentoj) kolere kriis al tiu:

– Ankaŭ la abelo estas pli malgranda. Mi jam diris. Krome la abelojn oni paŝtas liginte ilin longŝnure. La ĝardenoj estas etaj kiel la kaĝetoj. Por ke la abeloj ne iru al la najbara ĝardeno, oni ligas tiujn al la abelujo per fadeno.

– Ej – miris la bubo meditante – kia stulta mondo estas trans Gyulafehérvár.

Ladislao Vereŝ ankaŭ nun staris ĉe la pordego.

- Kial vi atendas ankoraŭ?
- Mi atendas, ĝis vi estos pli afabla.
- Oĉjo Iŝtok iĝis tute afabla.
- Kio estas via deziro, kara mia filo?
- Almenaŭ tion diru, kiel eblas atingi la regnestron?
- Nur tiel, ke vi petas aŭdiencon ĉe sinjoro Miĥaelo Teleki.
- Kie loĝas sinjoro Teleki?
- Ankaŭ tiu loĝas en tiu ĉi palaco.

- Do, tiuokaze bonvolu lasi min iri al sinjoro Teleki.
- Tio estas neebbla, ĉar al sinjoro Teleki neniel eblas eniri.

Li malĝoje turnis sin kaj kvankam antaŭ unu horo li fierege paŝadis de la regnestro, nun li senesperigante la kapon klinante li iradis. Jam okazis la sunsubiro, la mondo iĝis griza kaj baldaŭ nigriĝos, malheliĝos. Ĝi estis atentiganta signo por la migranta studento: „Kie vi dormos nokte?”

La foiraj vendistoj komencis kolekti siajn ne venditajn varojn (rostaĵon, frukton) kaj ceterajn aĵojn, kiujn ili metis en grandajn korbojn. La bonodoro de la rostaĵo tiklis la nazon de la novnobelo, li estus havinta emon forŝteli tiun kaj forkuri. Sed glavon havanta nobelo kiel povas fari tion? Li fortigis sin, kaj trenis sin plu. De la manĝejo unu junipero gestadis al li flirteme. Du ciganinfanoj kuris al li, ĉirpigante siajn violonojn.

- Bonvolu ludigi iun belan kanteton, nobla brava sinjoro.
- Forkuru de tie ĉi, ciganidoj, ĉar se mi eltiros mian glavon, tiam viaj kapoj ruliĝos de viaj koloj.

Rapide li paŝadis plu en iu malvasta stratetaĉo al la malsupra parto de la urbo, kie tiel ŝajnis, ke iam granda incendio estis, ĉar la muroj de la domoj krutis al la ĉielo fulgokovrite kaj stumpe. Ĉi tio estis iu kampo, kie karbiĝintaj traboj kaj ĉevronoj kuŝis dise, tie ĉi tie kelkaj ardaĵaroj estis, kiujn la pluvo batadis miksante ĉifonojn, vitropecojn, cindron, teron, tegolojn kaj fandiĝantajn ferojn. La vento kaptis la flugcindron kaj flugadis kun ĝi super la urbo...

La blanka hundo, kiu amblis apud Laĉjo, havis hirtan pendigitan voston, iĝis nigra kvazaŭ oni farbus. Kelkfoje ĝi gratis sin al la trabo kaj iĝis bunte makula. Ja ĝi vere volis esti kapro por ke ĝi estu sama kiel ĝia portreto de la blazono.

Ne estas pli malĝoja ol ĉi ruinigita strato. Multe da signoj montras, ke ĉi tie antaŭ ne longe estis afablaj hejmoj, domejoj estis. Ĉi tie estas panpastujo, tie peco de bruligita lulilo. En la malgranda ĝardeno, kies herbotapiŝo bruliĝis, inter maljunaj arboj estis iu mola herbotapiŝpado. Ĝi povis esti iu kara nesteto! Ĉe unu flanko de la nigra kampo estis malalta prunarbo, kiu estis sendifekta. Ankaŭ la fruktoj estis sur ĝi, sed bruligite, ŝrumpinte. Laĉjo tuj rimarkis la prunarbon. Ja ĉi tio estas vera trezoro, li pensis, kaj avida komencis manĝi la fruktojn. Tiuj ne estis bongustaj, ja la pruno maturiĝas nur pli malfrue, sed la malsata stomako ne estas elektema. Laĉjo akceptis tiel, kiel sekprunon, kiu malpliigas lian malsaton. Dume la hundo tiel faris, kvazaŭ ĝi serĉus ostojn, flaradis, plugadis per la nazo kaj piedgratadis. Subite ĝi komencis bojeti kaj pli malfrue hurli, kuris al Laĉjo, poste reen al la sama loko.

– Ĉu vi vokas min, mia kara hundeto? Ĉu vi vokas min? Kion vi volas trovi al mi? Ĉu vi trovis ostojn? Nu, mi tuj iras tien, sed lasu min manĝi kelkajn prunojn! Nu, mi iras tien, ne hojlu. Ni ambaŭ tuj serĉos por ni noktan kvartiron!

Kiam li atingis tiun lokon, li ne volis kredi, kion li vidas. Nome la hundo sidis sur siaj malantaŭaj piedoj, same kiel kaŭranta homo kaj per siaj antaŭaj piedoj elskrapis el la tero kaldronon kaj tiun ĵaluzeme gardis. Ĉiuj legendoj de la Mil kaj Unu noktoj estas veraj, se tia estas vera, kion li vidis, sed li viŝadis ankaŭ duoble siajn okulojn.

La kaldrono estis plenplena de ormoneroj, juvelaĵoj. bukoj, ringoj, brelokoj, diamantoj, perloj kaj smeraldoj, kiuj brilis en la kaldrono blindige pompe. Li ne vidis ankoraŭ ĉi tioman trezoron kune.

Li ekŝrikis pro ĝojo, poste ĉirkaŭrigardis tremetante por konvinkiĝi, ĉu neniuj vidas lin. Neniu iradis en la forbruligita urboparto inter la ruinoj. Vesperigis, ĉio iĝis samkolora, la domoj, arboj ne diversiĝis, nur sur la kampo blankiĝis iu arĝenta linio, akvo de la rivero Maroŝ fluis mallaŭte. Kaj supre, sur la firmamento la brila lampo eliĝis el inter la nubocifonoj, kiu nun similas al la lampo de Aladino.

Laĉjo kliniĝis al la kaldrono, volis levi tiun, sed ne povis movi pro la granda ŝarĝo kaj ne havis lokon por meti la multe da multekostaĵoj. Dum li traserĉis inter la aĵoj, de lia vizaĝo

malvarma ŝvito fluetis kaj pli vere li preferus, se tiu trezoro estus pli malmulta. Li terurigis pro sia feliĉo. Kion fari nun?

Li frostotremis en la tuta korpo kaj sentis, ke li ne povas ekmoviĝi kaj tie ĉi terenfalas kaj mortas. La duonon de la trezoroj li remetis en la kaldronon, sed denove deprenis el la aĵoj unu kaj denove ankoraŭ unu. Ne, ĉi tiun grandan oran broĉon mi ne povas lasi tie ĉi, sed ankaŭ ne tiun topazon. Denove li rimarkis, ke la kaldrono denove malpleniĝis. Li devis meti reen la superfluaĵojn. Li malfacile remetis tiujn. Nur antaŭ kelkaj minutoj li iĝis nababo kaj jam li estas orsoifa. La homo estos malsana de la mono kaj la mono infektas la homon. Ĝis nun ege facile li donis el siaj heleroj al la vojrandaj almozuloj kaj nun malfacile lasas ĉi tie alian duonon de sia granda havaĵo. Sed tamen la prudenteco estis pli forta, ja li ne povis kunporti la trezorojn en sia ĉapo, ĉar tiun li ne havas, li estas nur trovanto de la multekostaĵoj.

Povas esti, ke tiu jam ne vivas, mortis kiu kaŝis tiujn trezorojn ĉi tien, tiu povus pretendi tiujn, sed ne estas ebla ĝia malo. Laĉjo konsideris ĉe la lunlumo la ormonerojn, oni faris tiujn en la tempo de Lipót kaj tiuj ne de antaŭ longe estas sub la tero! Pro tio ĉi li remetis duonon de la multekostaĵoj en la kaldronon en la originalajn lokojn, poste metis sur ĝin teron kaj flugcindron kaj ĝian lokon signis per fosteto por ek trovi aliokaze.

Li ekiris de la loko, sed ekscitite turnis sin. Li kredis, ke lia febra maltrankvileco tuj ĉesas, se li forlasas la ruinojn. Sed li estis ankaŭ pli malfrue maltrankvila kaj eksidis sur la ŝimaj multekostaĵoj. La afekcio tiel lacigis lin, ke li apenaŭ trenis sin pene pro la laceco. Li eksidis sur ŝtonon antaŭ iu malalta domo kaj apogis sian lacigitan kapon al la dorso de sia hundo.

– Mia kara hundeto! Ĉi iĝis sinjoro! Ĉi estas mia providenco!

Li karesis, batadis kuname tiun kaj tiu alrigardis lin saĝe, malgaje, kvazaŭ ĝi kompatus lin.

– Kaptu, kaptu! – aŭdiĝis nun en la silenta strato bruegoj de kurantaj homoj, dum ili proksimiĝis al li.

La koro de Laĉjo komencis bati pli febre, ĉar li pensis, ke li estas pelata. Pro tio li komencis kuri al la urbo. Sed subite la plej potenca instinkto haltigis lin. Li atingis tiun parton de la strato, kie la aero havis rostaĵodoron. Ĉi tiuodoro estis apud la drinkejo. Ĝia pordo estis malfermita kaj de tie alloga vaporo de la kuirejo forvaporiĝis.

Laĉjo enkuris tien anheletante. Pro la timo li ne rimarkis, ke la strata minacanta bruego iĝis gaja ĝojkriado. Oni neniun volis kapti, sed nur la paĝioj de la regnestro kaptoludis. En la drinkejo „Orurso”, ĉar oni nomis la faman drinkejon de Gyulafehérvár, nome la prapatroj de la drinkejmastroj havis simpation pri rabobestoj kaj siajn restoraciojn baptis laŭ la nomoj de tiuj bestoj; poste tre malrapide la „urso”, aŭ „tigro” iĝis post jarcentoj „lupo”, poste ili kontentigis per la „taŭro” kaj nuntempe bona estas la „grifo”, aŭ la „aglo” (kvankam ĝustadire ĉe ni la aglo estas la vera rabobesto.) Do, mi diras, ke en la drinkejo „Orurso” la nova gasto kaŭzis sensacion, kiu tiel enpenetris tien, kvazaŭ estus li pelata.

La gastoj, kelkaj nobeloj, kiuj ĉirkaŭsidis unu tablon, vespermanĝis, subite ĉesis paroladi, ĉar la drinkejmastro, sinjoro Gregorio Nagy, subite surkapigis sian ŝafledan ĉapelon, signante, ke li volas esti nun sinjoro.

– Nu, kio estas tio? – diris li moroze.

– Mi volas manĝi, – anhelis la gasto.

– Mi tion kredis, ke vi volas kuri al la muro. Sed aŭdu via ekscelenco, la bonan volon havanta homo kutimas levi sian ĉapelon kiel saluton, kiam li enpaŝas ien.

Iu el inter la diskutantoj indiferece eknotis:

– Mi vidas, ke iĝis trua via poŝo, mia sinjoro, ĉar vi faligas kelkajn ornametaĵojn.

Laĉjo timante kliniĝis al la tero kaj vidis, ke la smeraldoj kaj diamantoj elfaletas el lia poŝo kaj ruliĝas sur la tero. Estis evidente, ke tio okazis, ke dum la kuro, la poŝo de la dolmano truiĝis pro la peza ŝarĝo.

Cetere li povis kolekti tiujn kuraĝe, ĉar neniuj atentis lin (ankaŭ ne Gregorio Nagy), kiun li devis demandi ankaŭ kvaroble timeme: ĉu estos iu manĝaĵo?

- Tiu estas, kiun vi kunportis – tiu respondis fine senkompate flegme.
- Ja se mi portintus tiun, tiam mi nun ne petus manĝaĵon.
- Nu, sed mi nenion povas doni al vi.
- Sed mi povus pagi por tiu kunĝoĵe.

Li elprenis ormoneron el sia poŝo kaj plurfoje ĵetis supren kaj ĉiam kaptis tiun.

– Vane vi ekscitetas per tiu flava monero, ĉar neniuj povas ricevi manĝaĵon, ĉar ĉi tie ni kuiris por la ĉasistoj tion kion ili ĉaskaptis. Cetere, kiu vi estas, amiĉjo?

– Mi estas nobelo László Fáradi Vereŝ.

– Aha! – ekkriis gaje Gregorio – do vi estas tiu, kiu estis almozulo kaj iĝis nobelulo de la regnestro. Mi vidas, ke ankaŭ oron donis al vi lia sinjora moŝto. Kompreneble li havas tion abunde. – aldonis li ironie mokante, – se tio elĉerpiĝas, la lando donas al li.

Ankaŭ la ĉasistoj jam aŭdis kio okazis en la fortikaĵpalaco. Ĉiuj klaĉoj disvastiĝas rapide, ĉefe la kortega klaĉo. Do, ek! Post kelkaj minutoj saltis la drinkejmastro kaj manpremis kun la novalveninto.

– Do, kial vi ne diris, kamarado, ke ankaŭ vi estas vera nobelo? Ja, tio ne gravas, ke via nobela dokumento estas ankoraŭ malseka.

– Kaj estas vinodora – interparolis la alia sinjoro.

– Tio nur signifas, ke vi estas praulo kaj ni estas nur idoj. Sed kontraŭ tio ĉi sidiĝu al nia tablo, kamarado, kaj manĝu, drinku kune kun mi.

Poste ili sidigis Laĉjon al la ĉefloko ĉe la tablo, antaŭ lin metis la manĝaĵon, drinkaĵon unu kun aliaj konkurante laŭkutime, kiam iu tre honoras ilin per sia ĉeesto.

– Mi estas Farkaŝ Nalácz³⁴. – prezentis sin iu bruna, pinte torditajn lipharojn portanta viro, – ĉi tiu estas Stefano Veér, tiu estas Gabrielo Petki, la alia estas Nikolao Kovaŝóczi. Nun jam vi konas nin. Ni ĉiuj estas gajaj buboj. Ni ĉasadis iomete. La ĉaskaptaĵon la mastro Gregorio kuiris por ni senpage. Sed la koston de la vino tiu pagas, kiu havas plej malmulte da mono. Ĉe ni ĉi tio estas la kutimo. Mi esperas, ke vi ne kontraŭas ĉi tion.

Laĉjo skuis la kapon ridetante, montrante, ke li ne kontraŭas tion. La bubo estas impertinenta, – diris mallaŭte Petki al Kovaŝóczi, – ĉar se li ne tio estus, li ne akceptintus la interkonsenton.

– Nu, mi elmetas lin al provo, – flustris kiel respondon Kovaŝóczi.

Dum Laĉjo manĝis – drinkis avide, la junaj sinjoroj daŭrigis la paroladon; ili rakontis ĉasaveturojn, parolante tekse-mikse kaj mensogis teruraĵojn. La barono de Manks havis feliĉon, kiu tiutempe ne ekzistis, ĉar li honuis. Pri Stefano Veér okazis tio, ke iufoje en Retyezát³⁵ iu terure granda aglo sur lian pafiltubon eksidis kaj li devis forskui de tie pli frue por ke li povu pafi komforte. Pli mirinda estas la kazo de Nikolao. Antaŭ lin saltis iu leporo brue ne longe antaŭ la alveno de Roĵomak. Li ĝuste celis per la pafilo, la leporo ne forkuris, sed ekhaltis aŭdace sur siaj malantaŭaj piedoj, la svelta korpo leviĝis same kiel la simio kaj per siaj antaŭaj piedoj ĝi minacis lin. Li efike de tio ektremetis kaj ŝokiĝante faligis el siaj manoj la armilon.

Laĉjo ekridis, aŭskultante la historion de la minacanta leporo.

– Mi ne toleras la mokan ekridadon. – kriis kolere Kovaŝóczi kaj tiel teren ĵetis iun argilkruĉon, ke ĝi disrompiĝis je eroj. – Mi postulas kontentigon.

³⁴ La nomojn havantajn cz, bonvolu elparoli simple kun la sono: c.

³⁵ Retyezát (bv. elparoli retjezat) estas 2509 metrojn alta monto en la Sudaj Karpatoj en Rumanio, tie situas la plej multaj rumaniaj kraterlagoj. Bildojn vi povas rigardi ĉe:
<https://hu.wikipedia.org/wiki/Retyez%C3%A1t-hegys%C3%A9g>

La kamaradoj eksaltis por trankviligi la furiozanton.

– Nu, nu! Via kolo tute streĉiĝis, vi iĝis ruĝa. Ja neniŭ ofendis vin.

– Sed jes! Mi vidas per la vizaĝo de sinjoro Vereŝ, ke li ne kredas tion, kion mi diris. Pro tio mi postulas lukti per glavo unu kun la alia.

Laĉjo balbutis mirante.

– Ĉu temas pri mi?

– Jes, pri vi – respondis Naláczi, – nun vi devas deklari je via nobela vorto, ĉu vi kredas la historion de la leporo, aŭ ne? Ĉi tio estas la decida.

Laĉjo rimarkis, ke la aliuloj provokas, pro tio li respondis eviteme:

– Se vi kredas, tiam ankaŭ mi kredas.

– Li estas ankaŭ malkuraĝa – flustris Kovaŝoczi al Petki, kiu klopodis ekkoni la novnobelon.

– Kaj ankoraŭ li estas ankaŭ stulta, – aldonis Gabrielo Petki – nun mi elprovas rilate de tio ĉi.

Poste laŭtvoĉe li diris:

– Nu, ĉi-kaze sankta estas la paco, ĉar Ladislao Vereŝ diras, ke li kredas la historion pri la leporo. Premu manojn unu al alia. Sed nun ankaŭ vi rakontu iun ĉasaventuron, nova kamarado!

– Li pravas! Ni volas aŭdi! Jam ni ĉiuj rakontis tiujn!

– Mi neniam ĉasis.

– Tio ne gravas ĉe tia homo, kiel vi estas. Ja vi ne estis en la Transmondo kaj kontraŭ tio rakontis al la regnestro tion, kio estas tie, kaj kio ne estas tie.

– Se vi ne havis ĉasaventuron, tiam certe vi havis ceteraĵojn. Io ĉiam okazas kun ĉiuj.

– Vi pravas! – diris Ladislao Vereŝ, – mi rakontos mian aventuron kun la urso.

– Ni aŭdu! Ni aŭdu! Sed unue ni drinku!

Ili ĉiuj tintigis la glasojn kaj poste Laĉjo komencis rakonti, dum la aliaj ege atentis:

– Kiam ni venis al Transilvanio tra la Reĝo Montpasejo, tiam ni restadis tie en la arbaro inter la karbigistoj. Subite dum la vagado mi rimarkis inter la arbustoj du brilajn fulmetadantajn okulojn. Mi teruriĝis. Ĝi estis urso. Mi ege timegis, ĉar nek armilo nek poŝtranĉilo estis ĉe mi. Mi staris en la mezo de iu senarbejo kaj la urseto, dume la urseto ekvidis min elpaŝante el la veprejo, paŝadis al mi. Pro timo unue mi estis senkonscia, sed nevole mi komencis kuri. Tio estis feliĉo, ke en la arbustejo estis iu giganta fendego kaj super ĝi estis arbotrunko, kiun iu tempesto faligis super la fendegon. „Mi estas savita!” – mi kriis. Ja mi devis kuri al la transa flanko kaj puŝi en la fendegon la arbotrunkon kaj la urso ne povos sekvi min. Tiel okazis, kiel mi pensis. La urseto postkuregis min kaj grincigante la dentojn, ĝi devis halti sur la bordo senpove. Mi paŝadis sur la knaranta arbotrunko kaj pensis, ke mi estas en sekureco, kiam mi vidis, ke sur la transa flanko atendas min alia urso. Imagu, sinjoroj, la situacion!...

– Nu, kio okazis poste? – demandis ili kaj aŭskultis kun retenata spiro.

– Mi rekomendis mian animon al Dio ...

– Do, kion la ursoj faris?

– Kion ili farus? Ili kaptis kaj formanĝis!

Ah! Ili ne atendis ĉi tian respondon. Gabrielo Petki unue elpuŝis la seĝon de sub si.

– Hej – li kriis brakumante la kolon de Laĉjo, – ja vi estas ege bona knabo, kiu nin ege primokis. Ni rekonas tion. Kovaŝoczi volis elprovi vian kuraĝon kaj mi vian pensmanieron. Nu, vi provis samtempe ambaŭ. Vi havis kuraĝon por ridindigi nin kaj samtempe ankaŭ por ekbriligi vian pensmanieron.

Unu post alia ili manpremis kun Laĉjo kaj poste la konversacio okazis tute alivoĉe. Laĉjo sentis, ke li havas prestiĝon kaj pensis, ke nun jam nur duono de tiu ĉi granda amikeco estas ŝerco.

Ili amuziĝis ĝis noktomezo, fine Stefano Veér lanĉis proponon: „Nun jam estas ege malfrue. Ni pagu kaj drinku la benon de Johano, la Sankta.” Kovaŝoczi kaj Petri komencis

flustradi, dirante, ke jam ili ne devus meti embarason al Laĉjo, sed devus ĉesigi la ŝercon kaj elpagi la kostojn de la amuzo. Sed dume Laĉjo menciis la sekvan temon:

– Jes, jam ankaŭ mi dormemiĝis kaj ege atendas por enlitiĝi. Nu, ni vidu la paganton, poste ni disiru.

– Ĉu ni vidu la paganton?... Ĉi tiu demando ĉagrenis sinjoron Kovaŝoczi. Ĉu li ne scias ankoraŭ, kiu estos la paganto? Nu, ni faru provon!

– Sinjoro Gregorio Nagy, ni pagas! Hej, knaboj, kiom da monoj vi havas? Kiu havas la plej malmulte?

Li elprenis el la poŝo burson kaj montris tiun tintigante:

– 120 pecoj da ormoneroj estas en tiu burso.

– Ankaŭ mi havas proksimume 100 pecojn da ormoneroj – diris Petki kaj ŝutis sur la tablon la enhavon de siaj poŝoj.

Laĉjo Vereŝ diris ridetante:

– Nu, laŭ ĉi tio mi jam vidas, ke ne mi estos la paganto.

– Kial? – kriis la aliaj – kial vi pensas tion?

– Ĉar mi havas pli da moneroj, ol vi!

Laĉjo elverŝis el iu poŝo de sia dolmano la ormonerojn kaj multekostaĵojn, efike de tio la okuloj de la aliaj blindiĝis.

– Ja ĉi tio estas ege multe da moneroj – teruriĝis Stefano Veér – tiu havas tion, kiu ne fordiboĉas tion. – respondis Laĉjo ŝercadante.

La kamaradoj iĝis preskaŭ saloidolo, sed fine Farkas Nalácz ekparolis:

– Konfesu, ke vi superruzis hodiaŭ la regnestron.

– Per kio?

– Per via foruzita vestaĵo.

Laĉjo ridis, sed nenion respondis. Dum ili eliris el la drinkejo, Laĉjo turnis sin al la knaboj:

– Kiu donas al mi noktan dormejon el inter vi?

Tri proponis, ke li donos al li dormejon, sed Laĉjo akceptis la proponon de Petki.

– Je kioma horo vi ellitiĝas? – demandis Petki.

– Frumatene, ĉar mi foriras plu de tie ĉi.

– Kien vi iras?

– Por serĉi mian pli maljunaĝan fraton.

– Kie estas via pli maljunaĝa frato?

– Mi ne scias, sed mi devas ektrovi lin.

Matene la Gyulafehérvár-anoj aŭdis interesajn onidirojn, kies duono estis vera. Nome tio estis vera, ke la pli frue ellitiĝintoj trovis po unu unu ormoneron sur la strato, kie Ladislao Vereŝ hieraŭ vespere kuris kaj lia poŝo estis trua. La infanoj trovis etajn brilantajn ŝtonetojn, pri kiuj tia famo disvastiĝis, ke tiuj estas orientaj perloj kaj multekostaĵoj. La famo atingis la orelojn de la regnestrino. Pro tio ankaŭ sinjorina moŝta estante scivola ordonis porti en la fortikaĵon ĉi tiajn kelkajn trovitajn ŝtonetojn: fakte, tiuj estis la plej belaj smeraldoj kaj perloj. La regnestrino ordonis porti ankaŭ ormonerojn, sed nur famo ekzistis, ormoneroj ne, ĉar kiu posedis tiujn, tiu sekretiĝis. Sinjoro Alberto Sana, oraĵisto de Gyulafehérvár, serĉis tiujn kuradante sur la stratoj kiel frenezulo, demandante la infanojn, kie ili trovis la trezorojn? Ĉe la kortego de la regnestro kaj ĉe sinjoro Miĥaelo Teleki oni ne parolis pri ceteraĵoj, nur pri la mirinda okazo, kies kaŭzon neniu povis diveni. Fine ĉirkaŭ la tagmezo, dum oni purigis la ĉambron de la drinkejo „Ora Urso”, trovis unu peco de fajnaj perloj. Sinjorino Gregorio Nagy portis tiun perlon tuj kurante al la palaco de la regnestro por raportii pri tio, de kiu devenas tiu perlo. Iu junulo amuziĝis kun aliaj sinjoroj, kiu venis kun iu blanka hundo. Lia

poŝo estis trua kaj de tie falis similaj perloj al la tero. Sed tiu junulo ne tre zorgeme kolektadis la perlojn, nur malvolonte.

Kiu estis tiu junulo? Oni devus scii tion.

Ĉi tiu enigmo ne povis resti sekreta longe, ja Gyulafehérvár estas tre malgranda urbo. La noktaj kamaradoj disvastigis la famon en la tuta urbo, ke iu fremdulo estis tie. Ĉe Petki li dormis kaj frumatene aĉetis de tiu noblan ĉevalon kaj sur ĝi forgalopis ien al Kolozsvár³⁶. Treege multe da trezoroj estis ĉe li. En lia poŝo estis grandaj diamantoj, similgrandaj kiel pugno. Tiu ne povis esti alia, olk Ladislao Vereŝ, la migranta malpura studento, kiu iĝis de la regnestro nobelo ekde la hieraŭa posttagmezo.

Laŭ tio ne estis malfacile diveni la ceterojn.

Tiu ne povis esti migranta studento. Tio estas maleblaĵo! Kiel povas aĉeti la studento tioman trezoron? Ĉu li ŝtelis ie, kie? De kiu li estus povinta ŝteli tiujn? Kiu ne havas ekde hieraŭ siajn trezorojn? Tiu povus elpigi el sia duonpoŝo la plej riĉan sinjoron de Transilvanio!

Ĉiam pli kaj pli bone troigate disvastiĝis la famo, ĝis fine oni konstatis, ke tiu ne povis esti alia, ol ia maskovestita reĝido.

– Do, kial tiu estis ĉi tie?

– Ej, kial venas tien ĉi tiuj maskovestitaj reĝidoj?

– Por akiri edzinon.

Se tiu venis ĉi tien por akiri edzinon, tiam li certe ekvidis kaj ekamis la belan fraŭlinon de la grandpotenca sinjoro Miĥaelo Teleki.

La familio Teleki komencis veran esploron, el kiu iĝis evidente, ke la moŝta reĝido volis atingi la familion Teleki, sed la gardistoj ne enlasis tiun. Ja pro tio oĉjo Iŝtók havis multe da problemoj kaj spionoj ekiris al ĉiuj direktoj por subesplori la restadlokon de la reĝido.



Gyulafehérvár – Grafikaĵo – gazetdetalo, 1868

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=48884>

³⁶ Pri la rumania setlejo Kolozsvár, bv. vidi pli multe ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Klu%C4%B5o>

10. Ĉapitro

Agnesa Nesselroth

Laĉjo ekiris al Vieno pensante, ke tie, en la imperiestra kortego li ektrovos Steĉjon. Ja se lin akompanis la fortune, tiuokaze certe ankaŭ Steĉjo atingis sian celon.

Li povis vojaĝi facile, li havis multe da mono, li povis ŝanĝi ĉevalojn, ĉarojn. Ĉie dumvoje oni pensis, ke li estas ĉefnobelo. Atingante la urbon Kolozsvár li informiĝis pri tio, ke la imperiestro Leopold iros al Buda baldaŭ. Jam tiu ekiris el Vieno. Nu, tiam estas ege granda raraĵo en Hungario. Ekde tiam, ke la malfeliĉa reĝo Ludoviko la 2-a endronis en la rivereton Csele³⁷, ekde tio iĝis malplena la fortikaĵo de Buda kaj la du urboj iĝis silentaj kaj senvivaj sur la dekstra kaj la maldekstra bordoj de Danubo. Ankaŭ la nacio orfiĝis. Nome pli malbona afero okazis pri ĝi, ĉar ĝi havis ĉiam iun duonpatron en Vieno.

Do, Laĉjo iris rekte al Peŝto. Ĝuste tiam oni atendis la imperiestran kortegon kaj prepariĝadis por akcepti tiun per ĉiaspecaj pompoj. Triumfarkoj estis starigitaj ĉie kaj standardoj flirtis sur la domoj kaj la klostroj. Kio koncernas Peŝton, nian belegan ĉefurbon, kiun vidante, ĉiuj hungaraj koroj rapidege pulsas, bedaŭrinde ne estis multe da vidindaĵoj.

Tempe de la regado de Leopold en la urbo ekzistis nur la interna urbo. De muroj kaj bastionoj zonita la urbo havis nur tri urbopordegojn: fine de la strato Váci estis la pordego de Vác, fine de la strato Hatvani estis la pordego de Hatvan³⁸ kaj ĉirkaŭaĵe de la placo Kálvin³⁹ troveblis la pordego de Kecskemét⁴⁰.

La etaĝa domo estis rara. La konstruaĵo de la monaĥo de la instruordeno „Ordo Scholarum Piarum” estis la plej bela, plej granda domo de Peŝto. La aliaj monaĥejoj estis apenaŭ signifaj. La nuna departementa domo ne ekzistis, sur la loko de la Karlo-kazerno estis malplena placo, kie printempe estis pluraj marĉetoj, en kiuj la ranoj laŭ sia ŝato povis kvaki. La paroĥpreĝejo ekzistis ankaŭ tiam kaj portis la orgojlan nomon „Katedralo”. La piaj filistroj kredis, ke ĉi tio estas la plej bela konstruaĵo tutmonde.

La hungaroj ne ŝatis Leopoldon, sed Peŝto tamen akceptis tiun grandpompe, ĉar sinjoro Tomaso Nesselroth, la urbestro ĉiumaniere volis plaĉi al la imperiestro.

Tiu estis gloravida, satana homo, kiun la civitanoj malamis, kaj kiam oni interkonsilis en la urbodomo (kiu staris sur la loko de la nuna urbodomo) pri la akcepto de la imperiestro, ke ankaŭ la popolo ĝoju, ankaŭ la imperiestro estu surprizita kaj la festado estu malmultekosta (ja la tuta enspezo de la urbo ne estis pli ol 13 430 forintoj Rhenius-aj), alparolis unu hungara kuraĝa civitano:

– Sinjoroj, prefere plej celdirekte estus, se la sinjoron urbestron oni pendigus sur la pordegon de Vác, de kie alvenos la sinjoro moŝta. Efike de ĉi tio ni povas atingi ĉion, ĉar la sinjora moŝta estus surprizita, ankaŭ la popolo povus tre ĝoji kaj tio estus ege malmultekosta.

Iĝis granda ridego. Sinjoro Nesselroth ruĝiĝis kaj kolerege kuregis el la konferencejo. Sed kion signifas por tiu la moko kaj malestimo de la civitanoj, kiuj turnis sin al la potenco? Tiu ne aŭdas, ne sentas la ceteron krom la potenco, ties nervojn tiklas eterne la imaga sunlumo. Pro tio sinjoro Nesselroth organizis pompan akcepton al lia sinjoro moŝta, kio ne okazis en la urbo Peŝto-Buda ekde la enmarŝo de la hungara reĝo Matiaso. Se eĉ ne tio ĉi portas honorigon, ordenon, tiam ne indas vivi en la mondo.

Ja tiu portintus honorigon, ĉar sinjoro moŝta jam enskribis en sian notlibreton la nomon de Nesselroth, nome li estis treege kontenta pri la akcepto, sed la kruelega destino (ankaŭ tiu

³⁷ La nomo de la rivereto elparolendas: ĉele.

³⁸ Hatvan estas hungara urbo.

³⁹ Bv. vidi la artikolon pri Johano Kálvin: https://eo.wikipedia.org/wiki/Johano_Kalvino

⁴⁰ Kecskemét estas hungara urbo. Pri ĝi: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kecskem%C3%A9t>

laboris por la revolucio) ne lasis plenumi la deziron de Nesselróth, ĉar la plej belan lojalecon aliigis al la plej granda malĝentilaĵo.

– Ĉu tio povas esti?

Jes, nome sinjoro Nesselróth estis en la mano de la destino. Okazis pri tiu la sekva okazo. Li devis transdoni al lia sinjoro moŝta la petskribojn (multe da skribaĵoj alvenis al la sinjoro moŝta), samtempe ankaŭ la ornamanta majstro transdonis sian konton por faroj de la triumfarkoj kaj por ĉiuj dekoracioj (du mil forintoj de Rhenius)⁴¹. Lia ekscelenco senkonsciigis kaj tiun malfeliĉan skribaĵon ĵetis inter la petskribojn. Nature li tion faris sen sia scio, ĉar li nur tiam divenis la teruran aferon, kiam post kelkaj semajnoj (ĝuste kiam li atendis la ordenon) alvenis 2000.- forintoj de la kortega mastrumada oficejo, rimarkante, ke nun sinjoro moŝta elpagas la konton, sed atentigas la magistraton, ke ĉe la sekvajara vizitado al Peŝto estu neniu ceremonio.

Sed ĉio-ĉi estas flankaj en nia historio, sed ni ne povas fermi la okulojn antaŭ unu afero: antaŭ fraŭlino Nesselróth, la filino de la urbestro, kiu estas pli valora, ol ĉiuj ordenoj en la tuta mondo.

Agnesa Nesselróth estis la plej valora fraŭlino de Peŝto; en tiu tempo; en ŝiaj okuloj mildeco speguliĝis, el movoj ĉiuj ŝiaj estis ĉarmo kaj gracio estis. Sed se ŝi estus dekoble pli bela, pli bona, tiam ĉi tiu kroniko ne menciis. Sed dum la vizito de la imperiestro, ŝi por rigardi la marŝadon, hazarde eksidis ĝuste sur tiun tribunon, kiu enfalis sub la homamaso kaj la sur tiu sidantaj homoj falis sur la akran ŝtonaron.

Ankaŭ Agnesan estus trafinta la sama destino, se ne estus ĝuste tie iu bela juna nobela sinjoreto, kiu dum la fatala momento kaj dum la falo ekkaptis la ektimintan fraŭlinon. Agnesa ankoraŭ aŭdis la krakadon de la lignotabuloj kaj la kunfalon de la tuta aĉa tribunon. Ŝi ekkriis kaj senkonsciigis, sed plue ŝi ne sciis, kio okazas.

Ŝi restis sveninta inter liaj brakoj kaj ŝiaj okuloj restis fermitaj, spite de la krio de la homamaso: „Tiu venas! Tiu venas!” Kie la moŝto iradis, tie sonegis la teron movanta „vivuado.” Hufferoj de kvarcent ĉevaloj bruegis sur la ŝtonaro, sed la okuloj de la fraŭlino restis fermitaj.

La kavaliro sternis sian nigran dolmanon sur la teron por kuŝigi ŝin. Sed en la tumulto oni preskaŭ mortotretis la belan malsanulinon, pro tio la knabo prenis ŝin en siajn brakojn kaj portis en la najbaran domon, kie loĝis iu malriĉa tajloro kaj liaj kvar filinoj.

Sinjoro Johano Babó estis konata kiel fama popoloratoro kaj malamiko de la potenco. Ja ĉi tiu sinjoro estus kun ĉi tia karaktero ankaŭ membro de la nobla botisto-gildo. Feliĉe estas, ke prefere tiu verkis versojn hejme kaj ne iris rigardi la enmarŝon de la imperiestro. Tiu vidis jam ankaŭ pli bonan sinjoron: Emeriko Thököly. Siajn filinojn li ne lasis iri rigardi la imperiestron.

Tio estis bona, ĉar almenaŭ la filinoj komencis flegi Agnesan, ili akvumadis, kaj per varma avensaketoj provis revivigi ŝin; fine Agnesa malfermis siajn belajn parolemajn okulojn.

– Kie mi estas? – ŝi demandis lace.

– Vi estas inter bonaj homoj – respondis la junulo, kiu lace, ekscitite atendis la reviviĝon de la fraŭlino, – ne timu, vi havas neniun malbonon.

– Kiel mi atingis ĉi tien? – balbutis ŝi konfuzite, ĉirkaŭrigardante maltrankvile en la fremda loko.

– La seĝoplato de la tribunon enfalis, fraŭlino, ĝuste mi staris tie kaj ekkaptis vin. Ĉi tio okazis.

– Ho, ve! Mia Dio! Kio okazis pri mia onjo? Mi rememoras jam. Kio okazis pri mia onjo Franciska?

– Mi ne scias. – respondis la kavaliro gaje, – nur mi pensas, se la ripojn ŝi ne rompis, tamen la nazo certe rompiĝis. Ja ŝi sidis alte.

⁴¹ La nomitaj Rhenius forintoj ricevis sian nomon el la rivergapudaj, la Rejno-apudaj provincoj.

La knabineto (ĉar ŝi estis ankoraŭ vera dehiskanta burĝono.) komencis ploregi kaj amare priploris: „Ho, ve, kara onjo Franciska!”

– Ĝoju, fraŭlino – diris iu filino de la tajloro, kiu fervoradis ĉirkaŭ Agnesa, – ĉar vi saviĝis.

Dume Agnesa, kvazaŭ ĝuste onjo Franciska atentigus, ke ŝi faris malbonan aferon, subite kolektis sian kuraĝon kaj donis la manon al la savinto.

– Pardonu min, ke inter miaj zorgoj, kiujn kaŭzis la malcerta sorto de mia bona onjo, mi iĝis forgesema. Mi dankas al via ekscelenco, por tio, kion vi faris en mia intereso. Nek mi, nek mia patro forgesos. Mia patro estos devontiganta sin pro via helpo. Ho, se vi, savintus ankaŭ mian onjon!

– Mi nur vin vidis, fraŭlino!

– Sed ŝi sidis apud mi, povruleto – respondis Agnesa naive.

– Ja multe da homoj sidis tie, sed mi devas konfesi ion: mi estis simila al ekskursanto, kiu ekvidis sur la kampo inter milionoj da herboj unu tulipon kaj mi volis ekkapti la tulipon.

Agnesa nur nun rigardis unuafoje al la parolanto kaj ruĝiĝis ĝis la oreloj. okulmalleve naive. Ĉi tio estis tutcerta signo, ke ŝi taksis ĝentila la junulon laŭ tiu onidiro. Ĉi tiu onidiro ĉe pli aĝa homo kalkuliĝas kiel kavalira komplimento kaj ĉe sama belega junulo tio estas petolema amindumo. Al Agnesa Nesselróth kaj la amaj fraŭlinoj ne estas permesate por diri samajn aŭdacaĵojn, – tiome subite! Ŝi aŭstere ekrigardis al nia kavaliro.

– Ĉu vi fartas pli malbone? – demandis la kavaliro maltrankvile.

– Dankojn al vi pro la maltrankvilo, mi konsciiĝis tute kaj estas kapabla hejmeniri.

– Mi akompanos vin, fraŭlino.

– Tio ne estas bezonata, – ŝi diris rifuze, sed baldaŭ bedaŭris, ĉar ŝi tuj aldiris milde: – „Mia sinjoro, oni misfamigus min”.

Poste ŝi ekstaris kaj dankante pro la afableco de la domanoj, senĝene kaj vigle foriris kune kun la junulo, dum li metis kiel donacon unu ormoneron sur la tablon de la tajloro por la flegado:

– Ho, mia Dio, tion vi faras por mi – lamentis la fraŭlino, – kiel mi kapablos repagi tion al via ekscelenco? Mi ne havas moneron, mia sinjoro.

– Nu, ja! – ekkriis la bonhumora sinjoreto. – Do, vi donos kontrakton pri ĝi. Ĉu bonos?

– Jes, jes, mia patro repagos tion, sed li nun ne estas hejme kaj mi estas en embaraso... Bonvolu halti!...

Ŝi rekuris ridetante de la sojlo al la ĉambro de la tajloro.

– Ĉu vi lasis tie ion? – demandis la junulo, kiu atendis en la korto por adiaŭi.

Mi estas Agnesa Nesselroth, filino de la urbestro. Mi surkribis por via ekscelenco sur ĉi tiun paperfolion. Se vi volas, skribu super ĝin ankaŭ mian ŝuldon por repagi tiun. Tio estas kontrakto por mi!

– Bone, fraŭlino. Mi akceptas ĉi tiun paperfolion kiel memoraĵon. Kvankam mi rememoros ĉi tiun duonhoron ĝiseterne.

– Ne, ne, vi devas resendi tiun. Do, kiel oni nomas vian ekscelenco por gardi vian nomon? – ŝi demandis poste iomete honteme.

– Ladislao Fáradi Vereŝ.

Ĉe la pordego ili disiĝis. Agnesa iris maldekstren sur la bordo de la rivero Danubo al sia hejmo, ĉar la familio Nesselróth loĝis apud la domo de la filino de la turka imperiestro. Kaj Laĉjo miksiĝis inter la ondanta popolamaso, ja nun ĉeestas feliĉulo-malfeliĉulo nome de la tuta mondo. Povas esti, ke li povas informiĝi pri sia frato, aŭ povas renkontiĝi kun tiu. Ho, kiom bele lia animo pretiĝis por renkontiĝi kun sia frato. De Gyulafehérvár ĝis nun la renkontiĝo estis lia sola sonĝo kaj veke kaj dorme. Nome dum dormo ĉiunokte li renkontiĝis kun Steĉjo inter multspecaj rilatoj. Unufoje li vidis tiun kiel almozulon sur la rando de vojo, ĉe la piedo de barilo de liceo. Aliokaze li vidis tiun en brila vestaĵo sidanta en luksa kaleŝo kaj postkriis: „Steĉjo, Steĉjo!” – kaj li vekiĝis. Li vidis tiun vundita sange agoniinta sur la

batalekampo. Iunokte li promenis en iu tombejo kaj vidis surskribita sur granda marmorŝtono la sekvan: „Ĉi tie ripozas Stefano Vereŝ.” Aliafoje tiu estis sur katedro de Debrecen kaj prelegis pri Cicerono. Unuvorte li pripensis pri sia frato multfoje tage-nokte, poste la noktaj feinoj lin ĉiam aperigis antaŭ lin malgaje, aŭ gaje laŭ siaj kapricoj.

Sed la tagaj feinoj estas malrapidaj fenomenoj. Tiuj iradas en pezaj botoj! Ili ne perfidis, ne malkaŝis la restadlokon de Steĉjo. Sed kiom li sopiris tiun. Kiom feliĉe li diros al tiu: „Mi estas nobelo kaj krome riĉulo kaj ankaŭ vi estos nobelo de ni. Ni havas monon, abunde, dank’ al Dio. Se la mono elĉerpiĝos, tiam tie estas ĝia alia duono kaj mi reiros por ĝi. Poste ni aĉetos kastelon, belan bienon, arbaron, plugkampon, riĉajn falĉherbejon, kvar virĉevalojn okaze de la foiro de Debrecen. Ni jungos la ĉevalojn al la kaleŝo ormamitan kaj iros al Szeged kaj kunportos per la kaleŝo la geedzojn Doboŝ al la kastelo. Ĉi tiu estos nia unua komuna veturado.

Kiom belege estos, kiam tiuj gemaljunuloj paŝos sur la verandojn kovritajn de marmoroj kaj rakontos unu al la alia: „Ja niaj studentoj estas honestaj knaboj!” Sed ankaŭ nia dua veturado estos agrabla. Nu, Steĉjo, ĉu vi scias, kien ni iros sur la kaleŝo poste? Ho, vi havas malbonan kapon. Kien ni povas iri, vi estas bubo, do ni iros gaje al Debrecen, al la kortego de sinjoro profesoro Szilágyi... Povas esti, ke tiu kara belega fraŭlino ankoraŭ tie estas, kiu iam donacis la fiksilon por teni la glavon sur la talio. Kio estos poste? – demandas Steĉjo. Poste okazos la tria veturado. Kien? Ĉi tion vi jam ne povas diveni, ja tion nur mi scias. „

Kaj li postrigardis la forirantan Agnesan revadante, sed povis vidi eĉ ne la angul-pinton de ŝia jupo, ĉar ŝi malaperia en la homamaso. Li iradis inter la homoj, devis gardi sian hundon por ne postresti. Dume li teksis la estontajn planojn, konstante korektadante tiujn. Ja ankaŭ tio estas bona amuziĝo.

Vere tamen estus pli bone, se li povus akcepti la geedzojn Doboŝ en la korto de la kastelo kun kiel dommastrino la bela Magdalena Szilágyi. Jes, li devas ankaŭ ne forgesi pri la kuirejo, kaj la manĝaĵoj de la bela sinjorino, Magdalena Szilágyi atendus ilin ĉe riĉe primetita tablo. Ĉi tio estus la vera amuzo! Unue ni kunportos Magdalenan en la kastelon. Ĉar la domo, la kastelo estas aŭstera sen sinjorina rideto. Kaj se ankaŭ Agnesa estus tie! La bela Agnesa Nesselroth! Se ŝi dirus freŝe, afable, junece: „Dio portis vin, onjo Doboŝ!” kaj brakumus, kius la bonajn gemaljunulojn, kiuj pro tio ĉi faligus larmojn kaj la larmoj fluetus sur iliaj faltaĵ vizaĝoj. Jes, Agnesa ni unue kunportos!

Li pensadis pri Agnesa treege multege kaj iom post iom nur ŝin volis vidi en la kastelo kaj ne pensis pri la aliaj...

La enmarŝo de la kortego de la imperiestro jam finiĝis. Pro tio ĉeestis homoj por pribabilaĉi la viditajn aferojn, kiuj estis prezentitaj: la pompon, rigardon de la imperiestro (ja ne estis proksime de la imperiestro, dum oni inter si priskribis la fizionomiojn), la kovrilon de la ĉevalo de Nádasdy, la dolmanon de Esterházy, la multon da komikaj epizodoj. Kelkfoje venis iu kortega skribisto, aŭ riĉe vestita ĉefnobelo, kiuj estis bonaj vidindaĵoj, se aliaj ne estis.

Laĉjo esperis, ke li renkontos iun konatulon el Debrecen inter la multaj homoj, kiu informus lin pri Steĉjo. Sed en la grandega homamaso li vidis neniun konatulon. Finfine li tute rezignis la esperon, ĝis ĉe la pontonponto li ekkriis pro ĝojo. Li ekvidis Johanon Roĵomak, kiu paroladis kun kelkaj, riĉe vestitaj sinjoroj. Tiu estis vestita en ĉiutaga nigra vestaĵo.

Lia koro pulsas pli forte, li klopodis ŝovi sin antaŭen, kelkajn sinjorinojn puŝe renversis kaj tretis sur piedfingrajn kalojn de kelkaj homoj.

– Sinjoro Roĵomak! Sinjoro Roĵomak! – li ekkriis kaj alkurante, intime batis sur la ŝultron de la brava viro.

– Kia sinteno estas ĉi tio? Kion vi volas?

– Ĉu vi jam ne rekonas, sinjoro Roĵomak?

– Ĉu via cerbo foriris promeni? – tiu murmuris kolere. – Mi ne estas Roĵomak!

– Ĉu vi ne estas Roĵomak? – li diris gapante kaj dubante. – Kiu vi estas?

– Mi estas grafo Nikolao Bercsényi⁴².

Tiutempe tiu nomo ne estis fama, kiu entuziasmigus multajn homojn. Laĉjo tiel sentis, kvazaŭ oni verŝintus tinon de akvo sur lin. Li malĝoje forkaŝiris kaj ĝis plena vespero vagadis sencele sur la stratoj.

Nokte li ne fermis la okulojn. Li ĵetadis sin sendorme en sia mola lito en la hotelo „Grifo” de Buda, kie estis lia tranoktejo.

Li revadis pri Agnesa. Li primeditis ege detale sian aventuron kaj proksimume naŭfoje travivis tiujn. Kiel li kunportis ŝin svenintan al la tajloro, aŭdis ĉiujn ŝiajn vortojn sonorantajn. Li rememoris ankaŭ la blankan paperfolion, per kiu ŝi volis lin foje premii ege fajne kaj noble. Ŝi pensis: „Se li estas malriĉa homo, tiam skribu kelkajn ormonerojn sub mian nomon. Se li estas riĉulo, tiam li gardu la paperon kiel memoraĵon!”

Sed Laĉjo faris ne tiel. Li jam treege atendis la matenon, senpacience petis inkon kaj plumon de la restoraciisto kaj skribis sur la blankan paperfolion super la nomon „Agnesa Nesselróth”: „Mi, la subskribanto devigas min, fidele ami Ladislaon Vereŝ, ĝis mia morto.”

Poste li metis la blankan paperfolion en koverton, la koverton fermis kaj sigelis. Poste li portigis per la servisto de la restoracio al la domo de Nesselróth.

Li atendis la respondon ekscitite, cerbumis forte, lia koro terure batis, liaj pulmoj bezonis multe da aero. Li iris al la fortikaĵo kaj rigardis la iradantan venadantan homamason de la kortego. Dum li gapis ĉe la kradbarilo, li ekvidis en la kortego la grafon Bercsényi, kiu havis jam ne morozan vangon kiel hieraŭ. Tiu venis al li kaj demandas afable:

– Ĉu vi ne vidas proksimiĝi rajdiston el la direkto de Malnova Buda? Miaj okuloj estas iomete malfortaj.

– Mi vidas neniun. Neniu polvonubo estas sur la vojo, sinjoro grafo.

– Kial vi nomas min grafo?

– Ĉu vi ne diris, sinjoro moŝta, hieraŭ, ke vi estas grafo Bercsényi? – demandis Laĉjo ŝokiĝante.

– Ĉu mi? – respondis tiu fiksante la okulojn. – Mi estas Johano Roĵomak, la kortega intendant.

– Nu, dank’ al Dio! – ekkriis Laĉjo – finfine mi ektrovis vin, kara oĉjo Roĵomak. – Nu, ĉu vi ne rekonas min?

– Mi ne konas vin, mia sinjoro. Kiu vi estas?

– Mi estas unu el la du migrantaj studentoj, la pli juna, kun kiuj vi renkontiĝis en la arbaro antaŭ unu jaro... kiam ni manĝis la leporon.

– Mi neniam estis tie – respondis Roĵomak kiel fremdulo, sed ne miskoneble sincere.

– Vi kunportis mian pli aĝan fraton al Vieno. – daŭrigis Laĉjo hezitante.

– Mi neniun kunportis tien. Ĉi tio estas iu eraro. Ankaŭ mi aŭdis jam, ke mi estas treege simila al iu grafo, kiun oni nomas Bercsényi – li aldiris iomete orgojle, – sed mi ne konas tiun grafon.

– Tiu, kiu kunportis mian pli aĝan fraton, tiu estas tute la similulo de via ekscelenco kaj nomis sin Johano Roĵomak.

– La pigo ĝin pikis! Mi ne komprenas. Povas esti, ke la diablo portas miajn formojn kaj nomon aŭ vi estas freneziga, junulo! Mi petas vin rigardi, ĉu la rajdisto venas jam?

La rajdisto ankoraŭ ne venis, pro tio tiu foriris al la fortikaĵo murmurante nazvoĉe, tie lasante Laĉjon, kies kapo vertiĝis pro la ondantaj impresoj.

⁴² La hungara nomoriginalo estas Bercsényi Miklós (1665-1725). La familionomo bv. elparoli: berĉenji. Li estis ĉefgeneralato dum la liberecbatalo (1704-1711) de Francisko Rákóczi la dua. Li mortis en Turkio, en la nun slovakia urbo Košice (hungarnome Kaŝŝa) li estas reentombigita kune kun Francisko Rákóczi la dua, la patrino de la regnestro Helena Zrínyi kaj la plej aĝa filo Jozefo de la regnestro en la katedralo Sankta Elizabeta: <https://www.errearra.org/rakoczy-kripta>

Do, kiu estis tiu Roĵomak? Ĉu tiu estas unu aŭ du homoj? Kial tiu ne konis mian pli aĝan fraton? Kial tiu neis, ke li estas Roĵomak? Tiel ŝajnis, ke ĉi tio estis nekompreneble obskura enigmo, kiu ne havas solvon.

*

Ĝuste nun alvenis antaŭ la fortikaĵpalacon la rajdisto, kiun Roĵomák atendis. La hufferoj de ties ŝaŭmanta ĉevalo klakadis sur la ŝtonoj fajrerante. Tuj la kortegaj servistoj ĉirkaŭstaris tiun, prenante la kondukilon de la brido de la ĉevalo:

– Deĉevaliĝu rapidege kaj ne ŝanĝu vestaĵojn, ĉar la sinjoro moŝta jam atendas vin senpacience.

Post duonhoro la kortego preparis sin por ekiri kaj dum la tagmezaj horoj tiu famo disvastiĝis, ke la ekkaptita Ferenc Rákóczi la 2-a forfuĝis el la malliberejo de Bécsújhely⁴³ kaj eskapis al Pollando. Ĉiutage iu kuriero venis el Vieno. La maljuna imperiestro, la malbonon portantan kurieron kiel ŝajnis kvazaŭ ĉiutage atendis senpacience kaj ekscitnte. La hodiaŭa kuriero portis malbonan famon. La lasta Rákóczi estas libera. La ministroj kaj la kortegaj oficiroj iradis-paŝadis pale. La koĉeroj jungis la ĉevalojn antaŭ la ĉarojn kaj la lakeoj metis la pakaĵojn en la varĉarojn. Inter la burĝoj la grava famo disvastiĝis kaj dume gluitaj estis al ĝi multspecaj negravaj famoj. De tiu ĉi tago la grandega homamaso iris al la bordo de la rivero Danubo por rigardadi: ĉu la ĉielo ruĝiĝas el la direkto de Pollando ... Ĉiuj kredis, ke ĝi ruĝiĝos. Sed la grava famo Laĉjon ne interesis, ĉar dume la servisto realvenis kunportante la respondon de Agnesa Nesselróth. Ŝi skribis du vortojn, sed tiuj estis altvaloregaj por li. Ŝi resendis la etan ŝuldateston kaj subskribis per fajne skribitaj literoj:

„*Mi vidis. – Mi retenas!*”

Li ekŝrikiis pro ĝojo. Li nun ne bedaŭris, ke Rákóczi estas libera, ĉar ĉi tiu dolĉa konscio okupis lian tutan koron, ke li estas malliberulo.



La Danub-bordo ĉe Peŝt je la komenciĝo de la jarcento – gravuraĵo laŭ la gravuraĵo trovebla en la Nacia Galerio, 1898

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=39053>

⁴³ Pri la setlejo Bécsújhely bv. legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Wiener_Neustadt

11. Ĉapitro

La malaperinta feliĉo

Ĝis tiam oni rigardis en Buda la ruĝiĝintan ĉielon el la direkto de Pollando, ke ĝi iĝis vere ruĝa. Unue nur la randaĵo de la horizonto ruĝiĝis, poste la tuta horizonto iĝis ruĝa.

Kvazaŭ el la tero estus elkreskintaj harditaj herooj, la belstaturaj kurucoj⁴⁴. Tiutempe oni ne devis mesaĝi, nur sufiĉis sendi la flagojn. Tiuj kolektis la batalantojn de la tuta lando mute; kiam Rákóczi alvenis el Pollando, tiam en Hungario estis jam batalkapabla armeo, kiu pligrandiĝis, kiel neĝbulo. La malnova kuruca kanto pli bele, bone rakontas tion, ol mi:

*Sur rempar' de Munkács⁴⁵
sin Rákóczi montris,
per glav' sin apogis,
lia voĉo tondris:*

*Tamburisto mia,
tamburist' eskorta,
tambursono estu
ekde nun pli forta.*

*Dio scias kio
venos, do vi prenu
perkutilon forte,
eĉ la tero tremu,*

*alarmosignalon,
la ĉielo eĥu,
veku ĝi vivulojn,
eĉ kadavrojn veku,
ek, batali venu!⁴⁶*

La etoso de la revolucio entuziasmigis ĉiuspecajn homojn kaj la standardoj de Rákóczi antaŭeniĝis ĉie triumfe.

Saĝa faranto de la kalendaro de Lőcse metis du samformajn S-literojn kaj C- kaj V- literojn apud la kalendarajn tagojn (nome la kurucoj havis tiun opinion, ke per la literoj S signitaj tagoj favoras por la imperiestraj armiloj, „Superas Soldato”, sed dum la tagoj per C- kaj V- literoj la kurucoj venkas „C.V. = Curutz Vincit), ĉar la venkoj de la kurucoj estis pli oftaj, pro tiuj Rákóczi baldaŭ posedis la tutan Superan Hungarlandon.

Jam preskaŭ ĉiuj junaj bravuloj ĉeestis en la armeo de Rákóczi, aŭ ili estis inter la imperiestraj soldatoj, escepte nian heroon, Ladislaon Vereŝ.

Nome pli amuza estas la gitaro, ol la kurucdevena milita blovinstrumento, ja la kara fraŭlino ludas gitaron kaj ŝiaj fingroj donas la fajnajn sonojn. Vane tamburadis la tamburisto al Ladislao Vereŝ por ekiri batali, ĉar la belega Agnesa Nesselróth pinĉis konstante:

„Ne foriru, restu ĉi tie!”

⁴⁴ Pri la kurucoj: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kuruco>

⁴⁵ Pri la urbo Munkács, munkaĉ, kiu estas nun ukraina setlejo, bv. legi ĉe:
<https://eo.wikipedia.org/wiki/Muka%C4%89evo>

⁴⁶ La poemon elhungarigis: László Vizi

Cetere li havis malfacilan situacion, ĉar ĉiumaniere li volis svati la manon de Agnesa. Pro tio li volis fari neniun malbonon, kiu malhelpus por peti la manojn de Agnesa de la maljuna Nesselróth.

Ĉar sinjoro Nesselróth estis ruza homo, ĉar li ĉiumaniere ne malkaŝis sian politikan konvinkiĝon; nome li ne povis malkaŝi, ĉar li ne havis politikan opinion. Tiu pensis, ke ne eblas scii la estontecon, pli malfrue evidentiĝos lia politika konvinkiĝo.

Tiu ne volis malkaŝi per siaj sinteno kaj vortoj, kiujn li protektas, aŭ la armeon de la imperiestro, aŭ tiun de Rákóczi. Pro tio tiu montris sin kiel surda kaj komisiis la plej maljunan senatoron por anstataŭi lin ĉe la aranĝo de la aferoj. Li nur kapbalancadis kaj siajn manojn frotis al si, kiam oni demandis lin.

Sed foje tamen Ladislao Vereŝ demandis tiun, dum lin ŝarĝis la konscienco, ĉar tiu nenifaris inerte dum la laborpostula tempo: „Ĉu vi donas la fraŭlinon, aŭ ne?”

La maljunulo balbutis hezite-evite kaj finfine demandis:

– Kio okazus, se mi ne donus ŝin?

– Do, tio okazus – respondis Ladislao Vereŝ, – ke mi geedziĝus kun ŝi sen via konsento.

– Prefere mi donas ŝin – li diris moke, – sed unue akiru ĝustan rangon, aŭ sufiĉan havaĵon, kio estas inda al mia filino. Por mi estas tute egale, ĉu iu, ĉu alia.

– Mi havas unu, la havaĵon. Do, mi kaptos vin ĉe la vorto.

– Havaĵo! Kio estas la havaĵo laŭ vi, sinjoro Vereŝ? Nome por la malriĉulo ankaŭ cent forintoj signifas riĉecon. Mi kolektis havaĵon por mia sola filino, sed ne pro tio, ke tiun iu ajn alpugnigu. Li devas esti grava homo. Unue estu ni klarvidaj kion vi komprenas pri havaĵo!

– Vi ekvidos! – diris Laĉjo fanfaronante kaj ĉar la juveloj sufiĉe elĉerpiĝis, kiujn li kunportis (li ne konis kiel ŝpari), tiel li decidis, ke li reiros al Gyulafehérvár por kunporti la alian duonon de la juveloj. La maljuna Nesselróth blindiĝu de la havaĵo.

Sed povas esti, ke al Nesselróth estus sufiĉa ankaŭ tiu havaĵo, kiun Laĉjo nun havis. Sed Laĉjon forte indignigis la sinteno de la urbestro kaj li volis fari venĝon kontraŭ tiu. La orsoifa filistro devas vidi, kio estas la havaĵo laŭ Ladislao Vereŝ, kaj tiuokaze tiu miru per vaste malfermitaj okuloj.

Tuj li ekiris al Gyulafehérvár, kunportante sian fidelan hundon, Dravo, kiun li neniam forlasis; ĝi nokte-tage dormis en la sama ĉambro. Li treege estimis ĝin, sed unufoje la bela Agnesa pro baza kaŭzo piedfrapis la bravan beston, pro tio ĝi ekkoleris kaj kelkajn tagojn ne iris al ŝia domo.

Krom la hundo li kunportis sian ĉambriston, Martenon Boncz, kiun li dungis en Peŝto. Marteneto estis gaja bubo, rafinita, benita de grandparolemo kaj ruzaĵo kaj pluse havis stultan vizaĝon, kiel ŝafo.

Kiam ili atingis al Gyulafehérvár iutage tagmeze, Laĉjo apenaŭ atendis la vesperiĝon, kiam estas malmulte da pasantoj. La ĉambriston li sendis al la restoracio „Orurso” kaj li kaj la hundo iris ekscitite al la forbruligita urboparto. Tio estus terura, li pensis, kaj pro la penso inundis lin malvarma ŝvito, se oni konstruintus domon ekde tiam tien.

Nu, tion oni ne faris, ja dum la nuna tempo oni ne konstruas domojn, ĉar oni konstante pereigas tiujn. La imperiestraj soldatoj forbruligas tiujn por ke ne uzu ilin la kurucoj. Sed ankaŭ la kurucoj agas same por ke la domojn ne uzu la soldatoj de la imperiestro. Samaspekta estis la nigra kampo kiel li vidis lastfoje. Certe ankaŭ la signo aperos, per kiu li signis la lokon de la kaldrono. Li ĉirkaŭrigardis kun bateganta koro. La signo ne estis tie. Ej, ja eblas ekkoni la lokon ankaŭ sen signo. Sed li tamen maltrankviliĝis kaj kvazaŭ kiel konsilo li rigardis sian hundon Dravo.

La fidela hundo murmuris ion kolere, sed ne movis sin. Sed iam ĝi kuris al la kaldrono. Sed kial mi preterparolu, ĉar la aferon mi povas diri ankaŭ mallonge. Nome Laĉjo ne trovis la lokon de la trezoro. Sed la sekiĝinta prunarbo estis tie. De ĝi dekstren post 10-15 paŝoj povis

esti la kaldrono. Sed eblas, ke la kaldrono estis ĉe la alia prunarbo. Unuvorte li perdis la direkton kaj pro tio sian kapon, do li senkonsciiĝis. Li serĉadis ĉie, kurante tien kaj reen kiel frenezulo, sed estis neniam spuro de la kaldrono. La hundo malhelpis serĉi la kaldronon, nur rigardis lin indifere. Nu, povas esti, ke mi ektrovos morgaŭ, – li balbutis – dum ĝis elĉerpiĝo li laciĝis kaj iris al la restoracio „Orurso” por dormi.

– Ĉu rekonas min ankoraŭ via ekscelenco? – li demandis en la drinkejo la pipfumadantan Gregorion Nagy, kiu faris gravan paroladon kun Marteneto Boncz.

La malĝentila drinkejestro rekonis lin kaj timante deprenis de la kapo la ĉapelon.

– Ho, sinjoro moŝta, ja mi rekonas vin.

Nu, pro la saluto Laĉjo Vereŝ, sed ankaŭ Marteno Boncz fiksis grandajn okulojn. (Kies servisto mi estas?)

– Kiom ŝerceman humoron havas via ekscelenco – notis Laĉjo acidete ridetante, ĉar li estis ege malbonhumora – ĉar tiu nomas lin la malriĉulon moŝto.

Gregorio Nagy komencis palpebrumadi spite de la abunda humilo, kiu speguliĝis sur lia tuta vizaĝo.

– Ni scias multon, mi petas pardonon!

– Ĉu vi havas dormejon por dormi ĉi-nokte, ĉar mi estas treege laca, sinjoro Gregorio Nagy?

– Ĉu mi ne povus serĉi dormejon, se estus nur unu lito en Transilvanio?

Sekvatage matene post la ellitiĝo li ekiris freŝe al la nezorgitaj parceloj por serĉi la trezoron.

Unu kavaliro venis kontraŭ li sur pomogriza nobla ĉevalo. Laĉjo ekstremis, ekaŭdante lin alparoli.

– Ĉu vi estas kamarado? – alparolis tiu, malrapidigante la paŝojn de sia ĉevalo.

Laĉjo rigardis sur tiun, ties vizaĝo estis konata, sed li ne sciis, de kie li konas tiun.

– Ĉu vi ne konas min? Mi estas Petki. Ej, ĉu vi ne rememoras la gajan amuzon en la „Orurso”? Vi dormis ĉe mi kaj aĉetis ĉevalon de mi matene?

– Mi memoras tion.

– Ĉu vi havas ankoraŭ vian ĉevalon Muci?

– Kie ĝi povas esti ekde tiam? De kie vi venas? – demandis Laĉjo.

– De malproksimo. Mi portas leteron de sinjoro Bercsényi por la regnestro. Ĉu vi retrovis tiutempe vian fraton?

– Mi ne, – respondis Laĉjo hontante kaj riproĉis sin, ĉar li ankaŭ ne serĉis tiun.

– Nu, tiel ŝajnas, ke mi retrovis tiun, se oni nomas tiun Stefano.

– Kie estas Stefano? – kriis Laĉjo avide.

– En Sárospatak. – respondis Petki iomete nevolante.

– Kion tiu faras tie?

– Ja tiu faras preskaŭ nenion: li sidas.

– Ĉu tiu sidas? Kiel vi komprenas tion?

– Tiu estas malliberigita.

– Ĉu en malliberejo li sidas? Kara mia sankta Dio!

– Tie.

– Kion tiu kulpis?

– Tion mi ne scias. Sed tio estas certa, ke ne estus bone, se oni min volus senkapigi. Adiaŭ, kamarado, ĉar mi kunportas leteron al la regnestro.

Tiu spronis sian ĉevalon, forlasante la ekscititan, cerbumantan Laĉjon meze de la vojo.

– Kion fari? Mi tuj ekiros.

Ĉi tio estis lia unua penso. Kelkajn paŝojn li faris reen. Dravo, lia hundo gaje saltante kuris antaŭ li al la drinkejo.

– Mi devas savi tiun. Mi liberigos tiun ankaŭ koste de mia vivo. Mi falos sur la genuojn antaŭ la regnestro, sed ankaŭ povas okazi, ke mi perforte liberigos tiun. Mi kolektos armeon kaj sieĝos la malliberejojn de Sárospatak, se tio estos bezonata. Sed, se mi povus trovi ankaŭ la trezorojn, ĉar la orŝlosilo malfermas plej facile la malliberejojn, ... Ho, mia kara frato, fine mi retrovis vin! Ankaŭ tio ne kalkuliĝas, ke vi havas ferkatenojn. Via pli juna frato estas sufiĉe forta kaj riĉa ... Ĉefe, se mi povas kunporti ankaŭ alian trezoron. Ej, duontago ne estas longa tempo! Ni turnu nin, Dravo! Hej, Dravo!

Laĉjo turnis sin, sed la hundo ne sekvis lin. Li postkuregis ĝin kaj volis retiri pere de la kolringo, al kiu li ligis ŝnureton. Sed la hundo murmuris, kaj mordis lian boton. Efike de tio Laĉjo iĝis kolerega kaj piedbatis ĝin.

Dravo komencis terure hojli, poste liberigis sin kaj rapidegis al la drinkejo.

– Iru en la inferon! – nia heroo nazvoĉe murmuris ĉagrenate kaj poste ekiris sola al la forlasitaj parceloj.

Vane li serĉis la trezoron. Li ne trovis ĝin. Ju pli li estis ekscitita, des malpli li trovis la lokon de la trezoro. Venis lia fino! Nur la elfosado povas helpi. Sed li ne povas fosi sekrete kaj malkaŝe: la posedantoj ne permesus tion, tiuokaze ili povas peti tantiemon el la trezoroj. Sed plej verŝajne estas, ke ili mem farigos la elfosadon de la parceloj.

Nur sola maniero estas ankoraŭ: aĉeti la parcelojn de la posedantoj kontraŭ la porĉiama prezo kaj de si mem farigi la elfosadon. Jes, mi faros tiel. Tuj mi komisiis sinjoron Gregorion Nagy aranĝi tion. Li reiris en la drinkejon, ĉe kies pordo Marteno Boncz gaje manĝis lardon.

– Kie vi delasis la hundon Dravo? – tiu demandis lin indifere.

– Ĉu ĝi ne estas ĉi tie? – demandis terurate Laĉjo – ja ĝi rekuris.

– Ĝi ne revenis, mia sinjoro.

– Laĉjo paliĝis.

Tio estus granda malbono – li balbutis. – Dio gardu! Prefere mi dehakigus mian dekstran manon, ol perdus tiun hundon.

– Nu, ja, estas hundoj cent pli bonaj, vi nur devas ekfajfi.

– Silentu! Vi ne komprenas tion ĉi. Ĉirkaŭrigardu! Ĉu ĝi ne estas ĉi tie?

Ambaŭ ĉirkaŭkuradis la ĝardenon, la korton, la malantaŭan bestejon, la veturilejon, la fojnoamason. Povas esti, ke ĝi kaŝis sin ien ofendiĝante kaj kortuŝiĝante, ja ĝia mastro piedbatis! Laĉjo ĉiam pli forte malĝojiĝis pro la malapero de la hundo, liaj okuloj rigidiĝis, sur la frunto malvarma ŝvito ekaperis pro la konsterniĝo. Lia voĉo tremis. Li ekstaris sur ŝtonon antaŭ la drinkejo „Orurso” kaj de tie komencis voki la hundon malesperiĝante.

– Dravo! Dravo! Venu ĉi tien, mia kara hundeto! Ne koleru min! Pardonu min pro la ofendo. Mi ne povis regi mian koleron. Dravo, venu, venu!

Sed Dravo ne volis aperi.

– Ĉu ci delasas nun kaj mi restas sola, dume mi devas fari gravan aferon. Via afero ne estas bela, Dravo! Venu reen, kara mia hundeto!

Nu, ek! Li postkuregis geservistaron de la restoracio „Orurso”. Kiu reportos hundon Dravo, tiu ricevos kvar ormonerojn. Efike de tio ĉi ankaŭ sinjoro Gregorio Nagy ekiris serĉi la hundon, sed li revenis tagmeze sen hundo. Sed estis nek famo nek spuro de la hundo Dravo. Iu aparte deprima sento premis la koron de Laĉjo. La julia ĉielo sennube brilis, la antikvaj domtegmento afable ridetis pro la sunlumo, sed por li la mondo ŝajnis kiel frida. Li estis neniam ĉi tiom sola kiel nun.

– Mi devas kuri al la urba ĉefjuĝisto por anoncigi ĉie la malaperon de Dravo. Kiu reportos tiun hundon, tiu ricevos cent omonerojn.

Post unu horo jam la tamburo sonis: „ni informas ĉiujn...”, laŭ kiu ĉiuj serĉis la hundon en Gyulaférvár. Ankaŭ venis honestaj ektrovantoj abunde, kondukante blankajn hundojn helpe de ŝnurego, sed la hundon de Laĉjo neniu kunportis. Tiu hundo poreterne perdiĝis.

Dume Laĉjo vokis sinjoron Gregorion Nagy en la plej internan ĉambreton kaj jene parolis al tiu:

– Ĉu mi povas aĉeti ĉiujn parcelojn en la forbruligita urboparto?

– Kontraŭ mono ĉion eblas fari, mia sinjoro.

– Kiuj havas tiujn parcelojn?

– Ĉefe piaj armenaj komercistoj havas tiujn. Tiuj vendas ankaŭ la beatecon de siaj animoj kontraŭ sufiĉe da profitoj.

Tiukaze aĉetu por mi tiujn parcelojn.

– Kial tiuj estas bezonataj por vi, mia sinjoro?

– Mi volas konstruigi domon kaj ĝardenon.

Sinjoro Gregorio Nagy ruze ridetis.

– Do, tio tamen estas vera, hm. – kaj li ektordis sian grizan lipharon.

– Kio?

– Ŝi estas honesta fraŭlino, mia sinjoro, kiel iu fabela feinfraŭlino, kiu estas altstatura, maldika, grandokula. Ja ŝi meritas tion, ke vi konstruigu al ŝi novan domon, mia sinjoro moŝta.

– Nu, ne titolu min plu kiel moŝton! Pri kiu fraŭlino vi parolas?

– Nu, pri la fraŭlino Teleki. Ni scias jam tiun aferon. Ankaŭ la paseroj ĉirpas en Gyulaférvár. Ĉu vi scias nenion pri tio? Bone estas. Estu tio sekreto. Ĝis vespero ĉiujn parcelojn vi havos. Sed mi diras ion jam nun. Nome la t.n. „pro libertate” monerojn tiuj fiuloj ne akceptas.

– Mi pagas per ormoneroj.

– Tio estas bona. La ormonero estas sama inter la monoj, kiel la sciencisto, ĉar ĉiulingve ĝi parolas kaj ĉiuj ŝatas. La kupro similas al la garolo, ĉar ĝi papagumas la solan ellernigitan vorton.

Gregorio Nagy plenumis sian promeson, ĉar samtage li aĉetis la parcelojn. Nome de Ladislao Vereŝ, tiu samtempe farigis aĉetajn-vendajn kontraktojn, en kiuj la armenoj rezignas pri la teritorioj kaj pri tio, kio estas kaj sub ĝi kaj super ĝi. La armenoj ne bedaŭris tion.

En la urbo kun absoluta certeco la famo disvastiĝis, ke iu reĝido estas en la urbo, kiu geedziĝas kun la filino de sinjoro Teleki. Eĉ tion oni diris, ke tiu konstruigos palacon en tiu ĉi urbo, kiu estos pli brila, bela, ol la fortikaĵo de la regnestro.

La pli simpla animuloj ektimis. Ĉu tiu loĝos ĉi tie? Ĉu de nun du reĝoj estos en Transilvanio? Ĉi tio ne estas bona afero, samvilaĝanoj! Sinjoron Miĥaelon Apafi ni toleris iel, sed se ni havos alian regnestron, Dio atestu, ni devas emigri de tie ĉi!

Sekvatage, triatage ili komencis farigi la elfosadojn kaj daŭris tiu agema laboro. Laĉjo elfosis la tutan teritorion, tuttage kuradis de fosanto al fosanto kaj estis malbone vidi, ke li iĝis ĉiam pli malserena kaj konfuzita. La homoj tion flustradis, ke „li estas freneziĝinta.”

– Fosu, fosu, – li urĝis tiujn, – mi pagas por viaj laboroj. Kaj li tintigis siajn ormonerojn.

Li fosis, fosis ankaŭ nokte, sed ne fosis fundamenton kaj ne fosis por plantaĵoj, nur malorde plugis la teritorion dise-mise. La reĝido tute freneziĝis. La homoj pensis ankaŭ pri tio, ke ili anoncu la kazon malĝojan en Gernyeszeg al la grandpotenca konsilisto, kiu tie restadis. La laboro daŭris unu semajnon. Multe da rustaj feroj, malnovaj tegoloj estis videblaj, sed la kaldronon kaj en tiu la trezorojn li ne trovis.

Li kredius, ke la tuton li nur sonĝis, sed ĉio memorigis lin al la trezoroj: la granda ringo sur lia fingro, la verdaj ŝtono gravurita sur ĝi kun la blazono, la ormoneroj en liaj poŝoj kaj en la eta ferkesto, kiun Marteneto Boncz gardis kiel siajn okulglobojn. Sed ja li jam havas

malmulte da ormoneroj. Kiom ajn da trezoroj iam povas elĉerpiĝi. La parceloj estis treege multekostaj. La hundon Dravo oni serĉis ankaŭ nun en la ĉirkaŭaĵo. Oni diris, ke tie – ĉi tie oni trovis blankan hundon, sed eĉ ne unu blanka hundo ekzistis en la tuta mondo kiu similus al Dravo.

La fosantoj laboras kontraŭ multe da mono kaj sinjoro Gregorio similas al hirudo, ĉar li komprenas la ekspluaton. Se la trezoron oni ne ektrovos, tiam duonon de la malkovrita trezoro li pagos al la laboristoj. Li, Ladislao Vereŝ estos denove studento malriĉega kiel la almozaj uloj.

La serĉo, iĝis lia pasio; la brilanta espero instigis lin kiel la kartludanton. Ĉiam li tiel enlitiĝis, ke povas esti, ke „morgaŭ la ektrovo sukcesos”. Sed liaj poŝoj kaj la ferkesto iĝis malplenaj. Ankaŭ la lasta ormonero foruliĝis. Malaperis kaj la hundo kaj la trezoro.

– Ej, se tiam mi ne piedbatintus tiun hundon – li suspiris, suben klinante la kapon sur la tablon plorante en la drinkejo „Orurso” – se mi rekte ekirintus al Sárospatak, tiukaze mi havus kaj monon kaj hundon kaj povas esti, ke mi liberigintus mian pli aĝan fraton.

– Mi dirus ion al vi, mia sinjoro Gregorio Nagy.

– Disponu pri mi!

– Iru al la armenaj komercistoj kaj forvendu al ili la parcelojn sen marĉandado.

– Ĉu vi jam ne konstruadas?

– Mi ne volas fari tion.

Sinjoro Gregorio Nagy ankaŭ tion ne bedaŭris, ke li malŝparis la parcelojn kontraŭ bagatela kosto. Sekvatage Laĉjo ekiris malĝoje, deprimate, havante bagatelan monon.

– Kien ni iras, mia sinjoro? – demandis Marteneto Boncz.

– Jam mi ne estas via mastro. Se vi volas, tiam mi estos via kamarado.

– Kial? – tiu diris larĝokule. – Ĉu vi ne estas reĝido?

– Mi estas malriĉa bubo.

– Sed mi kredis, ke vi estas riĉa frenezulo.

– Jes. Estis havaĵo kaj ne estas havaĵo. Mia mono elĉerpiĝis. Sed aliafoje mi rakontos tion al vi.

Efike de tio Marteneto gaje ekkriis plengorĝe:

– Pli bone estas ĉi tiel.

– Ĉu vi venas kun mi, Marteneto?

– Ankaŭ je fino de la mondo.

– Mi iras al Sárospatak.

– Ho, tiun urbon mi forte ŝatas.

– Tie estas arestita mia pli aĝa frato. Mi ŝatus liberigi tiun.

– Diable! Se mi sciintus tion. Ĉu tiu ne estas malliberulo de la kurucoj?

– Sed jes.

– Ej, ĉi tio estas stranga afero. – murmuris Marteneto –Ej! Ej! Kion li faris kontraŭ la kurucoj?

– Ĝuste tion mi nun ne scias, sed pli malfrue ĉio estos evidenta.

Ĉi tiel Ladislao Vereŝ ekiris malĝoja kiel malriĉulo. Li ne havis multe da trezoro, nur la malmulte da kostoj de la parceloj estis ĉe li, krome la blazona fingringo kaj memoro de iu brila sonĝo.

Li ne sciis, kion li bedaŭru plie: la monon, Agnesan aŭ la hundon Dravo.

12. Ĉapitro

La malliberulo

Laĉjo suspiris, dum ili atingis la fortikaĵon de Sárospatak⁴⁷ post longa, laciga piediro. Flago ne flirtis sur la fronto de la fortikaĵo. La regnestro ne estas nun ĉi tie.

– Nu, oĉjo Marteneto, jam ni estas ĉi tie; nun jam ni havas la plej gravan taskon informiĝi pri la afero de mia pli aĝa frato. Poste ni serĉos laboron por dungigi nin.

Ili informakiris tre malfacile, ke vere malliberas lia frato tie en iu karcero de la fortikaĵo. Iu bonvola, lancon havanta gardisto ankaŭ montris unu plumbokradan fenestron, malantaŭ kiu tiu estas enkarcerigita.

– Kion tiu kulpis?

La gardistoj tiris la ŝultrojn: „Ankaŭ ni ne scias, ja oni ne skribas tion sur nian nazon.”

– Kio estas lia puno?

– Pendumo. – respondis mallonge la gardisto de la fortikaĵo.

El la okuloj de Laĉjo la larmoj elfluetis.

– Tiel ŝajnas, ke vi, sinjoreto, treege bedaŭras lin. Ĉu vi estas lia parenco?

– Mi estas lia frato.

– Ja mi kredis, ke tiu havas nenion. Nur iu granda nigra hundo venas tien ĉi por hojli. Oni diras, ke ĝi estas la lia.

– Jes. Li havis hundon. Se ĝi estus tie ĉi, mi povus rekonii.

La gardisto ĉirkaŭrigardis en la korto kaj ekfajfis. Al lia fajfovoko iu hirta nigra kuvas-hundo antaŭensaltis, moroze grincigante la dentojn de malantaŭ la ronda bastiono. Laĉjo rekonis ĝin: ĝi estis la sama, kiun la agonianta sorĉistino donis al lia frato.

– Ĝi estas fidela besto, ĉar ĝi estas tie ĉi senĉese kaj gardas sian mastron. Sed ankaŭ ni gardas tiun sufiĉe.

– Ĝi estas pli fidela, ol mia blanka hundo estis – rimarkis Marteno Boncz.

– Mi meditas pri tio, – daŭrigis la gardisto – kion ĝi manĝas? Ĉi tie estas eĉ ne ostoj.

Laĉjo demandis senespere:

– Ĉu mi povus paroli kun la malliberulo?

– Ne povas esti. Pro tio ne estas inde turni vin al la fortikaĵkomandanto.

– Kiu estas la fortikaĵkomandanto?

– Krucsay.⁴⁸

Laĉjo ektremis en ĉiuj siaj fibroj, aŭdante la nomon kaj li balbutis obstine:

– Kie mi povas scii: kion kulpis mia malfeliĉa frato?

– Sinjora moŝto Bercsényi povas diri tion, ĉar liaj homoj kunportis tien ĉi vian fraton el Sátorajjájhely katenita.

Bercsényi ĝuste restadis en Sárospatak⁴⁹, sed oni forsendis Laĉjon kaj li ne ricevis aŭdiencon. Oni diris, ke la grafo suferas pro podagro kaj nur ĉarlatanoj, aŭguristinoj povas eniri al li. Li kuracigis sin per ĉarlatanoj, la aŭguristinojn li ege ŝatis, nome se iliaj aŭguroj estas bonaj, tiam tio disvastiĝas inter la homoj kaj pliiĝas la animstato de la homoj. Ili estas samaj kiel duobla salajro.

– Kion ni faru nun? – Laĉjo malesperiĝis.

– Mi havas ankoraŭ unu ideon.

⁴⁷ Pri la setlejo Sárospatak, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1rospatak>

⁴⁸ La nomon Krucsay bonvolu elparoli kruĉai.

⁴⁹ Pri Sátorajjájhely, vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1torajja%C3%BAjhely>

– Kio estas tio?
 – Iu devas eniri al li kiel aŭguristo, aŭ ĉarlatano, sed la lasta povas esti malfacila ...
 – Jes, Mi prezentos min kiel aŭguristo.
 – Tio estus por vi treega feliĉo, ĉar tiel ŝajnas al mi laŭ de vi eldiritaj aferoj, ke tiu Johano Roĵomak certe estis la grafo Bercsényi.

– Ĉu vi pensas tion?
 – Mi estas konvinkita pri tio. La sukceso de la ribelo montras tion, ke la grafo devis viziti kaj persvadi pli frue la nobelojn. La vizitadon li povis fari nur en maskovestaĵo kaj pseŭdonime.

– Vi povas pravi.
 – Pro tio lasu min tenti la grafon. Mi aŭguros al li tiajn aferojn, ke tuj malaperos la podagro el liaj piedoj.

Marteno Boncz estis bubo havanta romanecan emon, kiu ankoraŭ antaŭ du jaroj estis muelisto en akva muelejo de Tallós, kiun la akvo de la rivero Dudvag funkciigis; lia revema animo instigis lin serĉi feliĉon en Buda, kie li renkontiĝis kun Laĉjo, dekadencanta; li ekservis tiun. Tiu havis grandan talenton, admirinde imitis aliajn homojn kaj povis ŝajnigi sin tiuj.

Du tagojn tiu postpaŝaĉis inter la geservistoj de Bercsényi, dirante bibliajn aŭgurojn pri reĝa seĝo, pri defalo de la muroj de Vieno.

La geservistoj anoncis al Bercsényi la maljunulon. La grafo iĝis scivola kaj vokigis Marteneton. Tiu aŭguris fanatike, al la ĉielo turnante sin, terurajn amasbuĉojn, koncerne la imperiestrajn soldatojn. Tiu aŭguris artifice, aŭguristlingve, kio amuzis kaj entuziamigis la grafon. (La grafo ĝisduone ankaŭ kredis tiujn aŭgurojn.)

Marteno iĝis dum unu semajno intime informita, kaj lin Bercsényi nomis „profeto „Habakuk”. Bercsényi multfoje vokigis la maljunulon al si por amuzi. Tiukaze li povis menci i la malfeliĉan malliberulon.

Iudimancé, posttagmeze Bercsényi demandis:

– Nu, kion vi sonĝis, Habakuk?
 – Mia ekscelenca bona sinjoro, mi sonĝis nokte pri iu malliberulo.
 – Kion vi sonĝis pri tiu, brava Habakuk?
 – Unu blanka kolombo aperis en mia sonĝo, kiu flustris en mian orelon:” Ĉi tie en la fortikaĵo de Sárospatak malliberas katenite iu fraŭlo, kiun oni nomas Vereŝ, kaj se tiu liberiĝas, tiam li sep kampojn igos ruĝaj per la sango de la malamiko.”

– Vere, ĉi tie estas tiu maliberulo, sed pro tiu la imperiestraj soldatoj trankvile povas dormi. Tiu mortigas jam eĉ ne unu raton.

– Ĉu tiu mortis?
 – Ne. Sed tiu mortos. Ĝuste hodiaŭ matene la heroldo kunportis la kondamnon, surskribitan de la regnestro.

– Ĉu vere? – demandis Marteno konsterniĝinte. – Kion kulpis la malfeliĉulo?
 – Ŝtelis, defraŭdis kaj perfidis la regnestron. Ne menciadu, Habakuk, ĉar vi kolerigos min. Ni komencis pridemandi tiun antaŭ duonjaro kaj torturas lin, sed tiu estas obstina kaj ne konfesas. Li asertas, ke li senkulpas. Sed mi fidis al li kiel al mia filo. Marteno malĝoje iris al Laĉjo por diri al li la novaĵon. Li iĝis ekster si de la aŭditaĵoj.

– Ĉu povas esti, ke tiu ŝtelis – li kriis korŝire.
 – Ĉu mia frato? Ne! Mi ne kredas. Mi pensas, li estas kaptita de la imperiestranoj. Li povas esti militkaptito, sed ne ŝtelanto. Kion li ŝtelis? De kiu li ŝtelis? Terure! Ĉu vi diris, ke ties kondamno je morto estas jam surskribita? Kion ni povas fari? Mia Dio!?

Marteno Boncz tiris la ŝultrojn: „Nenio helpas jam. Jam mi aŭdas la grakon de la korvoj. Oni ekzekutos tiun iumatene kaj ni ne rimarkos.”

– Ĉu se mi povus petegi surgenuen falante por pardono por li antaŭ la regnestro?
– Vi alvenus malfrue, ja la regnestro estas en Munkács, Bercsényi ekiras morgaŭ matene al Senice. Li kunportas min. Pli bone estus, se ankaŭ vi aliĝus al la armeo kaj ni irus kune.

– Ne, mi restas ĉi tie kaj atendas la sorton de mia malfeliĉa frato. Mi ne scias, kion mi faros, sed ion faros.

– Do, tiuokaze Dio benu vin, ĉar mi aŭguris tiome bone, ke nun jam oni kunportos min kiel profeton.

Laĉjo restis sola kaj la tutan nokton pasigis sola sendorme. Li cerbumadis. Kio povis okazi pri lia frato? Almenaŭ li povus scii, oni pri kio akuzas lian fraton. Tuj estus pli facile ek trovi ion. Almenaŭ duonhoron li povus vidi Stefanon kaj povus paroli kun li. Povus esti, li irus tamen al la komandanto de la fortikaĵo kaj mildigus ties koron. Ja ankaŭ tiu estas homo! Sekvatage matene li vere tiel agis. Li aperis ĉe la loĝejo de la komandanto de la fortikaĵo. Dum li malfermis la pordon, iu juna leŭtenanto sidis en la ĉambro.

– Kion vi volas? – demandis tiu.

Mi ŝatus paroli kun la moŝta komandanto de la fortikaĵo – respondis Laĉjo timeme.

– Pri kio?

– Pri la kompatinda kondamnita Stefano Vereŝ.

– Ne estas permesate. – respondis la leŭtenanto krude, – sinjoro Krucsay ne havas tempon.

Laĉjo petegante kunmetis siajn manojn. Efike de tio, dume la leŭtenanto rigardis lin kaj estimplene klinis sin.

– Mi petas pardonon de via ekscelenco. Mi tion kredis, ke vi nur petas ion, sed ne sciis, ke havas rajton ordoni.

Efike de tio ĉi tiu vigle kuris al la interna ĉambro, de la sojlo dirante malantaŭe:

– La komandanto de la fortikaĵo tuj staros je via dispono.

Laĉjo tion kredis, ke li sonĝas. Kio povis okazi pri tiu ĉi homo? Kial tiu ŝanĝiĝis subite? En la sekva minuto la ventregon havanta Krucsay venis ene, kiu havis rozvangon kaj hararon similkoloran kiel kanario skoloran hararon, kuntenante per kombilo kurucmaniere. Laĉjo paliĝis. Multfoje aperis ĉi tiu vango antaŭ li ekde tiam. Li vidis sur la frunto la satanajn sulkojn kaj la ruzan kruelan rigardon en ties okuloj. Tiu estis la murdinto de lia patro! La maljuna Krucsay klinis sin antaŭ la junulo.

– Kion ordonas la regnestro? – demandis feste Krucsay.

– La regnestro! – balbutis Laĉjo, sed baldaŭ kolektis sian kuraĝon, – mi ne komprenas vian ekscelencon, komandanton. Mi...

– Mi vidas la sekretan signon. Mi obeas al vi.

– Ah! – ekkriis Laĉjo nevole kaj eksterordinara konfuzo aperis sur lia vizaĝo.

– Mi konas sekretan mandaton de la moŝta regnestro. Tiu estas en mia flankopoŝo. Kiel? Vi pravas. Sinjoro Gencsy, lasu nin solaj.

La juna leŭtenanto foriris, dume Laĉjo iomete konsciiĝis kaj perceptis, ke nun io eksterordinara eraro okazis, kiun li devis eluzi.

– Do ni estas solaj, nun vi povas diri la ordonon de la regnestro.

– Mi estas ĉi tie pri afero de iu Stefano Vereŝ.

Krucsay klinis sin.

– Kio okazu pri tiu?

– Oni devas lasi libera – raslis Laĉjo kaj pro la aŭdaco muskoloj liaj ĉiuj ekvibris.

Sed Krucsay ĝuste ne miris pro tio, sed simple malfermis la pordon kaj ordonis al la husaro:

– Sendu al mi la gardiston de la fortikaĵo – dume tiu turnis sin al Laĉjo kaj diris indifere: – Sed ĝuste hodiaŭ mi ricevis de la forveturanta grafo Bercsényi ties kondamnon

je morto. Mi ekzekutigintus lin morgaŭ. Tre bone estas, ke via ekscelenco rapidis por kunporti la ordonon.

Laĉjo iĝis tre ekscitita. Lia koro forte batis. Eĉ ne unu vorton li povis eldiri. Feliĉe estis, ke la gardisto alvenis.

– Lasu libera tuj Stefanon Vereŝ – ordonis Krucsay, poste denove demandis la junulon:

– Ĉu ne estas pri ĉi tio iu aparta dispono?

– Mi kunportos tiun.

– Kiel vi deziras – diris la fortikaĵkomandanto ĝentile. – Gardisto, transdonu la malliberulon al tiu ĉi nobelo.

Laĉjo rapidis avide esti malproksime de Krucsay, sed tiu retenis lin tenere.

– Ho, mia bona nobla sinjoro, ĝi ne estas tiel. Vi priruzus min. Se vi forportas la malliberulon, tiukaze donu al mi tiun fingroringon.

– Diable! Ĉu ankaŭ mi estas tiom forgesema?

Laĉjo nur nun rigardis la fingron tremante, ke tiu fingroringo, kiu estas sur lia fingro, estas admirinda talismano: tiu verdŝtona, blazona fingroringo. Li detiris ĝin de la fingro kaj ŝajnigante rideton transdonis la verdaŝtonan blazonan fingroringon al Krucsay, kiu kisis tiun omaĝante.

– Ĉio estas en ordo, – diris Krucsay, poste Laĉjo rapidegis sur la ŝtuparo senŝarĝiĝe esperante kaj gapmirante, ke la okazintaĵoj ne estas nur sonĝo.

Sur ties mano estis la sekreta fingroringo de la regnestro! Kiel tio estas ebla? Nur unu penso okupigis lin: ĉu povas esti, ke la en Gyulafehérvér trovitaj trezoroj estis trezoroj de la regnestro Rákóczi?

Sed li ne havis tempon pensadi. Li saltis samtempe eĉ ŝtupojn por postatingi la gardiston, kiu antaŭeniris al la malliberejoj, kun enmane la rustaj ŝlosiloj. Fine ili alvenis al la peza pordo havanta ferlabendojn. La ŝlosilo unufoje grincis en la seruro, la pordo malfermiĝis kaj dum la sekva minuto la du fratoj ĉirkaŭbrakis, ja ili de longe ne vidis unu la alian. La nigra hundo saltadis apud ili senbride kaj gaje.

– Ni iru for! – urĝis Laĉjo sian fraton, kiam li sciis paroli, – ni iru for!

– Kiel vi liberigis min?

– Baldaŭ mi rakontos tion, se mi estos malproksime de tie ĉi. Ni iru for!

– Kien ni iru?

– Kien ajn, nur ĉi tie ne restu!

Ili denove ekiris kiel antaŭ delonge sencele sur la dezerta pejzaĝo. Dume ili lasis malantaŭ si malproksime la fortikaĵon de Sárospatak, kiam ilia parolado komenciĝis.

– Nu, nun jam mi dezirus aŭdi la historion de mia liberigo.

– Unue diru, kial oni arestis vin.

– Mia historio estas tre mallonga, – komencis paroli Steĉjo, – kaj ege malĝoja. Roĵomak, kun kiu mi ekiris al Vieno, estas la grafo Bercsényi.

– Tuj mi pensis.

– La grafo vere kunportis min al Vieno kaj baldaŭ ekŝatis min. Li enkondukis min en siajn plej intimajn aferojn, li faris antaŭpreparojn al la ribelo kaj pro tio ni iris tiutempe al Vieno. Ni volis forporti de tie trezorojn de la familio Rákóczi al Hungarujo por kaŝi tie, por ke oni ne povu konfiski, se eventuale iĝus iu problemo. Li sekretigis delonge la tuton, ĝis min li rekonis kaj la trezorojn ni liveris kune en pseŭdovestoj kaj ni kaŝis en iu granda kaldrono. Nur mi kaj li konis la lokon de la kaldrono. Aliaj mortemuloj eĉ ne povis eksongii pri ties loko. Tamen kio povis interveni, mi ne povas eltrovi.

– Kio? – demandis Laĉjo obtuzvoĉe.

– Kiam okazis la militiro kaj pro la militiro estis bezonataj la juvelaĵoj, la grafo Bercsényi trovis nur la duonon de la trezoraĵoj. La alian duonon iu forŝtelis.

– Ej!

– La grafo Bercsényi iĝis terure kolerega. Oni ekkaptis min tuj, sed mia atestanto estas Dio, ke mi estas senkulpa kiel la nun naskiĝinta infano. Ho, ve, mia pli juna frato, kiom da suferoj mi havis en la malliberejo! Mi suferis ne pro la malsato, aŭ torturoj, sed pro la malhonorigo. Oni provis konfesiĝi, turmentis kaj demandis min, al kiu mi perfidis la lokon de la trezoroj. Mi ĉiam diris, ke mi estas senkulpa, sed oni ne kredis min. Mi ne povas percepti, kio povis okazi.

– Kien vi kaŝis la juvelaĵojn? – instigis Laĉjo la fraton tremetante.

– La regnestro havis unu neloĝatan modestan domon en Gyulafehérvár⁵⁰, kiun lèia patro konstruigis por iu sia maljuna ekonomo. Ni kaŝis tie la grandan kuprokaldronon.

– Sankta Dio! – kriis Laĉjo kaj liaj genuoj malfortiĝis, dume li tuŝis siajn tempiojn, iomete balbutante nekompreneblajn vortojn.

– Mia kara pli juna frato, ĉu vi volis ion diri al mi?

Laĉjo nur surgapis tiun, liaj okuloj fiksiĝis, unu momenton li hezitis, kvazaŭ iu nevidebla fantomo flustrus al li: „Konfesu ĉion!” – sed la nigra hundo ŝtelumis inter liaj piedoj kaj interbojadis, ĉesigante lian bonan volon. „Ej, kial estus bone, se mi rakontus ĉion? Ankaŭ tiuokaze ni povus esti nur tiuj, kiuj ni estis antaŭlonge, kaj mi povas ricevi konstantan riproĉon.”

Poste li diris laŭte:

– Ne, mi volis diri nenion. Sed ni rapidegu, ĉar sekura loko por ni estas nenie ĝis ni atingos la tendaron de la imperiestraj soldatoj.

– Kiel? Mi ne komprenas vin. Ja ni ne fuĝas. Oni liberigis min.

– Jes. Sed via kondamno je morto estas ĉe Krucsay. Nome mi liberigis vin artifice, kiu artifiko malkaŝiĝas baldaŭ kaj tiuokaze nin ambaŭ oni pendigos.

– Kiaspeca artifiko povis esti tio?

– Mi ne povas malkovri nun. Ne estu malpaculo pro scivolemo. La tempo sekvos por rakonti ĉion.

– Tio ĉi estas malbono. – diris Steĉjo malĝoje.

– Tio estas malbona, sed tio havas bonan flankon: ĉar fine sinjoro Krucsay estos punota pro tio.

– Kion ni faru nun?

– Ni ambaŭ estos imperiestraj soldatoj.

– Mi ne faros tion. Prefere estos la plej bona, se mi serĉos mian honoron.

– Tio estos malfacila afero.

– Sed mi tamen iros serĉi tion, nur tion mi ne scias, kiun vojon mi elektu, kie mi komencu la serĉadon.

Vespere ili alvenis al Ólitzka, kie plej unue Steĉjo forrazis sian hirtan implikiĝintan barbon, kiu iĝis tre densa en la malliberejo.

– Vi estas tute alia homo! kriis Laĉjo. – rigardante la belan altstaturan junulon – vi iĝis belega junulo dum du jaroj. Neniu rekonos vin.

– Ĝuste tion mi volas, – diris Steĉjo mallaŭte, – ke oni ne rekonu min.

⁵⁰ Gyulafehérvár estas setlejo en Rumanio, pri ĝi abunde ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Alba_Iulia

13. Ĉapitro

Kiu estas kuglosekura

El inter tiuj aventuristaj ĉefoj, kiuj tuj aliĝis al Rákóczi, kiam li transpaŝis la polan-hungaran limon, estis la unua sinjoro Ladislao Ocskay, kiu luktis ĝis li iĝis festata heroo. Ties kosto estis la sango de multe da imperiestraj soldatoj. La famo de lia braveco disvastiĝis legendoforme en la lando, kiel pli malfrue pri bravecoj de la blinda Bottyán, aŭ Emeriko Bezerédy⁵¹, kiun ne damaĝis la akraĵo de la glavo, ĉar li portis sur sia rimeno talismanon; nome iun platan, rondan lameton, sur kiu ambaŭflanke estis skribita la kabala frazo: „Sator Arepo tenet Opera Rotas” / (De la Kreanto tenatas sub lia defendo.)

Sed Stefano Magday estis pli populara, ol la gloraj kurucaj estroj, ĉar tiu estis favorato de la soldatoj, temo de popolkantoj kaj favorato de la armeo de Bottyán⁵². Ankaŭ pri Stefano Magday oni kredis, ke li estas kuglosekura, pafrezista homo, kiun la patrino naskis tia ĉar li estas ŝmirita per graso de lacerto, kiun lacerton oni trovis ĝuste meze de la punkto de Sankta Georgo.

De kie tiu venis? Kie tiu loĝas? Neniu sciis. Ankaŭ Bottyán (botjan) nur tion diris, kiam ili ĉirkaŭfermis Érsekújvár⁵³-on, li nomumis tiun senrangan infanterianon leŭtenanto kaj pli malfrue, ĉar tiu tiel batalis en la militiroj kiel leono, li nomumis tiun komandanto de iu armeo. Tiu estas mirinda soldato.” – skribis Bottyán el Tata en 1705 al Bercsényi, kiu komencis interesiĝi pri Magday. – „antaŭ nelonge iu kuglo frotvundis lian piedon dum la sieĝo, sed tiu ne lasis demeti la boton, kiu estis plenigita de la koaguliĝinta sango.

– Estus kulpo – li diris – se ĉiuj kredus, ke la kuglo damaĝas min, plifere mi suferas plu vundite.

Kaj tiu ankaŭ tiel faris. Li iris plu vundite dume mensogante tion, ke li lamas pro tio, ĉar la nova boto premas lian piedon. (Ĉi tiel oni disvastigis malbonan famon pri la malfeliĉaj botistoj.)

Tiuj estis gloraj tagoj, kiam Bottyán kaj Magday samtempe du militestrojn kurigis. Baŭno Pálffy rapidis al Szombathely⁵⁴ por aliĝi ĉe Szentgotthard⁵⁵ al la generalo Heister Hannibal. Bottyán iris antaŭ lin kaj ĉirkaŭfermis la armeon de la baŭno ĉe Szombathely.

– Ĉu vi scias, sinjoro generalo, kion mi pensis? – alparolis Magday la generalon.

– Kion?

– Heister kredas laŭ anonco de la spionoj, ke ni rigardas al Szombathely kolere kaj fosas kavojn por lukti. Mi povas imagi, ke li kondutas trankvile, kvazaŭ tiu estus savita. Bona ŝerco estus, se ni nun atakus tiun per unu parto de la armeo.

– Tio estas ne tute freneza penso! – akceptis la ideon la estro. – Ni faru!

El la vortoj iĝis ago. Oni enseligis ses regimentojn da ĉevalistoj, la infanterion sidigis sur ĉarojn (ekde tiam la infanteriano ne havas tian bonan komforton kiel pli frue), kaj iris

⁵¹ Imre Bezerédy (1679-1708) estis membro de Transdanubia elita nobela familio, servanta Franciskon Rákóczi: kiel soldato, kuruca brigadestro, sed li estis perfidita al la imperiestranoj, lin ili senkapigis en 1708: https://hu.wikipedia.org/wiki/Bezer%C3%A9dy_Imre

⁵² Pri la hungara generalo Johano Bottyán vi povas legi abunde ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/J%C3%A1nos_Botty%C3%A1n_\(generalo\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/J%C3%A1nos_Botty%C3%A1n_(generalo))

⁵³ Pri la setlejo Érsekújvár vi povas legi ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Nov%C3%A9_Z%C3%A1mk

⁵⁴ Szombathely (sombathej) estas hungara urbo, pri ĝi vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Szombathely>

⁵⁵ Pri la hungara setlejo Szentgotthard, vidu pli multe ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Szentgotth%C3%A1rd>

rapidege galopante al Szentgotthardo, kie la ne suspektoman Heister-on ili tute surprizis dum la nebula vintra tago. Ties armeojn oni interrompis kaj la transvivantojn peladis ĝis la limoj, eĉ ankaŭ trans tiujn al Stirio.⁵⁶

Magday pelis Hesiter-on, ĉie li postiris tiun sur sia helflava ĉevalo.

– Haltu! Haltu!

Kiam Magday antaŭen galopis de sia armeo, Heister turnis sin malantaŭen.

– Nu, ni skermu per glavo unu kontraŭ la alia. Tiel ŝajnas, ke vi havas emon por skermi kun mi!

– Mia adzo serĉas la grandajn arbojn.

Ili eltiris el la ingoj la glavojn, sed Heister ne havis feliĉon, lia ĉevalo ektimis de io kaj saltis flanken. Pro tio la estro ektremis kaj dum la plej malfeliĉa momento la glavo elfalis el lia mano.

– Sacrebleu!/Tondro kaj Fulmo! – blasfemis la veziro kaj nevole repuŝiĝis en la selo, por ke lin ne atingu almenaŭ la unua bato.

Sed Magday dum unu minuto dekliniĝis de sia ĉevalo por levi la glavon lerte kiel iu atleto kaj transdonis ĝin al Heister.

– Kiel? Ĉu vi redonas al mi mian glavon anstataŭ mortigi? Ja vi povintus fari!

– Mi estus ankaŭ farinta, se tio estus okazinta dum pelo. Sed ne forgesu, sinjoro generalo, ke vi turnis vin malantaŭen memvole. Do, ĉi tio estas duelo kaj mi ne povas batali kontraŭ senarmila homo.

– Vi pravas, mia sinjoro. Vi estas vera nobla homo. Mi deziras ekpremi vian manon, se ni havus tempon al tio. Jen, ili venas! Ni rapidu!

Vere jam aŭdeblis hufbruoj de ĉevaloj de la kurucaj husaroj, sed pro la granda nebulo tute nenio videblis. Ili interbatiĝis senindulge; la glavoj fajreris kaj iliaj sonoj aŭdeblis malproksimen. Magday fortan baton donis al Heister feliĉe, tiu saltis flanken; nu, ili daŭrigis la duelon, sed nun la kurucoj malbonigis la aferon, ĉar atingante pli proksimen, ili vidis Stefanon Magday ŝviti forte kaj volante helpi al li, ili celis per karabeno al Heister, sed ili trafis la ĉevalon de Magday, kiu tuj terenfalas.

– Adiaŭ! – kriis Heister forgalopante, – se iam ankaŭ via glavo defalas sur la teron, tiam tiun mi levos.

Magday ŝanĝis ĉevalon kaj pelis plu la malamikon; kie li postatingis tiun, tie li batis kiel karoton. Li mortigis kelkajn soldatojn, du germanajn soldatojn ekkaptis kaj tiujn imperiestrajn soldatojn akompanis kiel militkaptitojn per eltirita glavo kaj li malantaŭe paŝaĉis, dum lia glavo estis en la glavingo. Atingante al Szombathely la baŭno Pálffy jam malaperis, eĉ ne ties piedspuro estis tie: nome tiu kuris al Németújhely.⁵⁷

La tuta teritorio de Transdanubio iĝis libera. La malamiko ĉesis ekzisti. Kelkfoje Magday proksimume antaŭe de mil ĉevalistoj kuregadis ĝis la antaŭurbo de Vieno, okazigante grandan teruron en la imperiestra rezideja urbo. Pri la agoj de tiu ĉi bravulo, ĉefe pri lia heroeco ĉe Simontornya,⁵⁸ ankaŭ la regnestro informiĝis, kiu al li post la duelo kontraŭ Heister donacis el sia stalo de Munkács⁵⁹ belegan nigran stalonon anstataŭ la mortpafita beja ĉevalo.

La donacon de Rákóczi multe antaŭis ĝia famo. La regnestro, kiu pasigis la tempon en Miškolc⁶⁰ en sia vintra kvartiro, preparolis ŝercadante pri la nun aperinta kuruca heroo,

⁵⁶ Pri Stirio: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Stirio>

⁵⁷ La nova nomo de Németújhely estas Bécsújhely: https://eo.wikipedia.org/wiki/Wiener_Neustadt

⁵⁸ Pri Simontornya vi povas legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Simontornya>

⁵⁹ Munkács estas urbo, nun en Ukrainio. Bv legi pri ĝi ĉe:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Muka%C4%89evo>

⁶⁰ Pri Miškolc, bv legi ĉe: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Miskolc>

Magday: Dum militvagado, kiel li mortigis tridek imperiestrajn soldatojn havante trupojn: eĉ ne heroldo restis el inter tiuj; – aliafoje li rajdis kun siaj kamaradoj en la valo de Szitász⁶¹, dum unu brigado da imperiestraj soldatoj atakis ilin, pafadis ilin, liaj kamaradoj mortis, sed li estis kuglosekura. Tiu ĉi eksterordinara bravulo meritas, ke li elektu la plej belegan ĉevalon el la stalo de la regnestro.

Sed tio estas la plej valora evento, se la regnestro mem elektas por li ĉevalon.

Kristoforo Palotásy, kiu portis leterojn al Bottyán, rakontis, ke oni sidigos sinjoron Stefanon Magday sur tian ĉevalon, al kiu similis eĉ ne tiu., sur kiu sidis lia praavo; ĝia brido estos orumita kaj sur ĝia selkovrilo estos kudritaj etaj arĝentlamenoj. Sed ĝis tiam ankoraŭ ni devas vivi.

La regnestro estas malproksime de Munkács kaj ankaŭ Munkács estas malproksime de Szombathely; ĉevalaĉo iĝos la ĉevalido, ĝis li atingos tien. Kaj povas esti, ke io estas en ordo ĉe ni. La moŝta regnestro diris al iu peteganta delegitaro: „Miaj karaj amikoj, mi nenion povas promesi; povas esti, ke ankaŭ ĉi tiu dolmano ne estas mia, kiun mi portas”. (La sinjoro moŝta portis eluzitan dolmanon, preparitan el drapo.)

La tuta armeo ĝojis pro la famo, sed kelkuloj laŭkutime enviis. Nome ĉiuj ŝatis Stefanon Magday, kiu estis modesta kaj oferema: li helpis ĉiam siajn amikojn, sed neniam deziris ion ajn de tiuj. Li ne estis orgojla kontraŭ siaj subuloj, kaj ne estis humila ankaŭ al la superuloj. Se li faris bravaĵon, pri tio neniam li parolis, sed bravaĵojn de aliuloj li tre vikle laŭdis.

Iam liutisto kantis entuzisme pri ĉi tiuj bravaĵoj, kiu kanto (sed inter ni: en nia amika rondo dirante) sonis pli bele, ol la „libertas-groŝoj, la groŝoj de Francisko Rákóczi, la 2-a.

„Stefano Magday rajdas sur la bejo,

Lia nom’ briliĝos sur ĉiela listo.

Kie li rajdas, tie alvenos gloro,

Stefano estas helpanto de la morto.”

El ĉi tiu poemo evidente videblas, ke dum tiuj faroj, la malgranda bej-ĉevalo portis Stefanon Magday kaj ne la regnestra eksvirĉevalo. Sed tio estintus pli bona, se ĝi portintus lin neniam.

Iutage, kiam li hejmeniris post la vizitado (sur la ĉevalaĉo) de Bottyán, la tuta armeo akceptis lin kun vivuado en la kazerno.

– Kio okazis? – li demandis ĝisduone ŝerce, ĝisduone mirante. – Ĉu vi vivuadas min, aŭ mian ĉevalaĉon?

– Ambaŭ. – respondis Johano Bódiș, – la sendaĵo de la regnestro: unu majesta ferogriza stalono alvenis. Bottyán jam serĉigis vin, ja li atendas vin en la tendo.

Ĝojo brilegis sur la vizaĝo de Magday. Li tuj desaltis de la selo, ĵetante la bridon al iu infanteriano kaj iris rapide al la tendo de la estro.

El inter la svarmanta armeo, kiu kantonmentis sur la antaŭtenda placo apud la fajroj ĉirkaŭ la kaldronoj enhavantaj manĝaĵon, iu infanteriano, nomite Ladislao Fekete, pri kiu Magday kondutis ĉiam ameme multfoje flustradis ankaŭ inter si, kuregis al Magday mansignante ne iri al la tendo!

Sed la infanteriano ne povis postatingi lin kaj Magday ne rimarkis pro la ĝojo kaj ekscito la unikan mansignon de Ladislao Fekete. Magday enpaŝis en la tendon.

Bottyán saltis antaŭ lin gaje, poste turnis sin al la tie staranta figuro kaj diris al tiu:

– Jen, mia sinjoro moŝta, li estas Stefano Magday, kiun favoro de la moŝta estranta regnestro ...

⁶¹ La valo Sitaș troveblas en la departemento Bákó, kiu troveblas en Rumanio.

La malantaŭe staranta figuro paŝis antaŭen kaj etendis la manon por premi la manon de Magday. En tiu momento Magday rekonis la grafon Bercsényi kaj paliĝis.

Bercsényi retiris sian manon; malhela ombro kovris lian ostan, viran vizaĝon.

– Ha! – kriis Bercsényi nevole. – Ĉu vi estas tiu? Tio estas nekredebla!

Malrapida trememo ekkaptis la korpon de Magday.

– Ĉu vi, mia sinjora moŝto jam konis mian bravulon Magday? – demandis Bottyán surprizite.

– Mi konas lin ege bone – respondis Bercsényi moke, – certe pli bone, ol via ekscelenco. Magday, transdonu vian glavon – li diris severe.

Magday obeis, kaj mortpale demetis la glavon de sia talio. Bottyán, la blinda balbutis indignante.

– Kion faras via ekscelenco, sinjoro ĉefgeneralato?

– Mi tuj klarigos. – Tiu denove turnis sin al Magday. – Iraĉu el la ĉambro, dum ni paroladas!

Magday obeeme, honteme, rigardante malsupren, elŝanceliĝis el la tendo. Ekstere antaŭ la tendo du orname vestitaj husaroj staris, portante surŝultren ĵetatan dolmanon kaj surkape ornamajn ĉapojn. Ili atendis ĝis en la tendo la regnestra komisiito finas la ceremoniojn. Dume ili bridis la ekscititan stamfantan ĉevalon, kiel donace senditan stalnon, sur kiu estis arĝenta selo, kun silka kovrilo per flormotivoj brodita. La du husaroj atendis la festatan heroon. Finfine tiu elpaŝis el la tendo kaj sonis ĉielon tremetiganta vivuado de la entuziasmaj kurucaj bravuloj. Neniu rimarkis, ke tiu ne havas glavon, nur ĉiuj vidis, ke tiu estas ege pala. Sed ja la vizaĝo povas blankiĝi efike de la gloro.

En la kapon de Magday venis iu penso. Dum la husaroj kondukis antaŭ lin la riĉe ornamitan ĉevalon, subite li saltis sur ties dorson, unufoje-dufoje stampfigis la ĉevalon kiel provon, poste hot!... Tiu spronis la ĉevalon, forlasis la tendaron kaj forgalopegis. Kvazaŭ nebulo suriĝus la pejzaĝon antaŭ li kaj post li, ĉar plue li ne estis videbla. La kurucoj postrigardis lin gapante, pensante, kiaspecan frenezan amuzadon povas havi, kiam dum ĉi tiu festa momento li lasas ilin solaj. Nome la aliaj ceremonioj nun sekvos, kiam Bottyán informos ilin: la grafo Bercsényi laŭtleĝos glorigan leteron de la regnestro, laŭdante Stefanon Magday antaŭ la armeo, poste sekvos la rostaĵo de bovo kaj nature la spilo de barelo perkrane. Pli malfrue li certe revenos, kiam oni festos nur la ĉevalon, – diris kelkaj soldatoj. La ĉevalo plaĉas al li, kio ne estas miraklo! Ĝi estas belega besto! Ĉiuj kredis, ke li revenos, sed jam nur unu nigra punkto videblis sur la horizonto el li. Nur unu homo de la armeo sciis, ke tiu neniam revenos. Li tuj enseliĝis dirante al la kamaradoj:

– Nu, ni vetu, ke mi postatingos tiun!

Efike de tio ĉi la kurucaj soldatoj ekridis:

– Ĉu vi dezirus postatingi la stalnon de la regnestro sur tiu ĉi ĉevalaĉo? Hoto! Spirmanka ĉevalaĉo, iĝu flugilhava ĉevalo!

Sed tiu ne okupiĝis pri tio, ke la aliuloj primokas, sed saltis en la selon de sia blanka ĉevalo, dum la ridego de la aliuloj. Tiu estis la sama figuro, kiu pli frue mansignis al Magday, ke li ne iru en la tendon.

Dum tio ĉi en la tendo, kie la du sinjoroj restis solaj, Bercsényi avide ekkaptis la ŝultrojn de Bottyán:

– Ĉu scias via ekscelenco, kiu estas tiu junulo?

– Kiu estas tiu? – demandis la blinda estro senpacience kaj kolere, dum li fermis ankaŭ sian vivkapablan okulon; li kredis, ke la grafo Bercsényi ekkaptis certe lia antipatio, kiu kaŭzis tiun brutalan faron. Nome tio okazis ĉe la grafo ofte.

– Tiu homo estas Stefano Vereŝ, kiu estas ŝtelisto kaj eskapis el la kaptiteco.

– Tio ne povas esti! – diris Bottyán surprizate kaj subite malfermis la okulon scivole, ĉu la grafo ne ŝercas? – Mi preferis pli bone tiun, ol lian filon.

– Tiu eskapis el la malliberejo de Sárospatak de antaŭ mortpuno infane ruzadante. Tiu blagis la malfeliĉan maljunan Krucsay-n per la de regnestro ŝtelita fingroringo de sia vagabonda cerbo. Sed tio ĉi estas tute longa historio.

Poste li rakontis la tuton de la komenco ĝis la fino. Bottyán gapis buŝmalferme kaj longe ne kapablis paroli.

– Jes, mia sinjoro generalo, tiu bubo estas vulgara malbonfaranto. Mi povas diri, ke por mi estas bona surprizo, mi entreprenis porti la donacon anstataŭ la regnestra komisiito kaj ĉirkaŭrigardante ĉe via tendaro por fari unu bonan tagon por viaj soldatoj. Nu, se la regnestro ekscias tiun ĉi famon, li surpriziĝos. Hodiaŭ mi skribos al li leteron.

– Tiu estas mia plej brava soldato. – ekĝemis Bottyán. – Kio estos pri tiu?

– Tio dependas de la regnestro.

– Mi petos amnestion. Nome tiu kondukis ĉe ni plej bele, plej brave, plej noble. Ankaŭ lia hundo estas pli valora, ol ajna imperiestra soldato. Notu bone, tiu havas grandan nigran hundon, kiu iras kune kun la armeo kaj dum la batalo rapidegas inter la malamikojn; ĝi mordas, deŝiras kiel furioza tigrida. Sinjoro ĉefgeneralo, bonvolu moligi vian koron.

Bottyán petegis lin, ĝis la improvizadanta grafo finfine paciĝis:

– Do, al Dio! Ne gravas! Proponu vian petegon pri la amnestio al lia sinjora moŝta (Rákóczi-n oni nomis ĉi tiel en Transilvanio.) Mi ne kontraŭas, se tiu konfesas la lokon de la trezoro. Bonvolu vokigi lin ĉi tien.

Sed la ornamvestaĵa gardisto antaŭ la tendo diris, ke tiu forrajdis.

– Sur kiu ĉevalo?

– Sur la regnestra stalogriz-kolora stalono.

– Nu, tiuokaze tiu neniam revenos – diris Bottyán la blinda – malĝoje.

Kaj tio okazis ĉi tiel. Magday, nome Stefano Vereŝ, ĉar tiuj estis li kaj Ladislao Fekete kaj Laĉjo Vereŝ, pasis galopante al la tendaro de Heister. „Se mi devis foriri de tie ĉi – li pensis – tiam certe mi estos bona en la alia tendaro.” Lia koro pleniĝis pro amareco. Li sentis, ke li estas senkulpa. Li volis fasti, provis ŝanĝi la teruran faton, kiu piedpremis lin, sed la fato retrovis kaj denove batalis kontraŭ li. Kion fari? Rifuĝi ien, kien eblis.

Ja Heister diris al li: „Se via glavo falas sur la teron, iam, venu al mi kaj mi levos tiun!” Li tenis sian vorton. Li akceptis la du kurucajn fraŭlojn bonkore kaj komisiis Stefanon pri estrado de iu militvaganta armeo. Sed Laĉjon li sendis al alia korpuso, ĉar li ne volis, ke la du fratoj estu samloke, ja estis malkonfido kontraŭ la fratoj. Sed ankaŭ la konfido alvenis iom post iom. Stefano Vereŝ iĝis unu el la plej bonaj imperiestraj taĉmentestroj, kiun menciadis ofte kaj gloris la gazetoj senditaj al Vieno.

Kiam Bercsényi raportis al Rákóczi enletere pri la afero de Magday, kiel li trovis la ŝtelanton sub la masko de heroo kaj kiel tiu malaperis subite sur la donacĉevalo, la regnestro kolere stamfis per la piedoj:

– La ŝtelanto ne povas esti heroo. Sed Magday estas vera heroo.

La regnestro tuj sendis la ordonon, kie ajn oni atingas lin: amnestio estu por Stefano Magday.

Sed dume post monatoj alvenis la famo, ke Magday militservas ĉe la imperiestra armeo kaj nun li estas terura malamiko de la kurucoj la regnestro murmuradis incitite:

– La honesta homo neniam povas esti perfidulo.

Poste li sendis la ordonon, laŭ kiu kie ajn oni atingas Stefanon Magday: la puno estas la morto.

14. Ĉapitro

La eŝafodo

Magday ankaŭ pli malfrue kaŭzis multe da damaĝoj al la regnestraj armeoj. Pro tio Rákóczi promesis doni ducent ormonerojn al tiu, kiu kaptas lin viva aŭ morta. Proksimume duonjaro pasis. Dum iu julia posttagmezo sur la kampo de Iblo granda batalo estis inter iu patrolanta trupo de Heister kaj la kurucaj soldatfraŭloj. Proksimume estis okdek kurucoj, kiujn estris la maljuna „paĉjo Joĉjo”, la plej maljuna kaporalo en la armeoj, kiu, dum neesto de batalo, rakontadis al la soldatoj apud bivakfajro, sed en la batalo per sia malnova sabro tiel tranĉadis la germanajn soldatojn kiel la tajloro la drapon. Proksimume cent imperiestraj soldatoj ĉeestis, kiam la kurucoj aperis ĉe la arbaro apud la rivero Iblo.

– Nu, ek! – kriis paĉjo Joĉjo al tiuj, kiuj maltrankvile rigardis la malamikajn soldatojn, – ni ne nombru la malamikajn soldatojn, ĉar estos pli facile la nombrado, kiam jam ili ne moviĝas.

La kurucoj kursvingiĝis kaj preskaŭ tiel same okazis post unu horo, kiel paĉjo Joĉjo profetis. Ili mortigis iujn, iujn vundis, iujn ekkaptis dum kelkaj forkuris. Paĉjo Joĉjo ĵetis sin sur la estrantan oficiron kaj kvankam tiu kondutis brave, militkaptis kaj akompanis kune kun la aliaj militkaptitoj. Ili kaptis proksimume tridek militkaptitojn. La imperiestra oficiro rigardis kaŝobservante paĉjon Joĉjo, kvazaŭ tiu ŝajnus al li konata, sed nenion diris, nur klinis malsupren la kapon ege malĝoje.

Ankaŭ por la maljuna kapolaro ŝajnis konata la oficiro, sed li trankviliĝis, ja jam li vidis multe da imperiestraj soldatoj kaj tio ne estas eksterordinara, se ili similas unu al alia. Ĉefe la brodita skarpo de la oficiro ŝajnis al li konata.

– Ej, ej, mi vidis ie tiun broditan skarpon tenantan la glavon. (La maljunulo pensadis premadante sian frunton.) – Kie mi vidis, ej, ej. – Finfine li ĝojkriis forte. – Hop! – mi scias! – li diris rememorante pri la afero kaj ekkaptis la ŝultrojn de la militkaptita oficiro. – Kie vi aĉetis tiun skarpon? – demandis li por certiĝi pri sia ĝusta penso.

– Tio ne estas via afero.

Ĝuste tiam atingis al ili Johano Hajdu, kiu antaŭ tio ĉi servis ĉe la armeo de Bottyán kaj vigle ekkriis:

– Diable! Ja tiu ĉi estas Stefano Magday.

La militkaptito ektemis kaj ĝisorele ruĝiĝis. Paĉjo Joĉjo demandis scivole:

– Kiu estas Stefano Magday?

– Kiu ekkaptas tiun, tiu ricevas de la regnestro Rákóczi, ducent ormonerojn.

– Ĉu? – dubadis la paĉjo – tio ne povas esti!

– Kio ne povas esti?

– Aŭ tio ne povas esti, ke la regnestro 200 ormonerojn donas al tiu, kiu ekkaptas Stefanon Magday, aŭ se tiu ĉi estas vera, tiam tio ne povas esti, ke tiu ĉi estas Magday. Kamarado, mi ne havas tiom da feliĉo.

– Sed tio estas vera, sinjoro Doboš – entuziamiĝis Johano Hajdu.

– Se mi havus 199 ormonerojn, tiam mi tuj donus al vi kontraŭ la militkaptito kaj ankoraŭ gajnus unu ormoneron. Sed mi havas nur 3 tielnomatajn „libertas”-ojn (mono de Rákóczi).

– Bonaj estos ankaŭ por mi la 200 ormoneroj – klakis per sia lango paĉjo Joĉjo, – mi transdonos al mia edzinjo.

Poste li turnis sin al la militkaptito kaj flustris intime:

– Ĉu vere via ekscelenco estas Magday?

Je tio, tiu reflustris:

– Mi estas studento Steĉjo, la iama studento de via ekscelenco.

Pro la anonco paĉjo Doboŝ ege surpriziĝis kaj siblis, kvazaŭ iu serpento mordus lin.

– Tio estas malebla! – balbutis li, sed pli bone rigardante la longhararan, blondan junulon, ekkriis: – Jes, vi estas tiu! Diable! Kiel vi atingis tion ĉi? (Li komencis grati sian kapon.) – Ej, ej! Ĉu mi nutris vin tial, por ke vi faru ĉi tian aferon?

La maljunulo rigardis tiun, ĝis finfine li komencis plori.

– Malfeliĉa knabo! Do, ĉu ni devas renkontiĝi ĉi tiel? Kie estas via pli juna frato?

– Ankaŭ li servas ĉe Heister.

– Ĉu ankaŭ tiu? Nu, mi povas diri, ke vi donis belan ĝojon al mi. Fulmotondro! Vi elprenis 200 ormonerojn el la poŝo de via pli aĝa frato, ĉar vi estas tiu kaj ne tiu, kiun mi pensis. Ĉu ĉi tio estas deca?

– Ne malĝoju, oĉjo Doboŝ, ĉar ankaŭ Stefano Magday mi estas – diris la militkaptito amare.

– Ĉu vi estas tiu? – Kiel tio povas esti?

– Tio estas mia pseŭdonomo.

– Kion vi diras? Do, ĉu vi iĝis tiu bravulo, por kies kapo oni donas 200 ormonerojn? Mia malfeliĉa filo!

Li turnis sin al tiu, karesis kuname, interkisadis, dum liaj larmoj tiel fluis kiel la pluvego. Ankaŭ la imperiestra oficiro komencis plori.

– Mia koro fendiĝas pro malĝojo – li ploregis – kion diros via onjo, ke pro mi vi mortis? Nature ne kredu, dolĉa mia filo, ke mi liberigos vin. Mi estas honestulo. Se mi kaptis vin, tiam mi forportas, ĉar la regnestron mi ne trompas. Mian kapon mi donas kontraŭ la via, sed vin mi ne cedas foriri.

Kaj ĉar li timis la tenton, li vokis al si sinjoron Johanon Hajdú, kiu okupis sin ĉirkaŭ la ĉaroj. Via ekscelenco diris pli frue, ke vi donus 199 ormonerojn kontraŭ mia militkaptito.

– Jes. Se mi havus tioman. Ĉar la militkaptito estas valora.

– Nu, mi donas tiun al via ekscelenco senpage.

– Ĉu vi ne freneziĝis?

– Sed tio povas esti, ke mi freneziĝis, sed tio ne estas via afero! Mi ne bezonas la militkaptiton, ĉar mi timas, ke mi liberigus tiun. Prefere mi ne bezonas la 200 ormonerojn, ĉar mi timas tion, ke vi koruptos min. La militkaptito estas la via, diru, ke vi ekkaptis, mi nenion sciis pri tiu.

– Do, mi dankas al vi, sinjoro Doboŝ, mi portas tiun al Sárospatak kiel ovon.

– Sed ankaŭ mi postiras vin tien – pensis oĉjo Doboŝ.

La regnestro ĝuste aranĝis Parlamenton en Sárospatak. La situacio de la aferoj estis malbona, liaj sukcesoj dekadencis, pro tio li ege estis incitigema kaj melankolia.

Li subskribis sen pripensado la mortpunon de Stefano Vereŝ. Tio estu precedentvalora. Tiu ege meritas la punon. Ekzekutisto debatu ties kapon. Oni decidis pri la plenumo de la ordono, je merkredo. Marde vespere la ekzekutisto alvenis de Kaŝŝa. Tiunokte okazis terura fulmotondro; dum la mateniĝo okazis terura uragano, kiu eklevis la tegmentojn de la domoj kaj faligis sur la teron, kaj elradikigis la arbojn. La fulmo ekbruligis la kastelon de la regnestro, lian naskiĝlokon en Borŝi. La terura lumo de la praa konstruaĵo tute ĝis Sárospatak lumis.

Matene de la ekzekuto la regnestro vekiĝis frue, nokte maltrankvile dormis, havis terurajn sonĝojn, vidis siajn infanojn, kies kapoj estis detranĉintaj. Kaj tio ne estis tre malebla, ja tiuj estis en Vieno, preskaŭ en mallibereco.

La fortikaĵkomandanta sinjoro Krucsay kutimis enpaŝi plej unue al la regnestro. Li kutimis informi lian sinjoran moŝton pri la noktaj okazintaĵoj. (Nome se io okazis.). Li referas pri tio, kiuj atendas en la antaŭĉambro kaj kion ili volas. Ĉi tiel la regnestro povas elpensi la respondojn. Krom tio sinjoro Krucsay havas ĉiospecajn kortegajn klaĉojn, kiujn li rakontos al lia sinjoro moŝta dum la matenmanĝo.

– Kio estas la novaĵo ekstere, sinjoro Krucsay?

– Ĉi tie estas delegitaroj de Peŝto kaj Debrecen.

– Kion ili volas?

– Ĝuste tio estas la problemo, ke ili ne volas, mia sinjoro moŝta.

– Kion ili ne volas?

Pagi imposton.

– Tio estas sufiĉe forta malpatriotaĵo – murmuretis la regnestro – baldaŭe mi riproĉos ilin, sed ili atendu ankoraŭ. Do, kiu estas ankoraŭ?

– Iu maljuna kuruca soldato.

– Kiel oni nomas lin?

– Li estas „paĉjo Jozefo”.

– Kian malbonon povas havi la oĉjo? – demandis la regnestro vige. – Mi scias, ke li estas elstara bravulo.

– Mi ne scias. Sed iu junulo, portanta mantelon, estas plej malpacienca, kaj li perforte volas enveni kaj faras malbonaĵojn, ĉar la gardistoj ne lasas enveni.

– Lasu enveni unue la kurucan soldaton.

Oĉjo Doboŝ enpaŝis.

– Nu, kio estas la problemo, oĉjo?

– Mi havas unu gravan peton, mia sinjorö moŝta.

– Estas en ordo, oĉjo. Kiu jam faris multon, tiu povas peti, sed jam povas deziri. Kio estas via deziro?

– Oĉjo Doboŝ malleviĝis al unu genuo.

– Amnestion, amnestion, mia sinjoro moŝta.

– Por kiu? – demandis Rákóczi surprizate.

– Por tiu juna Stefano Vereŝ, kiun mi ekkaptis.

– Ĉu? Ja mi al aliulo donigis la 200 ormonerojn!

– Ho, ve! Mi malkovris la sekreton, mi petegas por pardono, sed ĉar mi misparolis, do, mi konfesas la veron, ĉar mi scias, ke ĉi tie malpermesate estas mensogi. Mi ekkaptis Stefanon Vereŝ, sed donis al Johano Hajdú, ja mi timis, ke mi lasus lin foriri libere. Nome tiu estas mia adoptita filo kaj mi edukis. Mi pensis, ke tiu estu malliberulo, se li iĝis malliberulo. Tio estos pli bona, se mi sola iras al via moŝto por peti pardonon. Kvankam terura kulpo estas tio, se iu kiel hungaro batalas apud la germanoj kontraŭ la hungaroj, tamen nur Dio konas la homajn farojn. Povas esti, ke tiu estos ankoraŭ honesta homo.

– Do, ĉu vi ne konas lian ceteran pekon?

– Mi ne konas, mia sinjoro moŝta – alparolis oĉjo Doboŝ kaj lia vizaĝo malsekiĝis de la larmoj.

– Ĉu vi ne scias tion, ke li ŝtelis kaj trompis en mia nomo helpe de mia fingroringo la fortikaĵkomandanton, kiu liberigis lin?

– Ĉu li ŝtelis? – balbutis la maljunulo kaj forviŝis la larmojn de sia vango. – Ho, ve, mia majesta sinjoro! – kriis li doloreme. – *tiam mi nenion alparolis.*

Poste li turnis sin kiel soldato kaj ŝanceliĝante eliris el la ĉambrego. Nun la delegitaroj sekvis. Nesselróth estris la delegitaron de Peŝto, profesoro Szilágyi la delegitaron de Debrecen. Ili plendis farante oratoraĵon pere de longaj frazoj, laŭ kiuj, ili ne havas monon, pro tio petas moratorion. Rákóczi nur unufoje interparolis incitite:

Demandu viaĵ ekscelencoj la stomakojn de la soldatoj. Ĉu ili donas al mi moratorion?

Krom ĉi tiu sola rimarko la regnestro sufiĉe indiferece aŭskultis la longajn oratoraĵojn, dum ekstere iĝis vigla voĉbruo. Rákóczi iris al la fenestro kaj scivole nevole elkliniĝis: interesate pri la eksteraj okazaĵoj.

Oni portis al la eŝafodo Stefanon Vereŝ. Granda akompano akompanis lin: sinjorinoj, infanoj, armilaj gardistoj. La ekzekutisto paŝadis apud Steĉjo. La ekzekutisto portis skarlatkoloran vestaĵon. Dum tiu ĉi momento enpaŝis denove la fortikaĵkomandanto:

– Sinjoro moŝta, amnestion petantoj petas enlason.

– Ne estas amnestio – respondis la regnestro raŭkvoĉe, iomete repuŝiĝante.

En la kortego estante, la kondamnita Vereŝ ekvidis en la fenestro la vizaĝon de la regnestro kaj ekskuante siajn katenojn, kriis al la regnestro:

– Amnestion! Amnestion!

La marŝo ekhaltis ĉe la fenestro, atendante la decidon de la regnestro.

– Se via moŝto donas amnestion, tiam mi pruvos la fortojn de miaj brakoj.

Rákóczi mansignis apatie, signante, ke la marŝo povas iri plu kuraĝe. Poste li fermis la fenestron. Sed dum la sama momento disen puŝante pordgardistojn, unu viro enkuregis anhelante, portante germanan soldatvestaĵon. La mantelo, kiu kovris la vestaĵon defalis de li. Rákóczi detenante paŝis malantaŭen, ĉar li kredis, ke murdisto volas ataki aŭdace.

– Sinjoro moŝta! – stertoris li korŝirvoĉe, surgenuen falante. – oni portas mian fraton al la eŝafodo. Mi forportis la trezorojn, mi estas la peka.

– Kiel vi povas paroli malsaĝaĵojn? Li estas perfidulo. Li estas ŝtelanto. – alparolis la regnestro kolereme. – La ŝtelon mi povus pardoni, sed la perfidon ne, ĉar devas esti precedenco kiel fortimigo. Foriru! Gardistoj!

– Se via moŝto priaŭskultas min, tiam vi neniam forgesos, ĉar mi ĵuras je Dio, ke vi mortigus senpekan homon.

– Parolu! – diris la regnestro. – Kio estas via argumento en lia intereso?

– Mia sinjoro moŝta, li ne estas ŝtelanto.

– Do, kiu forportis tiukaze miajn trezorojn?

– Mi, – respondis Laĉjo.

– Mi aŭskultas vin. – alparolis Rákóczi kaj eksidis sur brakseĝon.

Ladislao Vereŝ rapide, ne spirante vicigis la unuarangajn gravaĵojn, laŭ kiuj la regnestro ekkomprenante la sinsekvon de la aferoj, vigle ekkriis:

– Tuj kuregu kun la blanka flago! Povas esti, ke ĝi ne estos malfrue!

Oni tuj ligis blankan tukon sur la finon de stango kaj kvar paĝioj ĉiam estis dum deĵoro ĉe la fenestro de la regnestro, atendante ordonon. Ja la ĉevalo de la paĝio treege galopegis, ĉar la paĝio bone spronis ĝin. La regnestro malfermis la fenestron kaj postkriis la paĝion:

– Vi ricevos dek ormonerojn, se vi atingos la marŝkolonon!

La regnestro tiome iĝis ekscitita, ke li ne lasis foriri la delegitarojn, ĉar li volis ne amuziĝi ĝis li ekkonos la rezulton.

Sed spite de rapideco de la paĝio, tamen Laĉjo Vereŝ pli frue atingis la eŝafodon, ol la paĝio. Sed Laĉjo galopegis transsalte – senhalte anhelante, elpendigante la langon kun pulsanta koro. Li malrapidigis iomete la galopegadon, dume li ekaŭdis la stentorantan vivuadon.

– Estu benita Dio, kiu estas en la ĉieloj! La vivuado certe signis tion, ke la marŝkolono rimarkis la blankan flagon kaj ankoraŭ ne estis malfrua.

Sed ankaŭ Laĉjo nur nun rimarkis pro la ekscito, ke li ne estas sola: aŭ apud li, aŭ antaŭ li kuras hundo. Jen, ja tiu ĉi estas lia propra blanka hundo. Li ŝrikis pro la ĝojo: Dravo! Dravo! La hundo gaje saltis al li kaj liajn manojn lekadis. Vere, tiu estis la hundo Dravo.

– Ĉu ci estas Dravo? Ĉu ci estas vere Dravo? Ho, mia kara hundeto, ege bone estas, ke mi retrovis cin. Sed mi serĉis cin multfoje. Ĉu al ci decas konduti tiel ĉi forlasi cian karan mastron, kiu cin treege ŝatis? Ĉu mi meritis tiun ĉi malbonaĉon?

Li skuadis kaj iu superstiĉa antaŭsento regis liajn sensojn.

– Ĉu mi meritis tion? Povas esti, ke mi meritis kaj la providenco punis min, ĉar mi ne faris dece kaj finfine Dio faris bonon kaj redonis mian hundon. Povas esti, ke fakte tiu maljuna sinjorino pravis, kiu diris kuŝante sur sia mortlito: „Vi ne scias, ke mi distribuadas la feliĉon”, kaj ŝi donis al mia malfeliĉa pli aĝa frato la nigran hundon, la malfeliĉon, kaj al mi venis la blanka hundo, la bona feliĉo, sed mi ne kapablis tiun aprezi ...

La blanka flago ĝustatempe aperis sur la horizonto. La ekzekutisto jam detiris ankaŭ la kamizolon de Stefano Vereŝ. Estas superflue rakonti, ke iĝis grandega ĝojo, kiun pliigis la sentema interbrakumado de la fratoj. La soldatoj, kiuj aŭdis pri liaj multaj eminentaj agoj, akompanis lin al la urbo triumfe, gaje kaj ĝojkriante. Dumvoje alia servisto de la regnestro venis al la marŝo, ke la fratojn Vereŝ oni devas porti antaŭen de la regnestro. Laŭ ĉiuj ĉi tiel ŝajnis, ke Lia Moŝto maltrankviliĝadas.

La sinjoroj de Peŝto kaj de la urbo Debrecen estis ĉe Rákóczi, dume la fratoj Vereŝ povis eniri al la regnestro. Stefano Vereŝ iris al la regnestro, li surgenuiĝis kaj kisis la manon de la regnestro:

– Mi dankas, mia sinjoro moŝta. Vi ekvidos, ke mi perlaboros vian helpon.

– Ne al mi danku, sed al via frato.

– Kial, mia sinjoro Moŝta?

– Li diris al mi, ke vi nenion scias pri la trezoroj, ĉar li elfosis tiujn.

– Sed tio ne pravas, mia sinjoro Moŝta – alparolis Stefano indignante.

– Ĝi pravas, mia pli aĝa frato, laŭvorte pravas! Mi estis fia, ĉar mi ne priparolis al vi.

Stefano rigardis gapante la propran pli junan fraton kaj ne sciis, kion li kredu. La regnestro interparolis:

– La afero vere ne estas sufiĉe klara antaŭ mi, ĉar mi ne havis tempon pridemandadi vin. Sed nun mi havas tempon kaj rakontu viajn vivhistoriojn.

Laĉjo estis pli bona rakontanto, ol Steĉjo, pro tio li rakontis ilian tutan historion, komencante de Krucsay: kiel akceptis ilin onjo Doboŝ kiel siajn filojn; kiel ricevis Steĉjo ligilon por glavo dum konkuro de la granda arbaro de Debrecen; kiel Steĉjo enamiĝis al Magdalena Szilágyi; (Ej, ej, – murmuretis la ĉeestanta sinjoro Szilágyi), kaj Steĉjo pro tiu amo sopiris la nobelecon; kiel ili ekiris en la mondon, kiel ili ricevis nigran kaj blankan hundojn; el kiuj feliĉon portis la blanka kaj malfeliĉon la nigra; poste ambaŭ rakontis unu post alia la propran historion, sed nur tiu de Laĉjo estis bunta, kiu dume forprenis la multe da moneroj kaj ekiris serĉi sian pli aĝan fraton. Sed li restis en Peŝto, ĉar li enamiĝis al la filino de sinjoro Nesselróth. (Ej, ej, – murmuretis ankaŭ Nesselróth.)

La regnestro priatentis la historion interesiĝante kaj poste alparolis:

– Vi suferis multe kaj mi povas diri, ke vi ambaŭ kiel homoj estis persistaj. Kvankam vi iomete hezitis (diris li turmante sin al Laĉjo), sed hodiaŭ korektis, pruvante, ke vi estas homeca, kio estas la ĉefa afero. Ĉi tio estas vere instrua historio! Sed mi donas konsilon, kvankam mi ne estas superstiĉa. Tiun nigran hundon mortbatu, tiun blankan sendu kiel donacon al Bercsényi kaj ĝi estu ĉiam apud la armeo por porti feliĉon.

– Ĉi tio estis trafa, ŝerca aludo de lia sinjoro Moŝta al Bercsényi, kiu kredis la superstiĉojn kaj aŭgurojn.

– La hundon mi ne lasas foriri plue, mia sinjoro moŝta – diris Laĉjo, – sed volonte iras al la tendaro, se via sinjoro moŝta permesas.

– Mi ne povas mortbati la mian, – respondis Stefano – ĉar pasintnokte ĝi mortis. Mi ne dormis tutnokte, do mi devis aŭskulti ĝiajn suferajn ĝemojn antaŭ mia malliberejo, poste tagiĝe, kiam oni portis min al la eŝafodo, mi vidis mian kompatindan hundon mortinta.

– Ĝi estis danĝera donaco! – diris Rákóczi. – sed pri vi, sinjoro Krucsay, mi ne supozus tiun teruran malbonegecon. Ĉu vi aŭdis tion, kion la knaboj rakontis?

– Mi aŭdis, mia sinjoro Moŝta.

– Ĉu tio estas vera?

– Tio estas vera. – respondis Krucsay malgaje kapklinante. – Tiam ankaŭ mi estis tro memfida homo, ĝis Dio punis min. Dio forprenis miajn tri filojn. Mi estas sola kaj kredu min, via moŝto, ekde tiam mi estas rompita kaj ĉiunokte mi aŭdas la veadojn de tiu mortbatita servutulo. Pro tio mi decidis, se iam mi povos retrovi la forpelitajn infanojn, tiam mi donus al ili mian tutan havaĵon.

– Jen, ili estas ĉi tie.

– Ankaŭ mi estas ĉi tie. Kion mi diris, tiun mi plenumas.

– Bone estas, Krucsay – kriis la regnestro tute gaje – nun jam ni povas teksti plu la historion.

Nun Lia sinjoro moŝto turnis sin al la tie staraĉadantaj delegitaroj:

– Nu, sinjoroj Nesselróth kaj Szilágyi, nun jam mi donas al vi la moratorion, sed mi havas unu kondiĉon:

– Ni atendas la ordonon de via moŝto kun la plej granda humilo.

– Viajn filinojn vi donas kiel edzinojn por miaj du soldatoj, ja jam ili havas la havaĵojn de sinjoro Krucsay.

– La deziro de via moŝto estas ordono por mi – kliniĝadis Nesselróth.

– Mi havas neniun pretekston kontraŭ tio. – deklaris Szilágyi.


La vizaĝoj de ambaŭ junaj bravuloj brilegis pro la plej sunbrila ĝojo.

– Ho, mia Dio! Ni neniam kapablos danki la bonecon de Via Sinjoro Moŝta.

– Nu, – finis la regnestro – sed ne ĝoju treege frue, ĉar la posedaĵojn de Krucsay vi devas reakiri de la imperiestra armeo.

Poste la regnestro mansignis favorkore kaj lasis foriri ĉiujn ĉeestantojn.

... Fino ...



La korto de la Rákóci fortikaĵo en Sárospatak – bildkarto

<https://dka.oszk.hu/html/kepoldal/index.phtml?id=1958>